

LEGOLIBRETO III.

por karaj amikoj el eretoj kolektitaj diversloke

Pro tiu ĉi libreto mi ŝuldas grandan dankon pro afabla helpo, provlego, konsiloj, kaj korektado al oferemaj samideanoj, kiuj pacience laboris: Vratislav Hirš, Karel Votoček, Milada Kolářová kaj Jiří Patera

Jindřiška Drahotová – kompilinto

Karaj legantoj, akceptu mozaikon de artikoloj, rakontoj kaj verkaĵoj, kiujn mi diversloke trovis, kaj kiu similas al homoj, kiuj malsimilas unu al la alia. Tial vi certe trovos ion, kio plaĉos al vi.

Via drahotovaesperanto@seznam.cz

2005

La tekstoj ĉiu povas uzi laŭplaĉe.

Gvidas tien stranga vojo.

Ing. Jaroslav Krolupper, Csc.

Ĉu edeno en Skokovy?

Nepre devas mi elprovi,
ĉu kaŝiĝas tie ĝojo.

El la libreto Kiam bestoj parolis II.

Tradukis Gbeglo Koffi, Togolando.

Edzo, edzinoj kaj leono

En vilaĝo vivis bela junulo, kiu edziniĝis al si tri plej belajn junulinojn de la vilaĝo. La juna edzo amis siajn edzinojn, kiuj siavice lin pasie amis.

Iutage, tiu junulo kaj liaj edzinoj iris en arbaron por serĉi lignon. Ili elektis arbon, el kiu ili volis dehaki lignon, sed sub ĝi leono faris grandan fosaĵon kiel kaptilon. Araneaj ŝpinaĵoj kaŝis ĝian aperturon, kaj la junulo enfalis.

Konfuzite, la edzinoj freneze kriis. Unu el ili diris: „Mi tro amas mian edzon, mi ne povos vivi for de li,“ kaj ŝi sin ĵetis en la kaptilon. La dua deklaris: „Mi tro amas mian edzon, kaj mi povas malhelpi, ke lia nomo estingiĝu. Mi tuj iros hejmen kaj faros mian eblon por eduki liajn infanojn, por ke ili povu iam lin anstataŭi.“ La tria deklaris: „Mi tro amas tiun viron, do mi neniel povas lasi lin morti. Mi ĉiel klopodos lin savi.“

Trairante arbaron, ŝi renkontis leonon, kiu, allogate de ŝia beleco, demandis ŝin pri ŝia vagado en la arbaro. La virino malkaŝis al la leono sian turmentiĝon. Tial ili kune iris al la loko de la dramo. La leono savis la junulon kaj lian edzinon de la kaptilo.

Por rekompenco, la leono petis de junulo, ke li donu al li unu el siaj edzinoj. Tion la junulo plenumis.

Se vi estus la juna edzo, kiun el la edzinoj vi donus al la leono?

La araneo kaj la turto

Iam Araneo serĉis kamaradon iom malspritan, kun kiu li deziris fiŝkapti. Post longa kaj vana serĉado, li trovis la Turton, kiu akordiĝis kun li. Kune ili iris al fiŝriĉa marĉo.

La unuan tagon ili kaptis unu korboplenon da fiŝoj. Turto tiam diris al sia kunulo: „Ĉu vi volas alproprigi al vi hodiaŭ iun ĉi korboplenon? Morgaŭ mi prenos du.“ Araneo indignis kaj preferis ambaŭ korboplenojn de la posta tago.

La postan tagon ili kaptis du korboplenojn da fiŝoj, kaj Turto demandis: „Ĉu vi volas tiujn du korboplenojn hodiŭajn anstataŭ tri morgaŭajn?“ Araneo severtone respondis: „Kiu el ni meritas tri korboplenojn da fiŝoj? Ĉu ne mi Araneo?“

La lastan tagon, Turto faris proponon al Araneo: „Ĉu vi volas tiujn lastajn korboplenojn da fiŝoj, dum mi alproprigos al mi la nason, kiun mi vendos, kio ebligos al mi ekhavi ĉevalon?“ Ankoraŭ ĉi foje Araneo enfalis la kaptilon. „Ĝuste kaj juste nur mi rajtas havi tiun ĉevalon,“ respondis Araneo.

Tiam Turto kunprenis la lastajn korboplenojn da fiŝoj. Siaflanke Araneo tute ne sukcesis vendi la nason.

Finfine, kiu el la du estas pli malsprita?

El la libreto Raka vägen till språkkunskap de Vilho Setälä

finna legolibreto por infanoj el la jaro 1958

49. Bona konduto sin pagas

La grandaĝa avo Hundo posedas bonan sledon por transporti varojn (komercaĵojn). Ĝi estas konvene granda por puŝado per la manoj, kaj por sursido de kelkaj infanoj, kaj ĝi bone glitas sur la neĝo.

Iun tagon Riko vidis, ke Hundo venas hejmen kun la sledo malplena. Li diris: „Ni prenu ĝin kaj glitumu sur la deklivoj por nia plezuro.“

Tio vere estus granda ĝojo, ĉar antaŭ ne longe falis la unua neĝo: la griza (malpura koloro inter blanka kaj nigra) aŭtuna naturo subite fariĝis alloge blanka kaj pura, kaj elvokis ĉiujn infanojn el la ĉambroj.

Keko kaj Poĉjo ŝanceliĝis, hezitis: ĉu Hundo donos ĝin?

Sed Riko ekiris kuraĝe: „Vi vidos“, li diris memcerta. Kaj tuj li estis en la korto de Hundo.

„Hej, mi prenos la sledeton por kelka tempo!“ li kriis senĝene.

„Ĝi estas mia,“ respondis avo Hundo severe (forte, neafable), „vi ne prenos ĝin!“

Revenis Riko hontema kaj senkuraĝa. Li ne bezonis informi (sciigi) pri la rezulto. Sed Keko alten levis sian kapon.

„Mi provos mian ŝancon (eblecon de sukceso),“ li diris.

Keko aliris kaj salutis: „Bonan tagon, avo! Ĉu vi afable permesus al mi glitumi per via sledo?“

„Kun plezuro! Nur zorgu, ke vi nekolizos (kontraŭveturos) kun arboj! Kaj antaŭ ĉio, ne iru al la vojo!“

Keko kaj avo bonhumore diris „ĝis revido,“ kaj Keko forpuŝis la sledon al la deklivo. Tie li kun Poĉjo komencis gajan glitumadon. Sed Riko pripensis ĝentilajn morojn (devigajn kutimojn).

51. Keko kaj Riko ricevas fremdlandajn korespondantojn

La festa antaŭtago progresis al vespero. Subite oni aŭdis bruon en antaŭĉambro: la leterportisto alvenis kaj faligis poŝton tra la letertruo en la

pordo. Paĉjo tuj rapidis preni la gazeton, sed el la gazeto falis salutkartoj (pecoj de dika papero, kiujn oni sendas per poŝto). Estis ankaŭ letero mirinda.

Keko kaj Riko kune studis ĝin. La poŝtmarkoj estis belaj kaj neniam antaŭ viditaj: unu portis portreton (bildon de persono) kun subskribo L.L.Zamenhof kaj sur la alia estis teksto: „Lingvo internacia, Esperanto“, kaj bildoj de du vizajaĵoj (tiu flanko de la kapo, kie estas la okuloj), kiuj ŝajnis paroli unu al la alia. Sed al kiu estis la letero adresita? Sur la koverto (leterkovrilo) oni povis legi: Sinjoro Pupo Leporo, Keko-tie 12, SOMERO. Ĝi do ne estis por iu el la familio Koko, ĝi estis intencita por la najbaro. Kaj el kiu lando ĝi venis? Sur la poŝtmarko estis legeble: Magyar posta. Patro klarigis, ke tio signifas hungaran poŝton. „Sed vi devas porti la leteron al nia najbaro, sinjoro Leporo. Li ja loĝas proksime,“ diris Patro.

Kaj la fratoj iris al la najbaro kaj sonorigis la pordan sonorilon. Sinjoro Leporo invitis ilin internen kaj klarigis tutan aferon. Li havas amikojn en la tuta mondo, tio estas, ĉie sur la terglobo, tamen ne en la spaco kaj sur aliaj steloj aŭ planedoj. Kaj li korespondas kun ili per Esperanto, la internacia lingvo. Ankaŭ vi povos havi amikojn por interŝanĝi leterojn kun alilandanoj, se vi lernas Esperanton.

Proverboj (ant, int, ont)

Ŝvitas kuŝemulo manĝante, frostotremas laborante.

Ploranton ni evitas, ridanton ni imitas.

Eniris ridetante, revenis plorante.

Estinta amiko estas danĝera malamiko.

Uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan.

Proverboj (et, eg)

Malgranda birdeto, sed akra ungeto.

Neniu estas profeto en sia urbeto.

Grandegaj estas la kornoj de bovoj transmaraj.

Ŝtelistetojn oni batas, ŝtelistegojn oni ŝatas.

Proverboj (ar, er)

Kiu timas bestaron, ne iru en arbaron.
Ne iru al fremda anaro kun via regularo.
El malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj.
Unu floro ne estas krono, unu monero ne estas mono.

Instruo pri la vivo

Rete sendis al ni francaj amikoj en februaro 2005

Maljuna profesoro de la Nacia Lernejo de Publika Administrado estis iam komisiita por informi aron de komencantaj estraranoj de grandaj nordamerikaj kompanioj pri efikoplena planado de la tempo.

Por tiu ĉi lekcio, unu el kvin liaj laboraĵoj, li disponis nur unu horon por transigi sian lernoobjekton. Staranta antaŭ tiuj eminentuloj, kiuj estis pretaj noti ĉion, kion la eksperto instruus al ili, la maljuna profesoro malrapide rigardis unu post la alia kaj poste diris al ili: „Ni tuj eksperimentos!“

El sub la tablo, kiu apartigis lin de liaj lernatoj, la maljuna profesoro eligis grandegan vitran poton je pli da kvar litroj, kiun li delikate lokis antaŭ si. Li poste eligis ĉirkaŭ dekduon je ŝtonetoj preskaŭ tiel grandaj kiel tenisaj pilkoj kaj li delikate metis ilin unu post la alia en grandan poton. Kiam la poto estis plenplena kaj ne eblis almeti ŝtoneton plu, li malrapide rigardis siajn lernatojn kaj demandis al ili: „Ĉu tiu poto estas plena?“

Ĉiuj respondis: „Jes!“

Profesoro atendis dum kelkaj sekundoj kaj aldiris: „Ĉu vere?“

Tiam li denove kliniĝis kaj eligis el sub la tablo ujon plena je gruzo. Li zorge ŝutis tiun gruzon sur la grandajn ŝtonetojn kaj li poste brakmiksitis la poton. La pecoj da gruzo penetris inter ŝtonetoj ĝis la fundo de la poto. La maljuna profesoro denove rigardis sian aŭdantaron kaj ripetis sian demandon: „Ĉu tiu poto estas plena?“

Tiufoje liaj brilaj lernatoj komencis kompreni lian artifikon. Unu el ili respondis: „Kredeble ne!“

„Bone!“ respondis la maljuna profesoro. Li denove kliniĝis kaj tiufoje eligis el sub la tablo sakon plenan da sablo. Li atente ŝutis sablon en la poton. La sablo plenigis la interspacojn inter la ŝtonetoj kaj la gruzo. Li denove demandis: „Ĉu tiu poto estas plena?“

Ĉi tiufoje, senhezite kaj ĥore la brilaj lernatoj respondis: „Ne!“

„Bone!“ respondis la maljuna profesoro. Kaj kiel liaj prestiĝaj lernatoj antaŭvidis, li prenis la kruĉon, kiu estis sur la tablo kaj plenigis akvon en la poton. Poste li rigardis sian aron de aŭdantoj kaj demandis: „Kian grandan veraĵon demonstras al ni tiu eksperimento?“

Ne malsaĝulo, la plej aŭdaca el la lernantoj, pensante pri la temo de tiu lekcio, respondis: „Tio demonstras, ke kvankam oni opinias, ke la agendo estas tute okupita, se oni vere deziras, oni povas aldoni pli da rendezuoj, pli da farontaj aferoj.“

„Ne!“ respondis la maljuna profesoro. „Ne estas tio! Jen la granda veraĵo, kiun demonstras tiu eksperimento: Se oni ne unue enmetas la grandajn ŝtonetojn en la poton, oni poste neniam povos meti ĉiujn konsistaĵojn.“

Estiĝis silentego, ĉiu ekkonsciis la evidentecon de tiu diraĵo. Tiam la maljuna profesoro diris al ili: „Kiaj estas grandaj ŝtonetoj en via vivo? Via sano? Via familio? Viaj geamikoj? Plenumo de viaj revoj? Fari tion, kion vi ŝatas? Lerni? Defendi aferojn? Malstreĉi? Ne rapidi? Aŭ alio? Tio, kion estas necese memori, estas la graveco enmeti unue siajn grandajn ŝtonetojn en sian vivon, alie oni riskas ne sukcesi sian vivon. Se oni konsentas la unuaecon al la malgravaĵoj (la gruzo, la sablo), oni plenigos sian vivon per malgravaĵoj kaj oni ne plu havos sufiĉe da multvalora tempo por dediĉi al la gravaj elementoj de sia vivo. Vi ne forgesu demandi al vi mem: **Kiaj estas gravaj grandaj ŝtonetoj en mia vivo?** Vi poste enmetu ilin unue en vian poton (vivon).“

Per amika mangesto, la maljuna profesoro salutis aŭdantaron kaj malrapide eliris el la klasĉambro.

Dankon al aŭtoro!

Ĉu estas aŭtoro françoise.goetz@wanadoo.fr ?

o – o - o

Eraras tiuj, kiuj pensas, ke esti solaj por ili taŭgas - antikva proverbo

Unu patro superas centon da instruistoj - norvega proverbo

La plej magraj katoj vivas ĉe la plej riĉaj bienuloj - sveda proverbo

Neniam oni povas diri kiel baldaŭ povas esti malfrue.

Diradi nur veron havas enormajn avantaĝojn, la homo ne devas memori kion kaj kie iam diris.

Kalkulado de la Konto de Kokino

El „Rakontoj pri Afanti“

(Ĉinaj Popolaj Rakontoj)

Ĉina Esperanto-eldonejo, Pekino, 1982

Iam estis portisto, kiu en gastejo manĝis unu kokinon. Manĝinte, li demandis la mastron, kion li devas pagi. La mastro respondis: „Se hazarde vi ne havas sufiĉan monon, mi povas enskribi la sumon je via kredito. Vi povus pagi iam ajn, kiam vi havos monon.“

Tiu diro tre ĝojigis la portiston. Estis unua fojo, ke li renkontis tiel bonkoran mastron. Li adiaŭis lin kaj daŭrigis sian vojaĝon.

Post kelka tempo la portisto venis por kvitiĝi kun la mastro. La mastro ŝovis kuprajn monerojn tien kaj reen sur la tablo, kvazaŭ estus tro malfacila kalkulado. La portisto malpacience demandis: „Kiom kostas la kokino? Ĉu tio indas vian ripetitan kalkuladon?“

La mastro ne respondis, sed nur mansignis al la portisto, ke li lin ne ĝenu. La portisto povis fari nenion krom atendi.

Finfine la mastro elkalkulis la sumon kaj la portisto konsterniĝis pro la tro alta prezo de la kokino, kiu estis kelkcentoble pli alta ol ĝenerale. Li demandis: „Ĉu via kokino valoras tiom da mono?“

„Pro kio ne? Mem kalkulu kiom da ovoĵoj demetis la kokino, se ĝi ne estus manĝita de vi!... kaj kiom da kokidoj ili povus fariĝi!... kaj kiam ili maturiĝos, kiom da ovoĵoj ankaŭ ili demetis!“ diris la mastro per unu spiro. Rekalkulante per kupraj moneroj, la mastro daŭrigis: „Rigardu, mi ne miskalkulis eĉ moneron.“

La portisto ne povis plu sin deteni kaj indigne diris: „Tio ne estas negoco sed simpla trompo! Mi ne pagos!“

Vidinte, ke la portisto ne volas pagi al li ŝuldon, la mastro vole-nevole diris: „Bone, ni iru al la moskeo, por ke oni juĝu.“

La portisto kun granda aplombo respondis: „Kun justeco oni povas iri ĉien, sed kun maljusteco nenien. Se ne paroli pri moskeo, almenaŭ Alaho devas respekti la justecon.“

Disputante inter si, ili venis al la moskeo.

La imamo estis ne nur prizorganto de la religiaj aferoj, sed ankaŭ la plej aŭtoritata juĝisto. Por la religiuloj ĉiu vorto lia estis leĝo observenda. Kiam la mastro kaj portisto eniris, li manĝis haŝiŝon sidante sur tapiŝo. Li ĵetis straban rigardon al la enirantoj kaj malrapide demandis kun basa kaj raŭka voĉo: „Ĉu vi havas aferon?“

La mastro la unua rakontis detale la okazaĵon. Tion aŭdinte, la imamo opiniis, ke li pravus. Tial, antaŭ ol aŭskulti la plendon de la portisto, li jam juĝis,

ke la portisto pagu la ŝuldon laŭ la postulo de la mastro. La portisto sciis, ke nenio al li helpos plu. Li povis nur petegi, ke la imamo permesu al li pagi la ŝuldon post kelkaj tagoj. Tion konsentis la imamo.

La portisto sentis, ke li estas maljuste traktita, kaj malvigle reiris hejmen. De malproksime aŭdiĝis kanto. Iu rajdanto sur azeno renkonte iris al li kantante. La rajdanto respektive salutis lin kun dekstra mano sur la brusto: „Saluton, frato!“

Pro la malbona humoro la portisto ne volis saluti la senĝenan rajdanton, sed nur respondinte tra la nazo, rapide preterpaŝis. Tio mirigis la rajdanton, kiu tuj sin turnis kaj postkuris lin.

„Pro kio vi tiel ĉagreniĝas? Ĉu mi povus helpi vin?“

La portisto haltis, kun miro rigardis la rajdanton kaj demandis: „Kiu vi estas?“

„Mi nomiĝas Nasrudin Afanti,“ respondis la rajdanto.

„Ho! Vi estas sinjoro Nasrudin!“ kriis la portisto surprize kaj ĝoje. Fakte delonge la nomo de Afanti estis konata por li, kaj li sciis, ke Afanti ĉiam helpas la maljuste traktitajn malriĉulojn. Nun li propraokule vidis, ke li efektive estas tiel sincera kaj helpema.

La portisto detale rakontis sian travivaĵon al li. Pripensinte momenton, Afanti proponis: „Tuj reiru al la moskeo kaj plendu, ke la afero ne estis ĝuste juĝita, kaj petu rejuĝon antaŭ la publiko. Mi vin helpos por gajni la proceson.“ La portisto agis laŭ lia propono. La imamo vole-nevole konsentis, ĉar tie estis tradicia regulo, ke peto de publika juĝo estas permesata, sed la petinto ricevas punon pli severan, se li perdas la proceson refoje.

Venis la tago por publika juĝo. Asesoroj kaj popolanoj alvenis al la moskeo unuj post aliaj. La imamo deklaris la komencon de la proceso. La mastro refoje klarigis sian motivon. Venis la vico de la portisto, sed li silentis.

„Kial vi ne plendas?“ demandis imamo.

„Mia advokato ankoraŭ ne venis,“ respondis la portisto.

„Kiu estas via advokato?“

„Sinjoro Nasrudin Afanti.“

Tion aŭdinte, la imamo kaj asesoroj sulkigis la brovojn, dum la popolamaso subĝojis kaj murmuris: „Ni vidu, tuj estos interesa spektaklo...“

Pasis longa tempo, antaŭ ol Afanti fine alvenis. Salutinte la popolamason, li diris al la imamo kaj asesoroj: „Pardonon, ke mi malfruas pro grava afero.“

„Ĉu troviĝas afero ankoraŭ pli grava ol nia hodiaŭa proceso?“ ironiis unu el la asesoroj.

„Kompreneble troviĝas! Pensu, morgaŭ mi semos tritikon, sed miaj semoj ankoraŭ ne estis rostitaj. Ĉu troviĝas afero ankoraŭ pli grava ol tio? Mi rostis tri mezurujojn da semoj kaj pro tio mi malfruis.“

Aŭdinte liajn senraciajn vortojn, la imamo kaj asesoroj tre amuziĝis kaj preskaŭ unuvoĉe kriis: „Frenezaĵo! Ĉu oni povas semi rostitan tritikon?“ Ili laŭte kriadis, celante nuligi la advokatecon de Afanti, tiel ke ili povu fari verdikton laŭvole. Tion vidinte, la publiko maltrankviliĝis por Afanti, ĉar se li ne povos

respondi la demandon de la imamo kaj asesoroj, lia advokateco certe estos nuligita.

Afanti tamen restis aplomba. Kiam kvietiĝis la bruo, li diris: „Vi pravas! Se oni devas ne semi rostitan tritikon, kiel do kokino manĝita de la portisto povus demeti ovon?“

La vortoj tuj sigelis la lipojn de la imamo kaj asesoroj. Nur nun ili komprenis, ke lia malfruiĝo kaj la senorda parolado estis intencaj.

La popolamaso ĝojkriis: „Jes, jes! Kiel kokino manĝita povus demeti ovon?“

Sub la nerefutebla ripoĉo de Afanti kaj la popolamaso, la imamo kaj asesoroj ne povis ne ŝanĝi la verdikton kaj finis la aferon per tio, ke ili ordonis la portiston pagi laŭ la normala prezo.

Mesaĝo interreta el Francujo

Kara blanka frato,
kiam mi naskiĝis, mi estis nigra,
kiam mi kreskis, mi estis nigra,
kiam mi sub sunon iras, mi estas nigra,
kiam mi timas, mi estas nigra, kiam mi forpasos, mi estos nigra...
Dum vi, blanka homo...
Kiam vi naskiĝis, vi estis rozkolora,
kiam vi kreskis, vi estis blanka,
kiam vi sub sunon iras, vi estas ruĝa,
kiam vi malvarmas, vi estas blua,
kiam vi timas, vi estas verda,
kiam vi malsanas, vi estas flava,
kiam vi forpasos, vi estos griza...
Nu! El ambaŭ ni... kiu estas la kolora homo?

La administrado

En iu entrepreno konkludis, ke taŭgas ŝanĝi kaj plibonigi administradan manieron kaj dungis novan ĝeneralan administradiston.

Tiu ĉi decidis de la bazoj ĉion kontroli kaj kun du asesoroj inspektis laŭ vico ĉiujn partojn de la entrepreno. Veninte en magazeno, li vidis, ke ĉiuj laboras, nur junulo staras dorse apogante la muron kun la manoj en la poŝoj.

Vidante bonan okazon elmontri novan laborfilozofion, la nova administradisto demandis al la junulo: „Kion vi gajnas por unu semajno?“

„Tricent eŭroj, kial?“ respondis la junulo sen scii, pri kio temas.

La administradisto elpoŝigis tricent eŭrojn kaj donis ilin al la junulo dirante: „Jen via salajro je tiu ĉi semajno. Nun vi malaperu kaj neniam revenu ĉi tien.“

La junulo prenis la monon kaj foriris laŭ ricevitaj ordonoj. La administradisto vidante ĝeneralan miregon diris: „Ĉu vi ne vidis kion li faris?“

„Jes, sinjoro,“ respondis bela junulino, „li liveris picon al ni por lunĉo.“

Konklude: Ekzistas homoj, kiuj deziras ordoni, sed ili forgesas pensi.

Diktaĵo

En ĉeĥa ŝtata televido oni envicigis programeron „Diktaĵo“. Ĝin oni dissendas dum la tempo, kiam infanoj ricevas atestilon duonjara kaj ĉe fino de la lernejjaro. Infanoj instigas gepatrojn por spekti ĝin, ĉar en lernejoj oni rekomendas tion.

Fama kaj ŝatata aktoro, reĝisoro kaj bona homo Zdenek Svěrak, legas la tekston, ne tro longan kaj gepatroj kaj interesuloj hejme skribas. Poste lingva fakulo kun Svěrak klarigas eblajn erarojn. Kaj imagu! Miloj de skribintoj obeas alvokon skribi al televido nombrojn da eraroj kaj notojn pri sia skribo por esploro.

Tiu ĉi ideo kaj ĝia realigo estas tre valora agado. Efike mildigas streĉon okaze de lernejoj atestiloj, ĉar gepatroj devas sincere konfesi, ke tute senerare skribi ĉeĥe oni neblas. Estas bone, ke oni vekigas intereson pri gepatra lingvo, kiu vere bezonas esti ĝenerale kulturata.

Svěrak diras: „**Reguloj ŝanĝas, memoro truetiĝas.**“

Se vi rimarkos nomon **SVERAK** rilate al filmo, teatro, televido, kredu, ke vi trovis ion pure ĉeĥan, ion altvalora.

Jindřiska Drahotová

El la lernolibro: ESPERANTO

de John Cresswell and John Hartley
tria eldono – 1987

Diversaĵoj el la tuta mondo

Grupe Trinki

La konduto de alkoholtrinkantoj rilate al iliaj ĉirkaŭuloj povus esti konata per la sanga grupo, laŭ esploro farita de la firmao Asashi Breweries Ltd, la unua japana bierfabrikisto. La esploro, farita pri specimena grupo el 2464 personoj, montras, ke la A-sangaj personoj atentis pri siaj ĉirkaŭuloj. La B-sangaj personoj male, ignoras siajn ĉirkaŭulojn, kiam ili trinkas alkoholon. La O-sanguloj bone rilatas al la aliaj dum ili trinkas. La AB-sanguloj estas duvizaĝaj: ili povas bone rilati al iuj ĉirkaŭuloj kaj indiferenti al aliaj.

Japana Rifuzo

Antaŭ multaj jaroj verkisto proponis novan verkon al japana eldonista firmao. La eldonistoj resendis la manuskripton, kun letero: Ni trovas vian verkon bonega. Sed se ni presus ĝin, Lia Imperia Moŝto legus ĝin kaj, leginte, li ordonus, ke ni neniam presu ion malpli bonan. Ĉar tio malhelpus, ke ni eldonu ion ajn dum almenaŭ dek mil jaroj, ni devas, kun profunda bedaŭro, resendiri al vi la manuskripton.

La Origino de la Bildkarto

Kvankam poŝtkartoj jam ekzistis de la jaro 1861, la bildkarto ŝajne ne „naskiĝis“ ĝis 1889. Kiam, en tiu jaro, oficiale malfermis la mondkonata turo Eiffel dum la Ekspozicio en Parizo, poŝtkartoj eldoniĝis kun bildo de la turo, kaj oni povis enpoŝtigi ilin ĉe la supro. Ekde tiam bildkarto estis popularaj, kaj la kolektado de ili baldaŭ disvastiĝis tra Eŭropo kaj poste tra la tuta mondo, aparte inter la esperantistaro. Ĝis 1902 oni rajtis skribi nur la adreson de la ricevonto sur la dorsoflanko de bildkarto, kaj iun mesaĝon oni devis skribi sur la bildon mem. Sed en tiu jaro Britujo permesis la dividon de la dorsoflanko per linio, kun unu duono por la adreso kaj la alia por la mesaĝo.

Kontraŭ Terorismo

En 1978 iu viro eniris bankon en Kalifornio, portante suspektindan pakon. La bankoficistoj, timante, ke en ĝi estas bombo, rifuzis tuŝi ĝin, kaj la supozata teroristo tuj fulme elkuris, je la granda trankviliĝo de la oficistoj. Ekster la konstruaĵo, tamen, apudstaranto vidis la fuĝanton kaj, kredante ke li estas rabisto, tuj postkuris kaj kaptis lin. Li reirigis lin en la bankon, sed kompreneble

Litova popola fabelo

El kongresaj materialoj UK en Vilno 2005

Du plugiloj

Forĝisto forĝis du plugilojn. La unuan aĉetis plugisto, kaj la alian komercisto.

La unu plugilo tuj komencis labori, sed la dua kuŝis tutan tempon en magazeno.

Poste la plugiloj renkontiĝis. La plugilo de la komercisto estis tute rusta, sed tiu de la plugisto brilis kiel arĝento. La plugilo de la komercisto demandis sian amikon: „Kial vi tiel brilas, dum mi estas tute nigra kaj rusta?“

„Ĉar mi laboris,“ respondis tiu ĉi, „sed vi kuŝis dum tuta tempo.“

Litovaj proverboj

Proverbo estas sperto, proverbo estas averto.

Kia kapo, tia ĉapo.

Kaprica fianĉino restas eterne fraŭlino.

Bona paro por altaro.

Feliĉo hodiaŭ karesas, morgaŭ forgesas.

Feliĉo fierigas, malfeliĉo saĝigas.

Valoras ne vesto, valoras enesto.

Edziĝo najbara garantias de eraro.

Geedzoj en paco vivas en reĝa palaco.

Ploranton ni evitas, ridanton ni imitas.

Kiu ridas eliranta, ploras revenanta.

Kiu ŝatas moneron, ne ŝatas veron.

Riĉeco sen gvido, kiel ĉevalo sen brido.

Fluidaĵo sen difino, nek vinagro nek vino.

Kiu kaĉon aranĝas, tiu ĝin manĝas.

Kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi tiras.

Leciono al profesoro estas vana laboro.

Al feliĉo kaj gloro kondukas laboro.

Ĉiu tago kun sia ago.

Tradukis Petras Ĉeliauskas.

Memorhelpiloj de Matthias Behlert

El Litova Stelo (143) 1/2002

Mia instruisto pri geografio en baza lernejo tre ŝatis enkapigi al ni verketojn, kiuj enhavas lernendajn donitaĵojn. En germana oni nomas tiajn rimaĵojn „Eselbrücken“ – azena ponto. Ilia encerbiga efiko estas enorma; ekzemple, pro unu el ili mi memoras ĝis nun la sep nomojn de riveretoj, kiuj en Germanio enfluas en Danubon (eĉ de kiu flanko ili enfluas).

Mi intencas elpensi pluajn tiajn „azenajn pontetojn“ por iam aperigi ilin en libreto (laŭeble kun desegnaĵoj aŭ fotoj de koncernaj objektoj). Volonte mi kunlaboros en ĉi tiu afero kun aliaj samideanoj.

Matthias Behlert, Nehringstrasse 4, DE-14059 BERLIN, Germanio Greno

Kiel nomiĝas la plej grava greno?

Tritiko, sekalo, hordeo, aveno!

litove:

kviečiai, rugiai, miežai, avižos

pole:

pszenica, żyto, jęczmień, owies

france:

blé, seigle, orge, avoine

ĉeĥe:

pšenice, žito, ječmen, oves

ruse:

пшеница, рожь, ячмень, овёс

germane:

Weizen, Roggen, Gerste, Hafer

angle:

wheat, rye, barley, oats

Koniferoj (pinglarboj)

Se dumvintre sur branĉoj la pingloj postrestas –

Abio, piceo aŭ pino ĝi estas.

Se aŭtune la vento ĝin ekas malvesti –

Sendube **lariko**, nur ĝi povas esti.

litove:

Kėnis, eglė, pušis, maumedis

pole:

Jodła, świerk, sosna, modrzew

france:

sapin, épicéa, pin, larix

ĉeĥe:

jedle, smrk, borovice, modřín

ruse:

пихта, ель, сосна, лиственница

germane:

Tanne, Fichte, Kiefer, Lärche

angle:

fir, spruce, pine, larch

Se plaĉus al la dia graco prilaboris Jacques Tuinder

Saĝa homo venigis tajloron kun peto fari por si novan pantalonon. Farinte mezuradon, la tajloro promesis pretigi ĝin, se plaĉus al la dia graco, en malpli ol septaga tempospaco.

Pasis semajno. Kaj sekve la servisto de la saĝulo veturis al la tajloro por preni la pantalonon. Sed diris la tajloro: „Okazis, ho ve, malgranda prokrasto. Sed, se plaĉus al la dia graco, morgaŭ la pantalono nepre estos preta.“

Tagon poste tajloro sin denove senkulpigis, dirante: „Mi bedaŭras, ke la pantalono ankoraŭ ne estas finkudrita. Revenu morgaŭ kaj, se plaĉus al la dia graco, ĝi tiam certe estos en via posedo.“

Pasis denove tago, kaj post iom da pensado la saĝulo sufloris al sia servisto: „Se ĝi denove ne estos preta, demandu al li, kiom longe daŭrus, se lia laboro ne plaĉus al la dia graco.“

El kongresa numero DIA REGNO n-ro 5 (848) septembro-oktobro 2004.

Morto, kie estas via venko?

Ho morto, kie estas via venko? Ho morto, kie estas via pikilo? La pikilo de la morto estas la peko; kaj la forto de la peko estas la leĝo; sed danko estu al Dio, kiu donas al ni la venkon per nia Sinjoro Jesuo Kristo.

1 Kor 15:55-57

El la sama numero de Dia Regno.

Denove pri la dialogo

En unua Legolibreto oni trovas paĝon pri demokrata dialogo. Ni prilaboris ĝin en Ĉeĥa paradizo dum lingva seminario. Nun ni en Ĉeĥio vivas en la demokratio tiel longe, ke tio sufiĉus por preskaŭ maturiĝo de la homo. Dume ĝeneralaj opinioj iom ŝanĝiĝis. Jen frazoj pri komunikado, kiuj gvidas al sukceso samtempe:

1. Komencu ĉiam amikeme. Oponentulon ne akceptu kiel malamiko, sed kiel partnero por serĉo de la vero.

2. Tamen ne restu amikema, se partnero, oponentulo, ne kondutas honeste. Ne estu malamikema, sed ne estu naive stulta.
3. Ne atendu senpacience ion interesan – serĉu la intereson en ĉio kion vi faras kaj travivas.
4. Se iu perfidos vin unuan fojon, povas temi pri lia intenco, se li perfidos vin duan fojon, temas pri via eraro.
5. La monon vi perdos multfoje, amikojn penu perdi plej malmulte, kredon kaj esperon perdu neniam.
6. Lerni el propraj eraroj doloras, sed efikas. Lerni el eraroj la aliuloj estas ankaŭ efika kaj ne doloras.
7. Rigardu homojn ĉirkaŭ vi kaj regule demandu al vi mem: Kiel mi povas simili al ili? Kiel mi povas proksimiĝi al ili? Se ili havas en iu flanko pli ol mi, ĉu mi povas havi en alia flanko pli ol ili? Se ili povas, kial mi ne povus?
8. Pendu sloganon ĉe via tablo, aŭ en banejo sur spegulon: „Nenio estas neebbla, se mi mem persone ne konvinkus pri tio“. Vi baldaŭ ekscios, ke eblaj estas aferoj dekoble pliaj, ol vi origine pensis.
9. Serĉu en vi mem regule obstaklojn kaj senkompatate forigadu ilin. Jen, vi vivas en tre interesa tempo, grava – rompuma. Multaj aferoj antaŭe pasis glate, sed nun vi ne devas esti ventanima – la tempo alportas minacojn. Adaptu vin, harditu vin! Antaŭe estis iaj aferoj neeblaj, sed nun ili facile estas. Ĉu vi konsideras tion? Ĉu vi daŭre opinias, eble malkonsidere, ke io estas permesite? Ĉu vi ne perdus per tio ŝancon?
10. Ne miru pri malsaĝeco kaj mallogikeco de homaj emocioj. Akceptu emociojn, eĉ malbonajn, kiel bonega ŝanco por estonto.
11. Akceptu malsukcesojn. Akceptu sukcesojn kun humileco.
12. Ĉiu nova homo en via vivo estas via ŝanco lerni vin.

Laste: Se vi estas virino, ne ofendu aŭtoron de ĉi tiuj frazoj, ĉar li direktis konsilojn al viroj. Li nur ne volis uzi tiujn stretekojn li/ŝi, li ŝatas virinojn almenaŭ same kiel viroj kaj helpas al ili per sama forto kiel al viroj.

La aŭtoro David Gruber estas instruisto de komunikado.

František Vladimír Lorenc

estis universala spirito, ekzemplo de laboro kaj amo. Li apartenis en la vicon de niaj ĉeĥaj eminentuloj, kiuj malproksime, transe de oceano kreis elstaran kulturen pecon.

Li naskiĝis la 24-an de decembro 1872 en vilaĝo Zbyslav ĉe Čáslav en familio de mueleja laboristo. En siaj kvinaj jaroj li legis kaj skribis. Kiel

dekkvinjara li regis Volapukon – unuan praktike uzitan artefaritan lingvon, fondita de prelato Martin Schleyer – kaj baldaŭ en ĝi verkis lernolibron pri la rusa lingvo. Li perlaboradis monon per instruado de studentoj kaj obstine lernis pli kaj pli da lingvoj modernaj eĉ antikvaj kaj en aĝo de 17 jaroj (1889) li okupiĝis per la cigana, tradukis el la hebrea, sanskrto kaj renkontiĝis kun Esperanto kaj forlasis Volapukon. 1890 li eldonis proprakoste en presejo F.Hoblík en Pardubice esperantan lernolibron, kiu havis 27 paĝojn.

Kiel studento li kontribudis en studentajn gazetojn, konis ĉiujn slavajn lingvojn, la grekan kaj la latinan eĉ la ĉinan de kiuj li publikis. Por sia propra plezuro legi „Predikon sur Monto“ de Jesuo en originala lingvo, li eklernis la aramean. Li fariĝis ĵurnalisto kaj translokiĝis al Prago, kie komencis instrui Esperanton 1891-1893 en gastejo U Pštrosů. (Tamen unua E-klubo en Prago estis fondita nur en 1902.)

Inter gejunuloj li fervore agadis en socialismaj medioj. Li partoprenis en redaktado de la revuo „Omladina“ kaj strebis, ke la lingvo esperanto fariĝu lingvo de progresema laboristoj. Ĉar li estis suspektata de aŭstria polico pri konspira agado kaj minacis lin trijara soldatservo en aŭstria armeo, li en septembro 1893 fuĝis en Brazilon kun grupo de ĉeĥaj metiistoj, pretaj fondi laborkolonion je kosto de brazila ŝtato. Li ricevis dokumentojn hazarde de viro, kiu lastmomente decidis ne iri mondon.

Sed en tiu tempo en Brazilo okazis revolucio kaj planoj de ĉeĥaj koloniistoj disfalis. Unuaj jaroj estis por Lorenc malfacilaj. Li laboris kiel masonisto, ministro, kamplaboristo, poŝtisto, arbohakisto, sed senĉese li lernis lingvojn.

En la jaro 1899 li edziĝis kaj translokiĝis en urbon Porto Alegre, ĉefurbo de la ŝtato Rio Grande do Sul, kie havis laborpostenon de interpretisto. Poste la sorto forpelis lin en la urbon Feliciano, kie fondis propran privatan lernejon, kiu poste fariĝis ŝtata. Tie li laboris ĝis sia emeritiĝo en la jaro 1942.

Krom la instruista profesio li okupiĝis per okultismo, spiritismo, kiromancio, lingvistiko, homeopatio, apologio, poezio, astronomio, magnetismo, sugestio kaj medicinaj herboj.

Dum sia vivo Lorenc studis 104 lingvojn. Li sciis dudek du indiĝenajn lingvojn. Portugallingve li verkis „Libron pri J.A.Komenio“ kaj tradukis „Labirinto de la mondo“. Ankaŭ partojn el evangelio de Mateo al 70 lingvoj. Lia portugala lernolibro de Esperanto estis multfoje eldonita. Perfekta estas traduko de Hbagavadgita (sankta libro de hinduismo) al la portugala kaj Esperanto. Li estas ankaŭ aŭtoro de poemaro „Diverskolora bukedo“, spiritistaj verkoj „Voĉoj de poetoj en la Spirita mondo“. Tre ŝatata kaj honorata estas lia „Sistemo de stenografio“ por portugaloj kaj lia „Hejma kurac-receptaro“, kiu estis multfoje reeldonita. Sume estis eldonitaj 85 liaj verkoj, 33 restis neeldonitaj.

F.V.Lorenc estis kromordinare inteligenta, laborema, diligenta. En Brazilo li estis vera pioniro de Esperanto. Multaj brazilaj kluboj portas lian nomon, eĉ unu eldonejo portas nomon „Lorenz-Instituto“.

Interesa estas fakto, ke li havis 13 proprajn infanojn kaj 13 adoptitajn, el kiuj duono loĝis ĉe sia adopta patro kaj duono venadis por manĝi ktp. La unua edzino Ida mortis, kun la dua edzino li havis neniun infanon.

F. V. Lorenc mortis la 24-an de majo 1957 en simpla dometo en Porto Alegro.

Li estis homo, kiu en sia vivo ne celis rekompencan, plaĉis al li doni, doni senzorge.

Laŭ la „Informilo“ – monata revuo de Asocio de Esperantistoj Handikapuloj Ĉeĥio.

Eĉ ĝentileco iam kulpas...

En iu belega somera tago alveturis en nian urbon inĝ. Fred Mawson el Anglio, bonega esperantisto, spertulo pri ĉeĥa muziko (Smetana, Dvořák ktp.). Preskaŭ samaĝa Jindřich, ankaŭ sperta esperantisto, akceptis inviton de esperantisto Miloš viziti lian kabanon, lokita en la valo, proksime de Česká Třebová. Miloš transdonis ŝlosilon de la kabano al Jindřich kaj tiu kun Fred veturis per aŭtobuso. Miloš kun mi prenis refreŝaĵon kaj ni sekvis ilin piede. Subite Miloš ekkriis: „Mi forgesis atentigi Jindřich-n, ke tuj post la enirpordo de la kabano troviĝas malfermita pordo-klapo en la kelon!“

Kaj tuj ni rapidis kaj ambaŭ ni ege timis. Alveninte al la kabano ni aŭdis el interne laŭtan ridon. En la kabano sidis sur la benko Fred kaj Jindřich kaj ambaŭ ridegis. Kial? Kiam ili ambaŭ venis al la kabano, Jindřich malfermis la enirpordon kaj diris al Fred: „Bonvolu eniri.“ „Ne, nur post vi,“ respondis Fred. „Vi estas nia kara gasto, bonvolu eniri!“

Poste sekvis ambaŭflanke kelkaj ĝentilaj frazoj kaj la kabanon eniris kara gasto Fred, kiu tuj falis en la kelon! „Feliĉa“ falo en la kelon restis sen vundigo kaj ambaŭ maljunuloj ege sincere ridis. Kaj post refreŝigo eĉ pli!

Bedaŭrinde, Fred, Jindřich eĉ Miloš jam troviĝas en esperanta ĉielo, sed instruo, kiel en fablo, restas: „Ĝentileco ne ĉiam estas konvena.“

J. Pištora, Ĉeĥio

Informilo majo 2005, kol. 241/21

Monata gazeto de E-Handikapuloj

Tra la arbaro

el „VESPERTO“ – monata gazeto de Apati Kovacs Béla, Hungario

Konkursataŝko:

Georgo jam piediris du tagojn. Apenaŭ li ripozis iomete. Ĝis vespero li volis atingi la urbon, sed ĝi ankoraŭ estis malproksime.

La vojo kondukis tra granda arbaro. Forlasante la grenkampojn li haltis ĉe la rando de la arbaro, ĉar li havis malbonan antaŭsenton.

La arbaro estis malhela kaj timiga, bonega kaŝejo por rabistoj kaj krimuloj. Krom tio lin ege ĝenis la silento, kiu ĉirkaŭis lin. Nek birda pepado, nek homa bruo estis aŭdebla.

Georgo hezitis, ĉu eniri aŭ ne? Li nepre devas daŭrigi la vojon, ĉar ĝis vespero volas atingi la urbon. Almenaŭ li vidintus vilaĝanojn... Alifoje li ĉiam renkontis ilin vagante sur la kampo. Li volonte babiladis kun ili pri la mondo kaj ĉiutagaj aferoj forgesiĝante pri la tempo.

Sed nun tiu ĉi silento frenezigas lin. Li ne sciis, kio estos trovata en la mistera arbaro.

Georgo ekiris. Li iris malrapide apenaŭ trovante la vojon en la arbaro, ĉar la arbustoj kaj la branĉoj de la arboj kovris ĝin. fine li ekvidis la mallarĝan vojeton. Ĉiu paŝo estis laciga kaj timiga. Malgraŭ tio, ke ankoraŭ estis tago, en la arbaro estis preskaŭ nokta malhelo.

„Dio mia!“ li murmuris, „Nur nun min evitu la diablo! Plurfoje mi ne enpaŝos tiun ĉi arbaron.“ Li povis iri tre malfacile pro la obskuro kaj la pikaj arbustoj, kiuj ĉiuforte pikis lian korpon. Mem la infero estis irado en la arbaro kaj ankoraŭ li nevidis ĝian finon. Kvazaŭ ĝi estus senfina arbaro.

Li jam eble iris duonhoron, kiam en la malproksimo li ekvidis lignan dometon. Li direktis siajn paŝojn al la dometo. Li ne sciis kial, sed io tiris lin en tiun direkton. Esktere la ligna dometo ŝajnis forlasita. Ĝiaj fenestroj kaj pordo estis fermitaj. Ĉirkaŭ ĝi estis malnova barilo el ligno. Sur la korto estis alta herbaĉo sugestante, ke tie loĝas neniu. Tamen de la malantaŭa parto de la konstruaĵo estis aŭdebla hundobojado. Alveninte tien li rimarkis, ke la hundo estas ligita kaj antaŭ ĝi sur la telero estas la manĝaĵo antaŭ nelonge metita tien.

„Ĉu vi?“ demandis Georgo al la hundo, kiu estis bela, blanka besto, „Kie estas via mastro? Ne eble, ke vi tie ĉi vivas sola. Ĉu ne?“

La hundo amikeme svingadis sian voston, kvazaŭ ĝi dirus al Georgo, ke ĝi komprenas liajn vortojn kaj bonkore akceptas la fremdulon.

„Kiu alvenis, Bodri?“ aŭdiĝis juna virina voĉo ene en la domo. Georgo surprigiĝis.

„Kiu alvenis, Bodri?“ (Bodri estas hungara hundonomo) aŭdiĝis denove el la domo. La hundo nur ekbojis kaj je tio en la pordo ekaperis admirinda, blonda virino en loga somera robo.

„Estu salutata!“ ŝi diris afable al Georgo, kiu apenaŭ povis ekparoli pro surprizo.

„Bonan tagon, sinjorino! Mi estas nur vagabondo, kiu trairas arbaron kaj mi ekvidis la domon. Mi volas nur ekriprozi iomete, sed pardonu min, se hazarde mia ĉeesto estus ĝena por vi.“

„Oh, tute ne. Mi jam atendis vin. Bonvolu enveni!“

Do, ek al la laboro! Finigu la rakonton! Mi atendas vian konkursaĵon!

Georgo envenis. En ĉambro estis mallume. Mankis meblo. Nur en angulo lumis io, kion Georgo ne konis, neniam vidis ion simila. Kvadrata ekrano. Sur ĝi li ekvidis korton kun rideta Bodri. Georgo alpaŝis al la ekrano kaj volis tuŝi la hundon, sed la hundo malaperis kaj Georgo alpaŝis vojeton, kiu gvidis lin al proksima pli larĝa vojo arbara. Tie atendis lin stranga ĉareto kun brilantaj metalaj teniloj kaj bruas delikate. Georgo komprenis, ke la ĉareto durada kun luksa selo invitas lin por sidiĝi, same kiel li sidadis sur junan ĉevaletan. Tuj, kiam li eksidis, la forta bruo akompanis rapidan movon de la ĉareto direkte al pli kaj pli larĝa vojo, kiu ŝanĝiĝis al kelk vojoj apud si limigitaj per blankaj linioj. Subite aperis domoj similaj al altaj muroj kun dek miloj da fenestroj kaj pli kaj pli ili proksimiĝis kaj Georgo pensis ke li baldaŭ disrompiĝos kun sia brilanta metala ĉevaleta kontraŭ ili. Sed li rimarkis ke plu ne tenas en siaj manoj tenilojn, sed radeton, nigran radeton similan al stranga potkovrilo kaj malgrandaj brilaj lumiletoj estas antaŭ li. Kiam li estis proksime de muregoj, li vidis ke la muregoj estas vitraj kaj kun timo li fermis okulojn kaj atendis kolizon kun mortaodoro. Sed tio ne okazis. Kiel mirakle lia ĉaro trovis pordegon kaj kun fajfo komencis zigzagi inter stratoj ĝis larĝa placo. Tie la ĉaro silente haltis kaj la silento puŝis la orelojn de Georgo. Li gapis al lumigitaj palacoj kaj lin gapis miloj da homoj. Tio ne daŭris longe. Ĉar la bruego denove ekis, nun tondre kun tuja ventego. Li stumblis tra ŝtupareto por kaŝi sin en ĉambreton, kie estis nur unu brakseĝo, kiu lin akceptis kaj ĝi zonigis firme lin. Georgo fermis okulojn kaj atendis sian finon. Bruego iom post iom mildiĝis kaj Georgo singarde malfermis unu okulon. Antaŭ li estis lumigita ekrano kaj sur ĝi ridis al li svingante voston Bodri.

Sama okazaĵo ripetis, ĉiam kiam Georgo volis tuŝi la Bodrin, nur ĝis Georgo ekaŭdis rideton de virino, kiu malfermis fenestrojn, enmanigis al Georgo falĉilon kaj diris: „Iru falĉi urtikojn ĉirkaŭ la domo, mi jam komencis kuiru terpomojn por supo, poste ni vespermanĝos“.

Mira Vaněk, Ĉeĥio.

Ankoraŭ ion da eldiroj:

Neniam estas certe, kiu pravas, sed ĉiam estas certe, kiu estas ĉeĥo.

Sen amikoj oni ne sentas feliĉon, sed sen malfeliĉo oni amikojn ne trovas.

Danke al Jarlibro

Jarmila Rýznarová, Ĉeĥio

Pezaj nuboj akumuliĝis sur la ĉielo tiun decembran matenon en la jaro 1939, kiam la panjo de la malgrandaj Jarmila kaj Ladislav en kellavejo lavis tolaĵojn por la familio. Tiutempe tia laboro estis pli komplika ol nun. Tiu ĉi laboro por kvarnombra familio postulis en ĉiu dua semajno preskaŭ tutan tagon en kellavejo.

Montriloj sur horloĝo montris ĵus la dekan, tamen la laboro de la panjo estis eĉ ne duonpreta. Panjo subite eksentis grandan lacon kaj nekutiman nervozon. Tre ofte ŝi komencis ĉesadi sian laboron kaj rigardis la pardonon, kvazaŭ iu starus en ĝi. Ne, neniŭ estis en la lavejo kun ŝi, tamen vana estis ŝia klopodo plu normale labori. Kio okazis? Kiu pensas pri ŝi? Ĉu ŝi komencas freneziĝi? Ĉu la infanoj en lernejo estas en ordo? Ĉu io okazis al ŝia edzo Jan, ĉu li pensas pri ŝi?

Ŝi ne povis elteni en la kelo. Trakurante pluajn kelojn, ŝi konvinkiĝis, ke neniŭ estas proksime. Preskaŭ transflugis ŝtuparon por atingi loĝejon en la unua etaĝo. Senspira ŝi levis telefonaŭdilon kaj vokis oficejon de sia edzo por aŭdi lian voĉon. En la telefono ekparolis kolego de ŝia edzo tremvoĉe: „Vian edzon ĵus forkondukis du gestapanoj.“

La panjo, tiun ĉi tagon, ne finis la lavadon. Ŝi estis proksima al kolapso, sen forto, sen ia espero. Ŝia edzo estis inter tridek viroj, kiujn la saman tagon forprenis gestapo. Sed kial? Kial? Ŝi ne sciis kialon.

„Kun etikedo „familio malamika“ kiel ni vivos? Ĉu mi trovos laborlokon por vivteni la familion anstataŭ mia edzo? Ĉu la edzo revenos sana, ĉu li eltenos ĉion? Se gestapanoj venos ankaŭ por mi, kiu prizorgos la infanojn??“

Kiu povus respondi tiom da demandoj? Nur gepatroj klopodis trankviligi ŝin helpante laŭ siaj ebloj en tiu malbona situacio. Naziismo furiozis en la tuta lando. Ĉiutage estis arestataj pluaj homoj pro tiel nomata ŝtatperfido. Najbaroj kaj konatuloj timis kontakti kun familio, se iu el ĝi estis arestita.

Multaj homoj ne revenis hejmen kaj multaj el ili estis trenitaj en gaskamerojn. Sed feliĉe en la jaro 1943 la edzo Jan, post kvar jaroj revenis hejmen malsana kaj malforta. La puno okazis pro skribmaŝina multobligado de kontraŭfaŝismaj flugfolioj. Gestapo ordonis, ke panjo devas pagi duonprezon de la tuta kvarjara loĝado kaj vivteno en prizonulejo, ĉar li estis liberigita. Do, la familio perdis belan koncertan pianon, tajpmaŝinon, valorajn bildojn kaj ĉiun monon el ŝparbanko.

Ses turmentaj jaroj de la dua mondmilito pasis. Iom post iom ĝiaj sekvoj mildiĝis kaj trankviliĝis kaj la ĉeĥa nacio komencis libere labori per ĉiuj siaj fortoj kun espero je pli bona vivo en mondopaco.

Sed transiro al socialisma reĝimo alportis pluajn malfacilaĵojn. Negrandaj privataj vendejoj, metiejoj, fabriketoj estis naciigitaj kaj monreformo okazis 50:1. Frato de panjo, loĝanta en Prago ne repaciĝis post naciigo de sia eksportentrepreno. Lin oni lasis labori nur kiel provizoran estron ĝis tempo, kiam nacia komitato akceptos iun pli konvenan homon, prefere de la laborista deveno. Kiam panjo intencis lin viziti neatendite kun siaj infanoj, trovis lian vilaon ĉerande de Prago malfermita, malplena. Najbaroj klarigis al ŝi, ke la frato kun edzino fuĝis eksterlanden kaj ekipo de la domo estis disŝtelita. Nur en angulo sub fenestro restis granda malnova kofro plena de albumoj el lia junaĝo. Ektimo kaj konsterniĝo en nia familio estis terura. La frato nenion diris aŭ skribis, por ke la familio ne havu ĝenaĵojn. Precipe gepatroj malbone sentis perdon de la filo: ĉu eblas, ke jam neniam ili ekvidos lin? Ĉu li revenos post jaroj en patrujon? En kiu lando nun li vivas kaj kiel li fartas? Kaj aliaj pensoj akompanis iliajn mensojn dum longa malĝoja tempo senĉese.

Intertempe la infanoj de la panjo plenkreskis kaj finis faklernejojn, trovis okupojn. Ladislav fariĝis elektrikisto, Jarmila laboris en elektroentrepreno kiel oficistino. Tie ŝia koleginino ricevis belajn bildkartojn, kiujn dum liberaj momentoj ili komune rigardis. Koleginino korespondis pere de internacia lingvo Esperanto kun la tuta mondo. Jarmila dum rigardo sopiris scii en kiu lando loĝas ŝiaj geonkloj nun.

Post ia tempo la geavoj de Jarmila ricevis bildkarton el Bombajo kun kvar vortoj: Srdečný pozdrav posílá Mirek - Koran saluton de Mirek. Kiel grandan feliĉon ĝi kaŭzis! Ilia filo vivas! Jes, malproksime! Sed lia skribmaniero estas senduba. Sen readreso... Kiamaniere ligi kontaktojn? Certe li ne skribis pli multe pro timo ne malbonigi situacion de la gepatroj kaj parencoj.

Foje la koleginino de Jarmila alportis krom belaj eksterlandaj broŝuroj kaj bildkartoj ankaŭ malgrandan libreton kaj rakontis, ke en ĝi troviĝas delegitoj de UEA kun precizaj adresoj kaj telefonnumeroj el 80 landoj. Delegitoj senpage helpas al aliaj esperantistoj solvi dezirojn kaj problemojn. Neniu alia asocio havas similan tiel eminente organizitan reton de delegitoj en tiom da landoj.

Jarmila kun granda intereso foliumis libreton, kiu nomiĝis Jarlibro 1953 kaj trovis landon Hindujo. Leginte pli atente, ŝi trovis urbon Bombajo kaj nomon kaj adreson de la delegito. Tuj ekkreskis ŝia intereso, kiam koleginino konsentis kun propono komuniki al tiu delegito pro helpo serĉi la onklon.

Jarmila decidis eklerni Esperanton. Ŝi komencis venadi ĉiusemajne en esperantan klubon kaj ŝia afabla instruisto povis baldaŭ laŭdi ŝian diligentecon. Post du monatoj li helpis al ŝi skribi unuan leteron al delegito de UEA al Bombajo.

Ses monatoj pasis, la sopirata letero ne venis. Jarmila ekkorespondis ankaŭ kun aliaj esperantistoj en aliaj landoj por perfektigi sian lingvoscion. Sed

subite venis bildkarto el Bombajo kaj sur ĝi nur unu frazo: adreso de sinjoro Smith. Ĉu la nomo estas ĝusta? La onklo nomiĝas Skácel. Ĉu li devis ŝanĝi nomon? Jarmila preferis diri hejme nenion, ĉar ŝi ne tro kredis, ke la adreso estas ĝusta. Tamen ŝi kreis leteron, la instruisto nur iomete helpis, kaj la letero estis forsendita. Ĝi enhavis proponon por reciproka korespondado kaj priskribo de Jarmila kaj la tuta familio.

Proksimume post tri monatoj Jarmila ricevis leteron kun fotoj el Bombajo. Ŝi tre ĝojis pri tio kaj surprizis la familion. La familio estis feliĉa.

Eble vi demandas, ĉu sinjoro Smith konis Esperanton. Memkompreneble ne. El pli postaj leteroj Jarmila eksciis, ke post alveno de unua letero la onklo vizitis delegiton de UEA, kiu tradukis la leteron.

Preskaŭ unu jaron tiamaniere ili interŝanĝadis la leterojn kaj dumtempe la situacio pliboniĝis kaj ĉeĥoj jam povis korespondi per sia propra lingvo kaj geavoj povis mem skribi al sia filo.

Geonkloj Smith translokiĝis de Bombajo al Aŭstralio. La onklo laboris sur grandaj ŝipgruoj. Liaj interesaj leteroj similis romanojn, kiuj proksimigis vivon en tiu fora lando al la tuta geparencaro.

Sed la familio neniam plu revidis la onklon kun la edzino. Ambaŭ jam mortis en fora lando.

Kaj jaroj pasis... pasis... Jarmila plu restis fidela al la internacia lingvo, kiu firme enmiksiĝis en ŝian vivon. Ŝi ekamis ĝin, eĉ same ŝia propra familio, kiun ŝi kreis. La ideon de la internacia lingvo ŝi disvastigas plu senlace.

Ne ĉio brilanta estas diamanto

Per reklamo oni elspezas multajn monojn por briligii ion ajn, nur pro pli granda profito. Multaj homoj dediĉas ĉiujn siajn kapablojn por plifortigi ruzecon, kiu helpas tiri monojn el poŝoj de civitanoj kaj ne hontas uzi kion ajn. Sed tre modestaj estas informoj veraj kaj uzeblaj, eĉ indiko pri tuta netaŭgeco, nebono, eĉ danĝero de iu varo, tiajn fidindajn informojn oni trovas tute hazarde, malofte, malfurore. Reklamo brilas, kvazaŭ havus demokratian rajton trompi nin, mensogeti kaj maljuste profiti.

Brilo de reklamo estas tiel forta, ke ne permesas vidi pro ĝia lumego seriozajn kaj gravajn aferojn, eĉ ne fakton, ke grasan pagon je reklamo enhavas varo en sia prezo. Do, reklamo estas tumor, nutranta sin per prezo de varo.

Sed estu pensemaj. Ĉiu afero havas du flankojn, kiel pano, kiun ni manĝas. Ĉu Esperanto povas sukcesi en nia reklamriĉa socio per niaj modestaj informetoj pri sia revolucia valoro? Ankaŭ ĝi bezonas brilon de reklamoj, sed ne

plenumas kondiĉon: doni ian profiton tuje al tiuj profesiuloj de furoro. Tamen, tiuj profesiuloj kapablas vendi la aeron, akvon de maro, sukajn promesojn... ĉion ajn... kaj slogano, ke bona varo laŭdas sin mem jam delonge ne valoras. Eble la Esperanto ne donas profiton, sed ĝi certe ŝparas. Do, ĝi estas konvena por homoj modestaj, kiuj ne volas elspezi, aĉetadi, ekspluati naturon, volas plidaŭrigi servojn de aparatojn, domojn, ilojn... eĉ propran vivon.

Mi vere pensas, pensas, sed solvon mi ne trovas. Por solvo oni nepre bezonas racion. Do, mi pri tio volis diskuti en rondo de samideanoj, pli da kapoj pli scias.

Iu el nia rondo donis al mi pri tio enigmon: „Kio estas verŝajne en la mondo en sufiĉa kvanto?“

Onidire: „Racio, neniu plendas, ke mankas al iu“ kaj direkto de la debato misiris al problemo pri ŝi/li, li/ŝi, ŝli, liŝi, il kaj ŝaŭli.“

Kaj nun ion faru!

J.Drahotová Ĉeĥio

Songoj

Ĉestmír Vidman

Suferigas min tri handikapoj: mi malbone vidas, mi malbone aŭdas, mi malbone paŝas. Sed dum nokta dormado estas ĉio alie. Mi estas kapabla fari mian ŝatatan okupon – la legadon. Anticipe mi diras, ke averaĝa nombro de miaj tralegitaj libroj estis 150 jare. En la songo (ĉu tio estas songo instigita per profunda **deziro** ?), mi senbare tralegas dikan libron. Mia koro estas plenigita de ĝojo, ke neniu obstaklo estas plu en ĉi afero; sed oni devos tion resperti, kiam mi vekiĝos... Post la vekiĝo – kia embaraso!

Dum la muzik-festivalo „Praga printempo“ mi sidas en la koncerta salonego kaj ĝuas la muzikon – same kiel dum mia tuta vivo mi faradis. Denove – granda ĝojo, ĉar estas forigita mia nekapablo aŭdi. Kiel facile mi tion reĝuus post mia vekiĝo! Sed post la vekiĝo – kia seniluziigo!

Ankaŭ okazadas, ke irante preter sportstadiono, mi estas pelita de emo viciĝi inter la konkurantoj kaj kuri, kuri. Mi faras tion - ne daŭras longe – kaj mi jam kuras frunte, lasante ĉiujn post mia dorso, mi atingas la celrubandon – kaj jen, oni gratulas al mi kaj la tuta stadiono furiozas pro mia sukceso... Kia feliĉo esti movkapabla, eĉ tiel eminente! Morgaŭ mi devos trakti kun mia kuracisto, ke li preskribu al mi diversajn pilolojn kontraŭ ostopatio. Kial mi devas uzadi bastonojn por subteni mian operaciitan kokson. Superflua obstaklo en mia vivo, se mi tiel bone sportas. Tuj morgaŭ mi tion pritraktos kun li! Sed matene – kia turmentiĝo!

Okazis ankaŭ: mi staras sur podio, preta alparoli homamason... UK komenciĝas. Mi parolas per flua Esperanto, mi esprimas miajn pensojn kaj sentojn tiel arde, ke la salonego sonas per aplaŭdo. Ho – kia malpeziĝo, ke mi tiel senerare parolas Esperanton kaj ne devas morgaŭ iri kun timo al la esperanto-kurso por progresintoj, kie mi devas embarase rigardi en okulojn de nia instruisto samideano Werner. Kia ĝuo tiel flue paroli nian ŝatatan lingvon!

Kiam venis mateno, mi petis mian amikino: „Margit, ĉu vi povas prepari jenan rakonteton, por ke legantaro de Legolibreto III. komprenu miajn sentojn, miajn travivaĵojn, kiujn mi povas ĝui nur en **Skokovy**?“

En Skokovy, la 13-an de novembro 2005
pere de Margit Turková.

Ĉe la sennaciuloj

Laŭ Eŭgeno Lanti sennaciulo estas homo, kiu ne nur aprobas sennaciismon, sed plie sukcesis senigi sin je prefero por la lando, kie li naskiĝis kaj kies civitano jure kaj devige li estas, homo kiu havas geamikojn en ĉiuj mondpartoj kaj sopiras jen al Berlino, jen al Buenos Aires, jen al Moskvo, jen al Parizo, jen al Stokholmo, jen al Tokio, ktp.: homo, kiu scipovas pli bone Esperanton ol sian gepatran lingvon.

Iam en la jaro 1950 aŭ 1951, kiam mi vivis en la franca urbo Le Creusot, kaj laboris tie en fandej-forĝeja uzino, ni havis en nia ĉambro junan esperantiston Sobota el Slovakio. Antaŭ sia forveturo li donacis al mi „Klíč jazyka esperanto“ (Ŝlosilo de Esperanto por ĉeĥoj) kaj du adresojn de esperantistaj organizoj. Iu franco luis al mi sian montardometon izolitan en arbaro kaj tie mi komencis lerni nian lingvon.

Helpe de ŝlosilo mi skribis du leterojn. Unu al UEA en Londono, la duan al iom stranga adreso „Sennaciulo“ en Parizo, kaj kun senpacienca mi atendis la respondojn. Post kelkaj tagoj mia letero al Britio revenis kun mencio, ke tiu asocio jam ien transloĝiĝis. Sed el SAT-oficejo krom letero alvenis ankaŭ gazeto, kiun mi tuj abonis kaj librokatalogo de kiu mi mendis libron „Manifesto de la sennaciistoj“, kiu poste fariĝis mia sola lerno-libro.

Kompreninte ĉion, mi rememoris, kion rakontis al mi mia patro dum mia infanaĝo kaj mi trovis, ke la ideoj de Lanti kaj de mia patro estis preskaŭ samaj, kvankam la patro ne estis esperantisto.

En la jaro 1953 mi aliĝis al SAT.

En la sama jaro trafis min grava akcidento kaj pro miaj kripliĝintaj piedoj mi decidis la 4-an de januaro 1956 enplenigi mian valizeton kaj forveturi al Parizo. Post senhejmeca periodo kaj havinte diversajn laborokupiĝojn, mi komencis labori kiel metia prizorgisto en la granda hotelo Ambassador, deĵorante nur nokte, sen ia ajn escepto (ekde aŭgusto 1959 ĝis majo 1963).

Tio estis por mi la plej ĝuinda periodo de mia vivo, ĉar liberan tagon mi povis fruktedone uzi laŭ mia plaĉo. Forlasinte matene la hotelon, unue mi preskaŭ ĉiam iradis al SAT-oficejo por babili aŭ helpi al niaj amikoj Banje kaj Bartelmes. Nur posttagmeze mi enlitiĝis. Ĉiusabate okazis grupkunvenoj en la Laborborso, kaj ĉiudimanĉe ni renkontiĝadis ĉe nia amikino Susana, kiu nin gastigis en sia Meudon-arbaro. Venadis ankaŭ pluraj alilandanoj kaj neniu krokodilis.

Prave skribis Zamenhof en letero al Kofman (1901): „Se eĉ ĉiuj akademioj de la mondo akceptus Esperanton... nenio garantias, ke ĝi en la daŭro de unu jaro ĝi subite ne estos forĵetita kaj forgesita por eterne! Lingvo internacia fortiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiuj akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan.“

SAT ĝuste celas konsistigi tian homan grupon.

Adolfo Veselý, Ĉeĥio.

Vespero en silura maro

Pavla Zemanová Ĉeĥio

Super trankvila neprofunda golfo de varma silura maro malrapide krepuskiĝis. Vivo sur sabla fundo sinsekve perdiĝis tiel, kiel duonlumo ŝanĝiĝis en mallumon. Ĉion observis el sia kaŝejo trilobito duone enterigita en malgranda ŝlima profundaĵo. Ĝenerala trankvilo, kiu ekestis inter tago kaj nokto farigis ĝin apatia kaj ĝi elŝovis sian grandan segmentan korpon malrapide el kovraĵo de la ŝlimo. Ĝi devos trovi novan sendanĝeran lokon kun multe da nutraĵo kaj kie ĝi povos sen timo transatendi sekvan tagon. Ĝi malrapide kaj singardeme transpaŝis sablan ondon. Vivo de la nokto ankoraŭ ne komencis kaj vivo de tago preparis al dormo. Senzorgigita de kvazaŭa trankvilo ĝi ne rimarkis per siaj etaj okuloj grandegan malhelan ombron super si, la mortigan danĝeron por ĉiuj malpli grandaj animaloj. Tamen ĝi instinkte subkonsciis, ke io ĝenis senmovecon de la duonlumo. Subita doloro akompanata per grincado de mortanta pinĉilo senigis por momento ĝian kapablecon de defendo. Dum mallonga tempo ĝi tamen mobiligis ĉiun vivan energion, ke ĝi povu fuĝi. Ĉiuj ĝiaj muskoloj eklaboris, la korpo tordiĝis, sed la fortoj rapide malaperis. Ankoraŭ lasta provo kaj – finfine libereco. Kunpremo de „ruznorepo“ malstreĉis. Rapide en kaŝejon! La trilobito tute elĉerpita enteriĝis en delikatan sablon kaj ĝiajn sensojn vualis nebulo de elĉerpo. Restaĵoj de la vivo el ĝi forpasis kaj sorbiĝis en la sablon kune kun sango...

Super trankvila neprofunda golfo de la silura maro denove aperis suno kaj ĝiaj radioj tralumis akvon. La trilobito vundita de pinĉiloj de „ruznorepo“ ne plu

vidis ilin, sed ĝia korpo eĉ tra abismo de la tempo restis konservita por ni, kiel atestanto de pratempa vivo...

Bicikle eblas!

Spertoj kaj sciindaĵoj de translandlima biciklado – Jan Milld - Svedujo

La efektiva vojaĝo

Kiam la vojaĝplano estis klara, mi surpaperigis kaj multobligis ĝin por sendi ekzempleron, kune kun persona letero, al ĉiu el miaj elektitaj gastigantoj. Estis entute 13 lokoj: Berlino, Gross Leuthen, Hoyerswerda, Dresdeno, Usti, Prago, Zbraslavice, Kurim (apud Brno), Senica, Bratislavo, Győr, Sekesfehervar kaj Budapesto.

Respondojn mi ricevis de preskaŭ ĉiuj, nur mankis Usti. El la 12 respondoj 9 estis tute jesaj.

Mi kalkulis ke la tuta distanco estos proksimume 1160 kilometroj. De Malmö mi, laŭ plano, estis komenonta vespere la 10an de septembro 1991 kaj estis alvenonta al Budapesto la 5an de oktobro. La tagaj etapoj estis de 60 ĝis 160 kilometroj, kaj mi ordinare estis restonta 2 noktojn ĉiuloke.

Konsiloj

Nun al la konkludoj de mia vojaĝo. Kion eblas konsili kaj sciigi al aliaj verduloj, kiuj volas translime bicikli?

Ĝenerale

- Jam en rubriko de ĉi tiu kajero ni konstatis, ke eblas longdistance bicikli:
- Ø eĉ eblas tute ordinara biciklo, ne nepras havi amas-transmisian specialaĵojn
 - Ø nek necesas kolor-trikote vesti sin, kvazaŭ estaĵo el fremda planedo
 - Ø vi povas esti ordinara mezaĝulo, biciklado ne estas nur por junaj atletoj

1. Sed unu afero estas absolute nemalhavebla! Vi devas havi *fortan instigadon*, profunde senti, ke vi vere volas vojaĝi bicikle, ke vi pretas penadi, „streĉi la kruojn“.
2. Krome estas bezonata iom da planado kaj preparado. Antaŭ ĉio jam dekomence *dispecigu la distancon*, en taŭgaj tagaj etapoj!

3. Tria konsilo estas: *komencu kiel eble plej frue matene*, tuj, kiam ektagiĝas! Ju pli da horoj je via dispono, por disigi la bicikladon, des pli da eblecoj je paŭzoj. Tiam vi malpliigas la riskon ke la biciklado tro sentiĝas en la postaĵo.
4. Kvara nepraĵo estas, ke tamen vi devas *esti trejnita antaŭ ol komenci bicikli* al aliaj landoj. Faru almenaŭ kelkajn bicikladojn je distancoj de viaj planitaj tag-etapoj. Por samtempe altigi vian kapablon kaj kontroli ke via instigado estas sufiĉe forta.
5. Kvine gravas kompreneble, ke vi sukcesas kiom eble *limigi la pakaĵon*.
6. Same kompreneble *la biciklo devas esti en bona stato* antaŭ la komenco de la granda distanc-konsumado kaj vi devas kunhavi la plej necesajn *riparilojn*.
7. Sepe vi ne devas erari je la vojo, ĉar tiam via tempoplano povas esti tute nuligita. Pro tio nepras kunporti *bonajn mapojn!* Kaj uzi ilin.
8. Krome konsilindas ekipi la biciklon per *distanc-mezurilo!*
9. Naŭe konsilindas esti preparita ankaŭ por situacio, kie vi estas devigata piediri longan distancon. Tiam gravas *viaj ŝuoj* – ili devas esti tiucele taŭgaj! Do, ne tute novaj...
10. Fine gravas la tempo de la jaro por la biciklado.
Antaŭ la mezo de aprilo aŭ post la mezo de oktobro ne estas bone, ĉar tiam estas taglumo dum tro malmulte da horoj.
Dum la somero povas esti malavantaĝo ke estas tro varme aŭ ke tro multe da aliaj turistoj estas en moviĝo.

Do, la plej bonaj tempoj estas verŝajne *majo* kaj *septembro*.

Ĉiu esperantisto...

Rikardo Ŝulco „Sur vojoj de la Analiza Skolo“.

Ĉiu esperantisto konas la deksekan regulon, kiu permesas forlasi la finan vokalon de substantivo kaj de la artikolo kaj anstataŭigi ĝin per apostrofo. Neniu regulo permesas tion por la adverba „e“.

Tamen ekzistas sennombraj esperantistoj, kiuj senĝene diras kaj skribas **dank´ al**. Se oni tion tolerus, oni devus toleri ankaŭ: *help´ de*, *per´ de*, *rekt´ de*, *cel´ de*, *direkt´ al*, *escept´ de*, *flank´ de*, *kondiĉ´ ke*, *kun´ kun*, *laŭlong´ de*, *mal´ ke*, *mank´ de*, *renkont´ al*, *spit´ de*, *supoz´ ke*, *tut´ ne*... ... kaj sennombrajn aliajn analogiajn formojn.

Kun tiu „dank´ al“ Esperanto ĉesas esti lingvo bazita sur senescepta regularo. Oni ne diru, ke en „dank´ al“ la apostrofo anstataŭas substantivan „o“.

Neniu esperantisto dirus: „mi atingis tiun celon **danko al** mia penado“, sed ĉiu aprobus: „mi atingis tiun celon **danke al** mia penado“.

Ĉiu esperantisto ankaŭ konas la lastan frazon de la sesa regulo, kiu klare diras, ke la „prepozicio ĉe la pasivo estas de“.

Tamen iu „pliboniganto“ – mi metas la vorton inter citiloj – kuraĝe inventis prepozicion **far**, kaj multaj esperantistoj komencantoj, post unua ŝoko, kontentaj, ke ili estas lernintaj ion novan, uzadas ĝin. Ili vere ne scias, kion ili faras.

Same kiel „dank´ al“ ankaŭ tiu „far“ estas danĝera paŝo al la ĥaosigo de la lingvo. Kio okazos? Se la majoritato de la esperantistoj intuicie sentas la minacatan danĝeron kaj rezistos al tiu *far*, tiam ĝi estos baladŭ forgesita kaj malaperos el la lingvo. Alikaze ekestos skismo. Iuj ekuzos la novan prepozicion, aliaj evitos ĝin. Tio estos plua paŝo al la ĥaosigo de la lingvo. Krome estas notinde, ke ekzistas en ĉiu lingvo certa tendenco diferencigi la signifon de sinonimaj esprimoj. La gramatikistoj do baldaŭ vidos sin devigataj esplori kaj difini la diferencon uzon de „de“ kaj de „far“. La sekvo estos nova regulo kaj plikomplikiĝo de la lingvo.

Esperanto ja estas vivanta lingvo, sed pro tio ĝi ne ĉesas esti arte farita. Ĝi estas esence alia lingvo ol la etnaj lingvoj.

Kiel taŭga interkomprenilo laŭ mondvasta skalo ĝi devas esti ĉiam denove reguligata laŭ la Fundamenta gramatiko kaj logiko, por ke ĝi gardu sian senesceptecon kaj raciecon, kiuj ambaŭ kondiĉas ĝian belecon kaj kiuj estas necesaj por propagandi ĝin.

Ekskurso al Venecio

Materialo por partoprenantoj de 5-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso, aŭgusto 2002.

1. Origino

Ŝajnas ke ankaŭ dum la ekesto de Venecio, la veneciaj insuloj ne estis tute senaj de loĝantoj. Ĉar Kasiodoro, ministro de la ostrogota reĝo Teodoriko, parolante pri loĝantoj de tiuj insuletoj, asertas en sia letero el la jaro 538 p.Kr., ke ili vivas kiel „akvobirdoj“, duone surakve, duone surgrunde: fakte ili estas fiŝistoj, boatistoj, laboristoj de la salfarejoj.

Post nelonge, en la jaro 568 p.Kr. okazas migrado de longobardoj de nordaj landoj al Italujo.

Pli poste en la jaro 639 Oderzo (la antikva Opitergium) falas en manojn longobardajn kaj sekve de tio la sidejon de la bizanca guberniestro oni

translokigas de Oderzo al Cittanuova kiu de tiam alprenas novan nomon: ĝi estas nomata Eraklea, honore al la bizanca imperiestro Heraklio.

En la katedralo de Toĉello, estas memorŝildo sur kiu legiĝas la nomoj de la imperiestro Heraklio kaj de la ekzarko de Ravenna.

Do, la alveno de longobardoj forkurigas homojn ĝis tiam loĝintaj en Oderzo, Altino, Akvileja, kaj tiaj pravenecianoj serĉis rifuĝejon en la insuletoj de la estonta Venecio, kie jam estis „akvobirdoj“ de Kasiodoro.

En la jaro 810 Pipino, posteulo de imperiestro Karolo la Granda, atakas la loĝantojn de la insuletoj, sed ricevas ruinigan malvenkon. „Viaj insuletoj apartenas al mia reĝolando!“ diras Pipino. „Ni bedaŭras, karulo, ni preferas esti subuloj de la bizanca imperiestro kaj ne viaj!“ respondas la „venecianoj“ kiuj de tiam, translokigas la centron de sia establiĝo, de Malamocco al Rialto, pli facile defendebla.

Pro tio ke en la laguno preskaŭ ne estas plugebla grundo (multaj insuletoj aperas kaj malaperas laŭ la tajdo), la tieaj loĝantoj jam dekomence sin dediĉis al komercaj agadoj.

Tiutempe la kuireja salo estis altvalora kaj nemalhavebla varo, kiel hodiaŭ petrolo, kaj venecianoj ĝin produktis en siaj salfarejoj kaj ĝin vendis al la loĝantoj de la landinterno, resuprenirante riverojn per siaj boatoj.

Krom salo, estas alia varo kiun la aliaj popoloj longe ne sukcesis produkti: vitro. En Venecio la vitrofarejoj estis tiel multnombraj kaj poluaj (malpurigis aeron) ke aŭtoritatece oni ilin translokigis al insulo Murano.

Ankoraŭ Venecio ricevas konstrulignon kaj feron de Aŭstrujo kaj ilin transportas al la islamaj landoj, kiuj ilin ne havas.

Finfine abundan gajnon Venecio ricevas de spicoj: pipro, zingibro, safrano, cinamo, muskato, rabarbo, kariofiloj kaj aliaj. Precipe pipron oni ne konsideris nura rimedo por bongustigi manĝaĝojn sed ĝi estis vera strategia materialo; per pipro oni konservis viandon.

2. La doĝo

Jen la unuaj du doĝoj (apude estas la jaro de ilia elekto):

Paŭlicius Anafestus 697 p.Kr.

Marcello Tegalliano 717 p.Kr.

La lasta doĝo de 1789 ĝis 1797 (fino de la Tre Serena Venecia Respubliko) estis Lodovico Manin.

La periodo de 697 ĝis 1797 ampleksas 1100 jarojn, dum kiuj Venecio havis seninterrompan serion da 120 doĝoj kiuj eliris el nur 59 aristokrataj familioj.

En la sama periodo Venecio, danke al sia tre saĝa registaro, sukcesis plu teni sian sendependencon ĉu de eksteraj landoj, ĉu de internaj misintenculoj. La unuaj du doĝoj estis la nuraj, kiuj ricevis aprobon de la bizanca imperiestro, ĉiuj aliajn oni elektis sen ia konsento de eksteraj potencoj. Laŭ la honoroj, kiujn doĝo ricevas kaj la ekstera lukso en kiu li troviĝas, la doĝo povus simili bizancan imperiestron aŭ turkan sultanon. Sed efektive estas grandaj diferencoj inter la venecia doĝo kaj la orienta imperiestro aŭ la turka sultano. Unue li estas

elektita per tre komplika metodo, kiu antaŭvidas ne malpli ol dekon da operacioj. Krome, li tute ne estas kaj ne povas esti regnestro kun absoluta potenco. Tuj post la elekto oni legas al li la tiel nomatan „Giuramento de la Promissione“ (Ĵuro de la promeso) kiu listigas ĉiujn liajn privilegiojn, sed precipe ĉiujn limigojn kaj malpermesojn. Fakte la doĝo:

- ne povas proponi leĝojn por pliigi siajn povojn
- ne povas abdiki, krom se petite
- ne povas ricevi iun sen ĉeesto de siaj ses aŭ naŭ konsilantoj
- kiam li ricevas leteron de ambasadorojn li devas formuli la respondojn nur post konsulto kun siaj konsilantoj
- kiam iu serĉas paroli al li kvarokule, li estas devigita ŝanĝi paroladon
- li povas eliri el la doĝa palaco nur laŭ oficiala maniero kaj ne kaŝe
- li ne povas eĉ malfermi la leterojn de ambasadoroj formale al li adresitajn...

Nemirige ke kelkfoje la elektota doĝo, sentante la doĝecon kvazaŭ neeblebla kaj ĝena pezo, klopodis tion eviti, fuĝante.

Apud la doĝo sidas ses doĝaj konsilantoj (reprezentantoj de la ses veneciaj kvartaloj), kaj tri juĝejaj magistroj (Prokuroj de Sankta Marko). Pli ol konsilantoj temas pri kontrolistoj de la doĝo. Ili devas ne nur konsili, sed ankaŭ kontroli kaj admoni la doĝon, kaj tion ili faras plurfoje tute senĝene! Temas esence, pri aristokrata kaj oligarkia registaro, kaj tute ne absoluta povo.

3. La senato

Komence, proksimume en la jaro 1255, ĝi konsistis el 60 membroj („Consilium Rogatorum“ aŭ „Konsilio de la preĝpetintoj“, venecie „Consiglio dei Pregadi“ aŭ simple „Pregadi“), dum je la fino de la Respubliko, ĝi konsistis el 275 membroj ĉiuj elektitaj (krom doĝo, kun siaj ses konsilantoj kaj tri ĉefoj de la Kriminala Kvardekopo, kiuj estas dumvivaj). Praktike en la Senato estas la kerno de la politika potenco. Multoblaj estas ĝiaj funkcioj. Efektive ĝi okupiĝas pri:

- ekstera politiko - antaŭ senato la veneciaj ambasadoroj legas siajn famajn kaj detalajn raportojn, hodiaŭ pri la plej granda minejo pri la tiutempaj aferoj
- reguligo de akvoj kaj defendo de la sojlo, tio estas senmarĉigoj, devojigoj de riveroj kaj ĝenerale mediprotektado
- plibonigo de agrikulturaj aferoj
- komerca navigado
- militaj aferoj

4. Administracio

Tre komplike estus priskribi la venecian administracion. Multnombraj estis la magistroj kontrolantaj la plej diversajn aspektojn de la venecia vivo. Elstaris la Kvardekopo (Quarantia) kaj la Dekopa Konsilio (Consiglio dei Dieci) kiuj superrigardis tutan arbaron da pli malaltaj oficejoj kaj funkciuloj.

5. Nobelaro aŭ patriciaro

Dum en aliaj eŭropaj landoj estis grafoj, baronoj, arkidukoj ktp. en Venecio neniam estis tiaj titoloj. En Venecio oni parolas nur pri „nobelaj homoj“ aŭ

„veneciaj patricioj“. Kutime nobeloj estas denaskaj, sed kelfoje oni fariĝas nobelo „per mono“, tio signifas, ke pagas egan monsumon al la ŝtato.

La nobelaro konsistas el 2500 homoj kontraŭ loĝantaro da 100 000-150 000 burĝuloj kaj popolanoj.

En la „Ora Libro“, tuj kiam nobelo enmondiĝas, oni registras lian nomon. La destino de la „veneciaj patricioj“ aŭ „nobeloj“ estas antaŭsignita: ĉiuj estas devigataj priservi la Respublikon kiel soldatoj, kiel ŝipanoj kaj ŝiparestroj, kiel ambasadoroj, kiel magistroj kaj funkciuloj de la civila administrado. Se la „venecia patricio“ preferas rezigni sian oficojn, li havas nur du rimedojn: aŭ pastrigi (**ekleziuloj estis rigore ekskluditaj de la politika vivo**), aŭ pagi monpunon kiu fariĝas de jaro al jaro ĉiam pli alta.

En la jaro 1379 ekestis leĝo laŭ kiu kulpa nobelo ricevis punon duoblan de tiu de samkrima popolano (kaj ekde 1401 malriĉuloj rajtis je senpaga jura helpo). Unuvorte la statuso de „venecia patricio“ certigis ja multajn honorojn, sed ankaŭ multajn ŝarĝojn. La veneciaj nobeloj povis nur edziĝi al samrangaj nobelinoj aŭ almenaŭ filinoj de advokatoj, notarioj, kuracistoj, apotekistoj aŭ vitrofarejaj majstroj.

Nobelaro konsistigis la „Pli Grandan Konsilon“ (2000 membroj en la jaro 1500).

6. Popolo

Popolanoj tute ne havis politikan potencon (apanaĝo de la nobelaro), sed tre aktivis kiel manlaboristoj. Same kiel en Florenco, ankaŭ la veneciaj metiistoj ne laboris izolate, sed ene de asocioj aŭ korporacioj, nomataj „Scuole“, kiuj estis tiom multaj kiom la diversaj metioj.

En la XIV. jarcento, inter grandaj kaj malgrandaj, estis sume centoj da korporacioj. La korporacioj havis grandan aŭtonomecon; ili estis disciplinataj de statutoj nomataj „mariegole“ kiuj celis forigi ĉiajn trouzojn: mallojaldan konkurencon, miskvalitajn prilaboradojn, troajn laborhorarojn, malaltkvalitajn krudaĵojn ktp. La statutoj estis formulitaj de funkciuloj de la korporacio, aprobitaj en ĝenerala kunsido kaj pliposte ratifitaj.

La korporaciaj oficoj, laŭelektaj kaj unujaraj, ampleksis interalie: prezidanto (nomata „gastaldo“), anstataŭanto („vicario), pluraj konsilistoj, kasisto. Partoprenis la elektojn nur mastroj, dum restis ekskluditaj ordinaraj laboristoj kaj metilernantoj. Ĉi lastaj, post 5 jaroj da metilernado, kaj tri jaroj da laboro kaj fina ekzameno, rajtis malfermi butikon.

Ne malofte la sidejoj de la korporacioj estis rimarkindaj konstruaĵoj kun grandaj salonoj ornamitaj per artverkoj („Scuola di San Rocco“ kun tolaĵoj de Tintoretto): oni gardadis en ili la standardon, la bildon de la sankta Patrono, la sigelilojn kaj la tabuletojn de la koncerna metio. Oni pagis impostojn ĉu al la korporacio, ĉu al la registaro.

La korporacioj ludis ankaŭ gravegan rolon kiun hodiaŭ oni nomas „sociala protekto“ aŭ „sociala sekureco“: ĉar ili asignis monon al malriĉuloj, al malsanuloj, al vidvinoj, al orfoj kiel ankaŭ por konstruo de malsanulejoj.

Ekde 1539 la aparteno al korporacio fariĝis deviga. Korporacioj devis ankaŭ doni rekrutojn al la venecia ŝiparo kaj partopreni kun siaj standardoj ĉe publikaj kaj religiaj festoj.

7. La prospero de Venecio

En la jaro 1423, je kulmino de la venecia potenco, doĝo Tomaso Mocenigo, dum parolado antaŭ la „Pli Granda Konsilio“ orgojle asertis: „Danke al paco, nia urbo engaĝas en la tuta mondo kapitalon je 10 milionoj da dukatoj, kaj tiel ni ricevas profiton je 2 milionoj da dukatoj per eksportado, kaj je 2 milionoj da dukatoj per importado. Ni havas 3000 ŝipojn navigantaj kun 17000 maristoj. Tion faris generacioj, kiuj nin antaŭis...“. La dukato pri kiu parolis doĝo Tomaso Mocenigo estis tiutempa „dolaro“, ora monero unuafoje stampita en la jaro 1284 de doĝo Giovanni Dandolo. Ĝia pezo – 3,56 gramoj – (same kiel la florenca florenco) restis praktike senŝanĝa ĝis 1797.

8. La ŝipfarejo

Plurfoje pligrandigite (Malnova, Nova, Novega Ŝipfarejoj), en la XVI jarcento, antaŭ la ekesto de la industria revolucio, ĝi estis la plej granda produktata komplekso kun la plej granda koncentrado de laboristaro. Ĝiaj grandiozaj instalaĵoj estis verkoj de famaj arkitektoj. Tian grandan entreprenon la venecia registraro ĉiam administris kun pli granda zorgo.

9. La Ŝtata Arkivo

1100 jaroj da sendependa politika vivo kaj zorgemo de la venecia registaro rezultigis senmezuran Ŝtatan Arkivon. Pro siaj dokumentoj (ekde jaro 900 p.Kr.) kaj pro sia amplekso (80 kilometrojn da bretoj) ĝi estas unu el la plej grandaj en la mondo: vera paradizo por historiistoj!

El „La libro de la mediumoj“

Allan Kardec

El franca originalo tradukis L.C.Porto Carreiro Neto kaj Ismael Gomes Braga

Ĉapitro XXX

Regularo de la Pariza Societo por Spiritismaj Studoj

fondita la 1-an de aprilo 1858 kaj permesita per ordono de s-ro Polica Prefekto la 13-an de aprilo 1858, laŭ la letero de la Lia Ekscelenco de Ministro por Internaj Aferoj kaj Ĝenerala Sekureco

Ĉapitro I – Celo kaj konsistigo de la Societo

Art. 1-a. La Societo celas studadon de ĉiaj fenomenoj, rilataj al la manifestiĝoj de Spiritoj, kaj ilian aplikadon al moralaj, naturaj, historiaj kaj

psikologiaj sciencoj. Estas malpermesite pritrakti en ĝi demandojn politikajn, religiopolemikajn kaj pri socia ekonomiko.

Ĝi permesas al si titolon: *Pariza Societo por Spiritismaj Studoj*.

Art. 2-a. La Societo konsistas el anoj titolaj, liberaj kaj korespondantaj.

Ĝi povas asigni la titolon de honora membro al tiuj homoj, loĝantaj en Franclando aŭ en la eksterlando, kiuj pro sia pozicio aŭ laboroj povas fari al ĝi eminentajn servojn.

La honoraj membroj estas ĉiujare submetataj al reelekto.

Art. 3-a. La Societo akceptas nur tiujn homojn, kiuj simpatias ĝiajn principojn kaj la celon de ĝiaj laboroj, tiujn, jam inicitajn en la fundamentaj principoj de la spiritisma scienco aŭ serioze portantajn la deziron instruiĝi. Sekve, ĝi esceptas ĉiun ajn, kiu povus porti malpacigilojn en la sinon de ĝiaj kunsidoj, ĉu el malamikemo aŭ sistema kontraŭemo, ĉu el ĉia alia kaŭzo, kaj tiel fari, ke oni perdu tempon en senutilaj diskutoj.

Ĉiuj anoj ŝuldas unu al la alia bonvolon kaj bonkonducon, kaj en ĉiaj cirkonstancoj ili devas loki la ĝeneralan bonon super la demandoj personaj kaj de memestimo.

Art. 4-a. Por esti akceptita kiel libera ano oni devas adresi al la Prezidanto skriban peton, rekomende surskribitan de du titolaj anoj, kiuj fariĝas garantianoj de la intencoj de la petanto.

La petletero devas mallonge informi: 1-e, ĉu la petanto jam posedas iajn konojn pri Spiritismo; 2-e, la staton de lia konvinko pri la fundamentaj punktoj de ĉi tiu scienco; 3-e, lian sindevigon absolute alkonformiĝi al ĉi tiu regularo.

La peto estas submetata al Komitato, kiu ĝin ekzamenos kaj ĉe okazo proponos la akcepton, prokraston aŭ malakcepton.

La prokrasto estas severe necesa pri ĉiu kandidato, kiu ankoraŭ nenion scias pri la spiritisma scienco kaj ne simpatias la principojn de la Societo.

La liberaj anoj rajtas ĉeesti ĉiujn kunsidojn, partopreni en laboroj kaj diskutoj, celantajn studadon, sed en nenia okazo ili havas decidan voĉon koncerne la aferojn de la Societo.

La liberaj anoj estas tiaj nur por la jaro, en kiu ili estas akceptitaj, kaj ilia restado kiel membro de la Societo devas esti konfirmita ĉe la fino de tiu unua jaro.

Art. 5-a. Por esti titola ano, la persono devas esti estinta almenaŭ dum unu jaro libera ano, esti ĉeestinta pli ol la duonon de la nombro de la kunsidoj, kaj esti doninta, dum tiu tempo, sendubajn pruvojn pri siaj scioj kaj konvinkoj rilate de Spiritismo, sian konsenton pri la principoj de la Societo kaj sian deziron en ĉiaj cirkonstancoj kondukti kontraŭ siaj kolegoj laŭ la principoj de la karitato kaj de la spiritista moralo.

La liberaj anoj, kiuj regule ĉeestis, dum ses monatoj, la kunsidojn de la Societo, povos esti akceptotaj kiel titolaj anoj, se ili kontentigas la ceterajn kondiĉojn.

La akcepto estas proponata de la Komitato mem, kun la konsento de la ano, se krom tio ĝin apogas tri aliaj titolaj anoj. Poste ĝi estas anoncata de la Societo, se aprobita per sekreta baloto, post buŝa raporto de la Komitato.

Nur la titolaj anoj havas decidan voĉon kaj ĝuas la rajton konsentitan per la Art. 25-a.

Art. 6-a. La Societo se ĝi opinios tion oportuna, limigos la nombron de la liberaj anoj kaj de titolaj anoj.

Art- 7-a. Korespondantaj anoj estas tiuj, kiuj, neloĝante en Parizo, tenadas rilatojn kun la Societo kaj havigas al ĝi dokumentojn utilajn por ĝiaj studoj. Ili povas fariĝi membroj per propono de unu sola titola ano.

Ĉapitro II – Administrado

Art. 8-a. La Societo estas administrata de Prezidanto-direktoro, helpata de la anoj de la estraro, kaj de la Komitato.

Art. 9-a. La estraro konsistas el: 1 Prezidanto, 1 Vicprezidanto, 1 Ĉefsekretario, 2 Helpsekretarioj kaj 1 Kasisto.

Krom tiuj povas esti nomata unu aŭ pli ol unu honora Prezidanto.

Ĉe foresto de Prezidanto kaj de la Vicprezidanto la kunsidoj povas esti prezidataj de unu el la anoj de la Komitato.

Art. 10-a. La Prezidanto-direktoro devas plej zorge sin doni al la interesoj de la Societo kaj de la spiritisma scienco. Koncernas lin la ĝenerala direktado kaj la alta kontrolado de la administrado, kiel ankaŭ la konservado de la arkivoj.

La Prezidanto estas elektata por tri jaroj kaj la ceteraj anoj de la Komitato por unu jaro, senlime elekteblaj.

Art. 11-a. La Komitato konsistas el la anoj de la estraro kaj el aliaj kvin titolaj anoj, elektitaj prefere el inter tiuj, kiuj efike kunhelpis en la laboroj de la Societo, plenumis servojn al la afero Spiritismo aŭ elmontris bonvolan kaj akordigan spiriton. Tiuj kvin anoj estas, kiel la estraranoj, elektataj por unu jaro kaj reelekteblaj.

La Komitato estas laŭrajte prezidata de la Prezidanto-direktoro aŭ, ĉe ties foresto, de la Vicprezidanto aŭ de tiu el ĝiaj anoj, difinita por tiu prezido.

La Komitato havas la taskon antaŭe ekzameni ĉiajn administrajn kaj aliajn demandojn kaj proponojn, submetotajn al la Societo; ĝi kontrolas la enspezojn

kaj elspezojn de la Societo kaj kontojn de la Kasisto, permesas la ordinarajn elspezojn kaj faras ĉiajn ordodisponojn, kiujn ĝi opinias necesaj.

Krom tio, ĝi ankaŭ ekzamenas la laboraĵojn kaj studotemojn, proponitajn de la societanoj, ilin preparas mem, kaj difinas la tagordon de la kunsidoj, konsente kun la Prezidanto.

La Prezidanto ĉiam povas malhelpi, ke iaj temoj estu pritraktataj kaj enmetataj en la tagordon, escepte se li volas ilin submeti al la Societo, kiu laste decidos.

La Komitato regule kunvenas antaŭ la malfermo de la kunsidoj, por ekzameni kurantajn aferojn, kaj ankaŭ en ĉia alia momento, kiun ĝi opinios oportuna.

La anoj de la estraro kaj de la Komitato, kiuj senavize forestis dum tri sinsekvaj monatoj, estas konsiderataj kiel rezignintaj siajn funkciojn, kaj oni devas fari necesajn paŝojn por ilin anstataŭigi.

Art. 12-a. La decidoj, ĉu de la Societo, ĉu de la Komitato, estas farataj laŭ la absoluta plimulto el la ĉeestantaj anoj; ĉe egaleco de voĉoj, decidos la voĉo de la Prezidanto.

La Komitato povas fari decidon ĉe la ĉeesto de kvar el siaj anoj.

La sekreta baloto estas deviga, se tion postulas kvin anoj.

Art. 13-a. Ĉiujn tri monatojn ses anoj, elektitaj el inter la titolaj aŭ liberaj anoj, estas difinitaj por la funkcio de *komisaroj*.

La komisaroj havas la taskon prigardi la ordon kaj bonan iradon de la kunsidoj kaj kontroli la rajton de eniro de ĉia fremda homo, kiu sin prezentas, por ĉeesti la kunsidon. Por ĉi tio la difinaj anoj aranĝiĝos tiamaniere, ke unu el ili ĉeestu la malfermon de la kunsidoj.

Art. 14-a. La societa jaro komenciĝas la 1-an de aprilo.

La nomado de la estraranoj kaj komitatanoj okazas en la unua kunsido de majo. La funkciantaj anoj daŭrigas siajn funkciojn ĝis tiu tempo.

Art. 15-a. Por la elspezoj de la Societo la titolaj anoj pagas ĉiujare 24 fr., kaj tiuj liberaj 20 fr.

La titolaj anoj, ĉe sia akcepto, pagas per unu fojo la kromsumon de 10 fr.

La kotizo estas pagata tuta por kuranta jaro.

La anoj akceptitaj en la daŭro de la jaro, devas pagi, en tiu unua jaro, nur por la trimestroj ĝis la fino de la jaro, inkluzive tiun, en kiu ili estas akceptitaj.

Se edzo kaj edzino estas akceptataj kiel liberaj aŭ titolaj anoj, estas postulataj por ambaŭ nur unu kotizo kaj duono.

Ĉiujn ses monatojn, la 1-an de aprilo kaj la 1-an de oktobro, la Kasisto donas al la Komitato kalkulan raporton pri la uzado de la mono kaj la financa stato de la Societo.

Paginte la kurantajn elspezojn por luado kaj aliajn devigajn ŝuldojn, la Societo, se restas saldo, difinos la uzon de ĉi tiu.

Art. 16-a. Al ĉiuj akceptitaj anoj, liberaj aŭ titolaj, estas donata akceptokarto, menciante ilian kategorion. Tiu karto restas en la manoj de la Kasisto, de kiu la nova ano povas ĝin preni, pagante sian kotizon kaj la enirsumon. La nova ano povas ĉeesti la kunsidojn nur post la elpreno de sia karto. Se li tion ne faris ĝis post unu monato post sia akcepto, li estas konsiderata kiel ekŝiginta.

Estos konsiderata kiel ekŝiginta ankaŭ ĉiu ano, kiu ne pagis sian jaran kotizon en la unua monato de la renoviĝo de la societa jaro, post kiam estis vana iu avizo de la Kasisto.

Ĉapitro III - Pri la kunsidoj

Art. 17-a. La kunsidoj de la Societo okazos ĉiun vendredon je la oka horo vespere, escepte ian ŝanĝon se necese.

La kunsidoj estas privataj aŭ ĝeneralaj; ili neniam estas publikaj.

Ĉiu, kiu en ia ajn rolo estas parto de Societo, devas en ĉiu kunsido enskribi sian nomon en liston de la ĉeestantoj.

Art. 18-a. Silento kaj enmemiĝo estas severe postulataj dum la kunsidoj kaj precipe dum la studoj. Neniu povas preni la parolon, ne ricevinte ĝin de la Prezidanto.

Ĉiaj demandoj al la Spiritoj devas esti farataj pere de la Prezidanto, kiu povas rifuzi ilin, laŭ la cirkostancoj.

Estas speciale malpermesitaj ĉiaj demandoj frivolaj, kun persona intereso, el nura scivolemo aŭ celantaj elprovi la Spiritojn, kiel ankaŭ ĉiuj, kiuj ne celas ĝeneralan utilecon el la vidpunkto de la studoj.

Estas malpermesitaj ankaŭ ĉiaj diskutoj, kiuj deturnus la kunsidon for de ĝia pritraktata speciala temo.

Art. 19-a. Ĉiu ano rajtas postuli, ke estu admonata ĉiu ajn, kiu translimus la konvencon en diskutoj aŭ en ia maniero malordigus la kunsidojn. La admono estas tuj submetata al voĉdonado; se aprobita, ĝi estas registrata en la protokolo.

Tri admonoj en la daŭro de unu jaro laŭrajte kuntrenas la elsocietigon de la koncerna ano, kia ajn estas lia kategorio.

Art. 20-a. Nenia komunikaĵo de Spirito, ricevita ekster la Societo, povas esti legata, antaŭ ol ĝi estis submetita, ĉu al la Prezidanto, ĉu al la Komitato, kiu povas konsenti aŭ rifuzi ĝian legadon.

Devas esti konservata en la arkivoj kopio de ĉiu ekstersocieta komunikaĵo, kies legado estis permesita.

Ĉiuj komunikaĵoj, ricevataj dum kunsidoj, apartenas al la Societo; la medioj, kiuj ilin ricevis, povas preni al si kopion de ili.

Art. 21-a. La privataj kunsidoj estas rezervataj al la societanoj kaj okazas en la unua, en la tria kaj, eventuale, en la kvina vendredo de ĉiu monato.

La Societo rezervas por la privataj kunsidoj ĉiujn demandojn kiuj koncernas ĝiajn administrajn aferojn, kaj ankaŭ la studotemojn, kiuj postulas pli grandajn trankvilecon kaj koncentriĝon, aŭ kiujn ĝi opinias utile esplori pli profunde, antaŭ ol ilin pritrakti en la ĉeesto de fremduloj.

Rajtas ĉeesti la privatajn kunsidojn, krom la titolaj kaj liberaj anoj, ankaŭ la korespondantaj anoj, tiam troviĝantaj en Parizo, kaj la medioj, servantaj al Societo.

Nenia homo fremda al la Societo estas enlasata en la privatajn kunsidojn, krom esceptaj okazoj kaj kun antaŭa konsento de la Prezidanto.

Art. 22-a. La ĝeneralaj kunsidoj okazas en la dua kaj kvara vendredo de ĉiu monato.

En la ĝeneralaj kunsidoj la Societo permesas la enlason de fremdaj aŭdantoj, kiuj povas ilin ĉeesti kiel gastoj, ne partoprenante en ili. Tiun permeson ĝi povas forpreni ĉiam, kiam ĝi trovos tion oportuna.

Neniu povas ĉeesti la kunsidojn kiel aŭdanto, antaŭe ne prezentite de iu societano al la Prezidanto, ano, kiu fariĝis garantianto de lia zorgo nek malordigi, nek interrompi la laborojn.

La Societo akceptas kiel aŭdantojn nur tiujn homojn, kiuj aspiras fariĝi ĝiaj anoj aŭ simpatias ĝiajn laborojn, kaj sufiĉe inicitajn en la spiritisman sciencon, por ilin kompreni. La akcepto devas esti absolute rifuzata al ĉiu ajn, kiu estus altirata al tiuj laboroj el scivolemo aŭ kies opinioj estus malamikaj al la Societo aŭ al Spiritismo.

Al la aŭdantoj la parolo estas malpermesita, krom la esceptaj okazoj laŭ la juĝo de la Prezidanto. Kiu iel ajn malaranĝus la ordon aŭ elmontrus malbonvolon kontraŭ la laboroj de la Societo, tiun oni povus inviti foriri, kaj, en ĉiu okazo, la fakto estus menciita en la listo de la akceptitoj kaj lia eniro estus malpermesita en estonta tempo.

Ĉar la nombro de la aŭdantoj devas esti limita laŭ la disponeblaj lokoj, tiuj, kiuj povos ĉeesti la kunsidojn, devas esti antaŭe enskribitaj en registron, difinitan por tio, kun mencio de ilia adreso kaj de la ano, kiu ilin rekomendas. Sekve ĉia enirpeto devas, plurajn tagojn antaŭ la kunsido, esti adresita al la Prezidanto, kiu sola ekspedas la akceptokartojn, ĝis la listo estos kompleta.

La enirkartoj povas utili nur por la indikita tago kaj por la nomitaj personoj.

La eniro ne povas esti konsentata al la sama aŭdanto por pli ol du kunsidoj, escepte de permeso de la Prezidanto kaj ĉe esceptaj okazoj. Unu sama

ano ne povas samtempe prezenti pli ol du personojn. La eniroj, konsentitaj de la Prezidento, ne havas limon.

La aŭdantoj ne estas enlasataj post la malfermo de la kunsido.

Ĉapitro IV - Diversaj disponoj

Art. 23-a. Ĉiuj anoj de la Societo ŝuldas al ĝi sian kunlaboron. Sekve, ili estas invitataj kolekti en siaj kampoj de observoj tiujn malnovajn aŭ novajn faktojn, kiuj povas rilati al Spiritismo, kaj ilin noti. Ili bonvolu ankaŭ informiĝi, laŭ sia povo, pri la konateco de tiuj faktoj.

Ili estas invitataj ankaŭ konatigi al ĝi ĉiajn publikaĵojn, kiuj povas pli aŭ malpli rekte rilati al la objekto de ĝiaj laboroj.

Art. 24-a. La Societo kiam ĝi opinios tion oportuna, submetos al kritika ekzameno la diversajn verkojn, publikigitaj pri Spiritismo. Por tio, ĝi komisios unu el siaj anoj, liberan aŭ titolan, por fari al ĝi raporton, kiu ĉe okazo estos presita en la *Revue Spirite*.

Art. 25-a. la Societo aranĝos al si specialan bibliotekon el verkoj, kiuj estos al ĝi donacitaj aŭ kiujn ĝi mem akiros.

La titolaj anoj povos en la sidejo de la Societo legi ĝiajn librojn aŭ esplori ĝiajn arkivojn, en por tio difinitaj tagoj kaj horoj.

Art. 26-a. Ĉar la Societo konsideras, ke ĝia respondeco povas esti morale kompromitita de privataj publikaĵoj de ĝiaj anoj, tial neniu, en ĉia ajn skribaĵo, povas uzi la titolon de *ano de la Societo*, sen ties antaŭa permeso kaj antaŭ ol ĝi legos la manuskripton, la Komitato prenos nur sin la faradon de raporto pri tio. Se la Societo juĝos la skribaĵon ne akordigebla kun ĝiaj principoj, tiam la aŭtoro, aŭdite, estos invitata, ĉu modifi ĝin, ĉu rezigni ĝian publikigon, ĉu fine sin ne konatigi kiel anon de la Societo. Se li sin ne submetos al la farota decido, li povos esti elpelita el la Societo.

Ĉia skribaĵo, kiun iu ano de la Societo publikigos anonime kaj sen la montro, laŭ kiu oni ne povus rekoni lin kiel ĝian aŭtoron, estos enkalkulata en la ordinarajn publikaĵojn, kies juĝon la Societo rezervas al si. Tamen, ne dezirante malhelpi la liberan eldiron de personaj opinioj, la Societo invitas ĉiujn siajn membrojn, kiuj intencus eldoni tiujn publikigaĵojn antaŭe peti ĝian duonoficialan opinion, en la intereso de la scienco.

Art. 27-a. Dezirante tenadi en sia sino la unuecon de principoj kaj la reciprokan bonvolemon, la Societo povos elpeli el si ĉian anon, kiu estus kaŭzo de malkonkordo aŭ malkaŝe ekbatalus kontraŭ ĝi per skribaĵoj, kompromitantaj la Doktrinon, per revoluciaj opinioj aŭ per konduto, kiun ĝi ne povus aprobi. La

elpelo estos tamen decidita nur post senefika duonoficiala avizo kaj post kiam estos aŭdita la akuzita ano, se li opinios utile klarigi sian konduton. La decido estos farita almenaŭ de tri kvaronoj de la ĉeestantaj anoj, per sekreta baloto.

Art. 28-a. Iu ano, kiu memvole foriĝos en ĉiu ajn tago de la jaro, ne povos repostuli la diferencon de la kotizoj, kiujn li pagis; tiu diferenco estos redonata en la okazo de elpelo, decidita de la Societo.

Art. 29-a. Ĉi tiu regularo povos esti modifita, se por tio estos motivo. La proponoj por modifoj povos esti farataj al la Societo nur per la organo de ĝia Prezidanto, al kiu ili devos esti transdonataj kaj en la okazo, se ili estas akceptitaj de la Komitato.

La Societo povas, ne modifante sian regularon rilate ties esencajn punktojn, fari ĉiajn aldonajn disponojn, kiujn ĝi opinios utilaj.

La libro estis eldonita en la jaro 1964.

La aŭtoro en la jaro 2004 havis jubileon de 200 da jaroj de naskiĝo.

En Parizo pri tiu ĉi jubileo okazis solena kongreso. Pri tio oni presis seslingvan revuon **ESPIRITISMO** (france, angle, hispane, portugale, germane, esperante).

Asimilado malhelpas

El Eventoj n-ro 234-235 julio 2002

Ĉefa celo de la lernejoj en Usono estas „usonigi“ la enmigrintojn. Sed multfoje la enmigrintaj lernantoj kiuj plej bone sukcesas estas ĝuste tiuj, kiuj estas malpli „usonigitaj“. La vojo por la asimilado estas eble pli kompleksa ol ni supozas.

En orienta regiono de New Orleans, la adoleskantoj de la komunumo de la vjetnamaj rifuĝintoj sekvas per diversaj vojoj. La plimulto de lernejoj ordinare lernas ĉe Reed High School, la loka kvartala lernejo, dum aliaj preferas studi en supera lernejo ĉe Abramson High School, kiu ne estas multe malproksime. Tie la vjetnamaj lernantoj konsistas el nur 1 dekonono de la tuta studentaro, sed la enmigrintoj sukcesas en la studado kaj ricevas multajn meritajn honoraĵojn en lastaj 4 jaroj.

La lernejo Reed High School havas demokratian miksaĵon de lernantoj, estas ili malriĉuloj, negruoj aŭ vjetnamoj, kaj la lernejo ne havas elitajn programojn. Multaj vjetnamaj lernantoj partoprenas junajn rabistajn grupojn kaj involviĝas kun drogoj kaj kun polico. La etnaj konfliktoj ne estas problemoj: la

negroj kaj vjetnamaj lernantoj kunvivas bone, tamen multaj junaj enmigrintoj konsideras la frenezajn (fremdiĝitajn) junulojn kiel siajn modelojn.

Min Zhou kaj Carl L. Bankston estas sociologoj kiuj studis ĉi tiun kontraston inter sukcesaj vjetnamoj (la plej granda parto, kiu lernas en lernejo Abramson) kaj la aliaj vjetnamanoj (krimuloj), kiuj lernas en lernejo Reed. La sociologoj Zhou de la Universitato de Kalifornio, kaj Bankston el la Universitato de Tulane konkludis, ke la sukcesaj vjetnamoj estas tiuj, kiuj malrapide asimilas la usonan kulturon. La krimuloj estis tiuj, kiuj plej rapide forlasis siajn etnajn (kulturajn) heredaĵojn.

Laŭ instruistoj, la junuloj kiuj plej bone sukcesis en la studado estis tiuj, kiuj parolas la vjetnaman lingvon en lernejo, iradas al preĝejo regule (kelkaj estas katolikoj, aliaj budhanoj), celebras la etnajn festojn. Tiuj junuloj sentas danke al devoj de siaj gepatroj, geavoj kaj eĉ al siaj najbaroj kiuj ne estas parencoj. Kiam ili ricevas akademiajn laŭdojn (premiojn), la tuta komunumo kunmemoras.

Sed la krimaj junuloj estas tiuj, kiuj plej ofte estas embarasitaj pro la eksterlandaj kutimoj de siaj gepatroj (hontas pri ilia etna kulturo), evitas paroli la vjetnaman lingvon, preferas aŭdadon de la usona muziko, vestas sin kiel membroj de rabistaj grupoj, aŭ kiel aktoroj kaj muzikistoj aktuale modaj.

Tradukis kaj kompilis Johano

johano@uol.com.br

El la libro „Suad vivbruligita – honorkrimo“ – dokumento

Eldonite de SAT 2004,
traduko el la franca
aranĝite de Rémy Bouchet

Mi estas knabino, kaj knabino devas rapide paŝi kun kapo klinita al la tero, kvazaŭ ŝi estus nombranta siajn paŝojn. Ŝia rigardo ne devas leviĝi nek deflankiĝi dekstren aŭ maldekstren de ŝia vojo, ĉar se ŝia okulo trafus viran okulon, la tuta vilaĝo nomus ŝin *ŝarmuta*.

Se najbarino jam edziniĝinta, maljuna virino aŭ iu ajn ekvidus ŝin sola en la strateto, sen ŝia patrino aŭ ŝia plejaĝa fratino, sen ŝafoj, sen fasko da fojno aŭ ŝarĝo da figoj, oni nomus ŝin *ŝarmuta*.

Knabino devas esti edziniĝinta, por rigardi rekten antaŭ si, sin prezenti en la butikoj de komercisto, sin senharigi kaj surhavi juvelojn.

Kiam knabino ne estas edziniĝinta antaŭ aĝo de 14 jaroj, kiel estis mia patrino, la vilaĝanaro ekmokas ŝin. Sed por esti edziniĝinta, knabino devas atendi sian vicon en la familio. Unue la plej aĝa, poste la aliaj.

La knabinoj estas tro multaj en la domo de mia patro. Kvar en aĝo de edzineco. Estas ankaŭ du duonfratinoj, naskitaj de la dua edzino de mia patro. Ili estas ankoraŭ infanoj. La sola virseksulo de la familio, la filo adorata de ĉiuj, nia frato Asad glore naskiĝis inter ĉiuj knabinoj je la kvara rango. Mi estas en la tria rango.

Mia patro, Adnan, estas malkontenta pri mia patrino Lejla, kiu naskis ĉiujn tiujn knabinojn. Li estas malkontenta ankaŭ pri sia alia edzino Aiŝa, kiu naskis nur knabinojn.

Nura la plejaĝa edziniĝis malfrue, kiam mi mem estis ĉirkaŭ dek-kvin-jara. Pri Kajnat, la dua en la vico, neniu edziĝpeto estas. Mi aŭdis, ke iu alparolis mian patron pri mi, sed mi devas atendi la edziniĝon de Kajnat antaŭ pripensi mian. Sed Kajnat eble ne estas sufiĉe bela aŭ ŝi tro malrapide laboras... Mi ne scias, kial ne estas edziĝpeto pri ŝi. Se ŝi fariĝos daŭra fraŭlino, ŝin trafus la moko de la tuta vilaĝo, kaj ankaŭ min.

Mi konis nek ludon nek plezuron ekde kiam mia cerbo havas memorkapablon. Naskiĝi ino en nia vilaĝo estas malfeliĉo. La sola liberecospiro estas edziniĝo. Foriri el la patrodomo por la edzodomo, kaj ne plu reveni en ĝin eĉ se oni estas batata.

Mia patro! Mi revidas lin sidantan antaŭ sia domo, surtere sub arbo, kun sia irbastono apud si. Li estas malgranda kun tre blanka vizaĝkoloro efelide makulita, ronda kapo kun tre malicaj bluaj okuloj. Iun tagon li rompis al si kruron falante el ĉevalo, kaj la knabinoj estis tre kontentaj, ĉar li ne plu povis postkuri nin tiel bone kun sia zono por bati nin. Se li mortus, ni estus ankoraŭ pli feliĉaj.

Tiun patron mi vidas. Lin mi neniam povos forgesi, kvazaŭ, kvazaŭ li estus fotita en mia kapo. Li sidas antaŭ sia domo, kiel reĝo antaŭ sia palaco, kun sia ruĝa-blanka fulardo, kiu kaŝas lian kalvan kaj efelidan kranion. Li surhavas sian zonon kaj lia irbastono estas sur liaj falditaj kruroj. Mi bone vidas lin, li estas tie, eta kaj malica, li demetas sian zonon... kaj li krias: „Kial la ŝafoj revenis solaj!“

Li tiras min per la haroj kaj trenas min teren en la kuirejon. Li frapas min dum mi genuiĝas. Li tiras mian harplektaĵon, kvazaŭ li volus elradiki ĝin kaj li tranĉas ĝin per la dika lanotondilo. Mi ne havas plu harojn. Mi povas plori, krii aŭ petegi, mi ricevos nur pliajn piedbatojn. Estas mia kulpo.

Mi endormiĝis kun mia fratino, ĉar estis tro varme, kaj mi lasis la ŝafojn eliri. Li nin frapas tiel forte per sia bastono, ke mi ne plu povas etendiĝi, ĉu dekstren ĉu maldekstren, tion mi suferas. Zono aŭ irbastono, mi kredas, ke ni estis batataj ĉiutage. Unu tago sen bato ne estis normala.

Eble estas tiu fojo, kiam li ligis nin ambaŭ. Kajnat kaj min, kun manoj malantaŭ la dorso, kun kruroj ligitaj, kun fulardo sur la buŝo por malebligi, ke ni krii. Ni restis tiel la tutan nokton, ligitaj kun barilo en la granda brutejo kun la brutoj, sed pli malbone ol ili.

Tiel estis en tiu vilaĝo, regis la leĝoj de la viroj. La knabinoj kaj la virinoj estis verŝajne batataj ĉiutage en la aliaj domoj. Oni aŭdis krii aliloke, do estis normale esti batataj, esti hartonditaj, esti ligitaj al barilo de brutejo. Ne eblis vivi alimaniere.

Mia patro estas la reĝo, la ĉiopova viro, kiu posedas, decidas, frapas kaj nin torturas. Kaj li trankvile fumas sian pipon antaŭ sia dormo kun siaj virinoj enfermitaj, kiujn li traktas pli malbone ol siajn brutojn. Viro prenas al si virinon por ricevi filojn, por ke ŝi estu lia sklavo kiel liaj filinoj, kiuj naskiĝos, se ŝi malfeliĉe naskos ilin.

La libro estis el la franca tradukita al pluraj lingvoj, eĉ al la ĉeĥa.

El Laŭte!

Lŭte! estis dumonata liberesprimilo por progresemoj

Fabelo pri feliĉo

Dum tiel nomata „Stalina periodo“ ni, junuloj, estis devigitaj frekventi kurson por lerni „Marksan-Leninan etikon kaj estetikon“. Foje nia kursgvidanto deklaris: „En nia komunisma sociordo aparta homa feliĉo ne estas, krom kiel parto de komuna tutpopola feliĉo.“

Mi intencis riproĉi, ke mi havas propran opinion, sed mi riskus esti akuzita kiel komunista malamiko. Rehejmiĝinte, mi sciigis mian opinion al mia avo. Anstataŭ respondi, mia avo rakontis jenan popolfabelon:

„Iam, iulande, vivis reĝo, posedanto de sennombraj riĉaĵoj, sed ĉiam plendis, ke ne sentas sin feliĉulo. Plej fama landa saĝulo proponis al la reĝo vestiĝi per ĉemizo de feliĉa homo, kaj tiamaniere li feliĉiĝos. Korteganoj ekiris tutlande serĉi feliĉulon, preni lian ĉemizon por feliĉigi la malfeliĉan reĝon, sed senrezulte.

Iun vesperon, el apudvilaĝa kabano aŭdiĝis gaja kanto. Anstataŭ pordo estis pendigita mato. Meze de la kabano ili vidis mezaĝan viron, plektanta korbon kaj laŭte kantante. La reĝaj delegitoj demandis, ĉu li vere estas feliĉa. La korbisto respondis: „Mi estas feliĉa, ke mi bonfartas, plektas korbon, ke

morgaŭ mi vendos ĝin, aĉetos panon, vergojn, denove plektos, vendos, aĉetos panon kaj tiel plu. Alion mi ne bezonas!“

La reĝaj korteganoj ekpetis lin doni al ili lian ĉemizon kontraŭ ege malavara pago.

La malriĉa feliĉa korbisto sin turnis al ili. La korteganoj vidis, ke sur la feliĉula dorso mankas ĉemizo...

La konkludaj vortoj de mia avo estis: „Riĉaĵo ne estas fonto de feliĉo. La feliĉo estas speciala kategorio de memsento, kiu ne dependas de riĉaĵo nek de leciono de via kursgvidanto.“

Kompreneble, mi ne rakontis al nia kursgvidanto la fabelon de mia avo, sed ĉiam en popoldiroj kaj popolfabeloj mi vidas verojn kaj strebas eltiri edifon.

Ivan Tr. Minĉev, BG

Laŭte! 175, januaro 2005.

EL MONATO - leginda gazeto el Belgujo

Disleksio

Albuisturo Kvinke

„En Italio,“ diris la amiko itala, „ne ekzistas la disleksio. La itala lingvo estas fonetika, do neniu havas malfacilecon legi aŭ skribi.“

Punkto kaj fino de diskuto.

Ĉu li pravas aŭ ne, mi ne kompetentas decidi. Tamen, en la lando, kie mi nun loĝas – kaj laŭraporte, en ĉiuj landoj kie la angla estas la ĉefa lingvo de instruado kaj komerco – grava socia problemo estas la ofteco de *disleksio*. Laŭ Plena Ilustrita Vortaro, disleksio (aleksio) estas: „Neurologia perturbo en la legado“. Supozeble, tiuj, kiuj malfacile legas, plejofte ankaŭ havas problemojn skribi, ĉar la du kapablecoj estas intime kune ligitaj. Mi persone ne rememoras periodon en mia vivo kiam mi ne kapablis legi kaj skribi, sed mi supozas ke mi ne naskiĝis kun tiuj scioj, kaj sendube estis tempo iam en mia infaneco kiam mi lernis interpreti la misterajn signojn presitajn aŭ skribitajn sur papero.

Laŭraporte en Britio kaj Irlando grandega parto de la loĝantaro, eĉ post jaroj de lerneja studado, estas funkcie alfabetaj. Tiuj ne kapablas legi la instrukciojn sur etiketo de botelo de medikamento, afiŝojn sur muroj, oficialajn

formularojn por akiri pasporton aŭ permesilon por konduki aŭtomobilon. Ili ne povas prononci vortojn kun pli ol unu silabo. Por ili nekonataj nomoj aŭ fremdaj vortoj estas nelegeblaj.

En Argentino, kie niaj la plej aĝaj filoj estas edukitaj, eĉ junaj infanoj senembarase legas kaj prononcas vortojn kiel *miocardio* kaj *crisantemo*. La kialo estas evidenta: la hispana, kiel la itala, estas fonetike skribataj. La angla (la franca) ne. Kiam mi faris mian buŝan ekzamenon de la franca por eniri universitaton, mi devis skribi laŭ diktado legata de la ekzamenisto. La diktaĵo ŝajnis inkludi ĉiujn eblajn homofonojn de la sonoj *sa-*; *so-*, kaj *se-*, nome *sang* (sango); *sans* (sen); *sent* (sentas); *cent* (cento); *son* (sono, brano); *son* (lia, sia); *ceint* (zonita), ktp. Nefrancoj (ekzemple anglalingvanoj) pliofte rekonas ununuran sonon kiam ili aŭdas tiujn vortojn, nome „song“. Per la kunteksto, tamen, mi povis kompreni la sencon de la teksto de la diktaĵo kaj danke al Dio sukcesis en la ekzameno. Eĉ pli mallogika, se tio eblas, estas la ortografio kaj prononco de la angla. Pro tio, preskaŭ neniu en Britio aŭ Irlando scipovas perfekte (aŭ eĉ malperfekte) literumi anglajn vortojn.

Ni konas irlandan sinjorinon kiu konfesas, ke ŝi estas disleksia. Ŝia edzo, kiu estas blanka afrikano, devas kontroli kaj korekti ĉion kion ŝi skribas. Ŝi malfacile kaj malrapide legas. Tamen, profesie ŝi estas antropologo. Ŝia filo ankaŭ havas la saman problemon kaj kiam li estis juna knabo, li devis ricevi specialan instruon en klasoj por lernejoj kiuj ne bone legas. Malgraŭ tio, nia konatino asertas, ke ŝia filo estas aparte inteligenta.

Ne mankas en Irlando gepatroj kies gefiloj, almenaŭ laŭ opinio de la gepatroj, posedas specialajn talentojn kaj inteligenton, sed havas la saman disleksian problemon. Se la gepatroj diras la veron – kaj kiu rajtas dubi? – iliaj gefiloj, spite al tiu grava malavantaĝo, faras, aŭ jam finfaris altajn studojn pri fakoj kiel ekzemple, matematiko, ĥaosteorio, astrofiziko, astronomio kaj organika kemio.

Kompreneble ne ĉiuj analfabetoj estas geniuloj. Al kelkaj mankas la cerbokapablo de kokino; aliaj, ekzemple nomadoj, ne havis ŝancon ĉeesti lernejon. Kelkaj povas, sed ne volas lerni, ĉar ili povas gajni pli da mono per krimo, ruzo, politiko, borso, aŭ kiel vetperisto aŭ trinkejestro.

La ĉefa kaŭzo de disleksio en angleparolantaj landoj estas evidenta, nome la absurda ortografio de la lingvo. Inteligenta infano unue vidante la anglajn vortojn *apple* (pomo) kaj *able* (kapabla), kompreneble kaj tute logike legas ilin kiel „aple“ kaj „able“. Sed la kompatinda lernejo estas instruita, ke la prononcoj kaj sencoj ĝustaj estas „epl“ kaj „ejbl“. Eĉ la simpla litero *a* malsame sonas en malsamaj vortoj. Fakte, ĝi havas grandan gamon da sonoj en la angla kaj neniu sistemo de akcentoj aŭ tonoj ekzistas por helpi rekoni pri kiu senco temas.

Alia ekzemplo estas la interkombinaĵo *-ough*, kiu aperas en jenaj vortoj:
rough (proksimume rof – /malglata, kruda/)
bough (baŭ – /branĉego/)

through (tru, fru – /tra/)

thorough (tora - /fora/)

lough (loĥ - /lago en Irlando) ktp.

Se tiu literkombinaĵo estus uzata en Esperanto, oni povus literumi jene:

stougho - stofa

ough - aŭ

plough – plu

palough – pala

molough – moloĥo – laŭ PIV, specio de aŭstralia lacerto.

Se esperanta ortografio estus simila, neniu racia persono lernus aŭ povus legi Esperanton.

Mi kredas, ke mi sufiĉe demonstris en ĉi tiu eseeto, ke disleksiaj homoj en angleparolantaj landoj estas ne malinteligentaj, sed ofte de superaveraĝa inteligento – homoj, kiuj rekonas ke estas ekstreme stulte legi aŭ skribi la anglan lingvon. Pli bone studi volapukon aŭ lerni ĉinajn ideogramojn. Sed la homaro, ĝenerale, estas azeno. Kiel diris unu el miaj amikoj – parolante ne pri la angla, sed pri nia kara lingvo: „Esperanto estas tro inteligenta lingvo por la homaro.“

Monato, januaro 2005, p. 26.

Raŭmo

Saliko

Raŭmo kaj raŭmismo estas konataj al esperantistoj, sed la vera famo de la ĉemara urbo Raŭmo baziĝas ĉefe sur la arkitekturo de la mezepoka urbocentro. Ĝi okupas 28 hektarojn kaj enhavas ĉirkaŭ 600 lignodometojn en malnova nordia stilo. Ĝis la komenco de la 19-a jarcento la urbocentron ĉirkaŭis doganmuro

La stratoj estas mallarĝaj kaj nerektaj. La grandeco kaj formo de la privataj parceloj kun domoj varias, kaj multaj el ili plu havas apude puton, kelon kaj tenejon, kiu antaŭe servis kiel bovinejo. En unu el la kvartaloj antaŭe loĝis ĉefe maristoj, ĉar Raŭmo etas unu el la havenoj ĉe la Botnia Golfo de la Balta maro. Sur la fenestrobreto de la marista domo povas stari paro de blublankaj porcelanhundetoj, atendantaj la revenon de maristo. Per speguleto fiksita al la muro, la mastrino observis, kio okazas sur la strato, sen esti videbla de ekstere. Altaj pordegoj kaj ligna barilo ŝirmas la korton, kie kreskas siringoj, pelargonioj kaj aliaj ornamplantoj inter roketoj. Komforta benko aŭ seĝoj kaj tablo sub arbo invitas trinki kafon kaj ripozi dum posttagmeza varmo somera. Unu el la preĝejoj en Raŭmo estas preĝejo de la Sankta Kruco, konstruita de franciskanoj en la 15-a jarcento. Nun ĝi ne plu estas katolika, malgraŭ tio statuo de franciskano plu staras en la parko. Pli malnova en la urbo estas preĝejo de la 14-a jarcento dediĉe al la Sankta Triunuo. Ĝi ruiniĝis sekve de incendio kaj rezulte de tio nur kelkaj ŝtonoj restas.

La lasta granda incendio en Raŭmo okazis en 1682, neniigante la plej malnovajn domojn. Tial la plejmulto de la nunaj lingnodoj diverskoloraj estas konstruitaj en la novorenesanca stilo. Kvankam ili povas enhavi ene modernan komforton, la eksteron oni ne rajtas ŝanĝi. Kiam oni reparas kaj rekonstruas, oni ĉiam uzas tradiciajn farbojn kaj materialojn. Se oni devas malkonstrui tro kadukan lignodomon, oni konservas ĉiujn partojn kaj aĵojn por posta uzo en riparotaj konstruaĵoj.

En 1991 Raŭmo estis enlistigita kiel monda kulturheredaĵo de UNESCO kaj kiel modelo de malnova nordia lignokonstruado. Ĉiusomere raŭmanoj organizas puntosemajnon omaĝe al elstara tradicio de puntofarado. En la pasinteco eĉ knaboj devis lerni tiun arton!

Nun la tuta urbo havas 37 000 loĝantojn. Ekonomie en Raŭmo gravas industrio de papero, teksaĵoj, ŝipoj, konstrumaterialoj, elfaraĵoj el ligno, metalo kaj led.

La dialekto de Raŭmo preskaŭ nekompreneblas al finnoj el aliaj regionoj. Ĝi famas pro anekdotoj, kanzonoj, samkiel pro noveloj kaj romanoj de loka verkisto Hjalmar Nortamo. La retpaĝo de turisma oficejo de raŭmo legeblas ankaŭ en Esperanto: www.rauma.fi/esperanto.

MONATO - novembro 2006, paĝo 17.

Pri rilatoj inter viroj kaj virinoj en islama socio

Kiel mi jam skribis, min perfortis du turkoj. Tio instigis min meti du demandojn:

Ĉu mi rajtas diri, ke tiuj du viroj min seksperfortis ĝuste, ĉar ili estis turkoj?

Ĉu tiuj turkaj seksperfortintoj estis reprezentantoj de turkaj viroj ĝenerale?

La unuan demandon mi respondas jese pro la konduto de unu el tiuj du turkoj: min seksperfortinte, li tuj donacis al mi diskon de turka muziko, kaj skribis sian nomon kaj sian adreson, petante, ke mi skribu al li. Ĉu estas imagebla franca krimulo, kiu tuj donas al sia viktimo sian nomon kaj adreson? Tiu turko ne sciis, ke en Francio viro ne rajtas seksumi kun virino sen ŝia konsento. Ne ekzistas franco, kiu ne scias, ke ekzistas en Francio tia leĝo. Do jes, li seksperfortis min ĝuste, ĉar li estis turko.

La duan demandon mi respondas jese pro la informoj, kiujn mi ricevis pri Turkio:

Jen ciferoj, kiujn citas Amnestio Internacia en la kadro de sia kampanjo kontraŭ perforto al virinoj: en Turkio 35,6% da virinoj suferas pro seksperforto fare de edzo foje, kaj 16,3% ofte. (Studoj publikitaj en 2000, Women and sexuality in Muslim societies – Virinoj kaj seksumado en la islamaj socioj – Eldonoj WWHR, Istanbul, 2000). Se oni adicias 35,6 + 16,3, la rezulto estas, ke unu turko el du seksperfortas sian edzinon. Do mi rajtas diri, ke por turkoj

seksperforto estas la normala formo de la seksa rilato. Laŭ Amnestio Internacia, ĝis tre freŝa dato, turka seksperfontinto povis eviti punon, se li promesis edzinigi sian viktimon. Kredeble „mia“ turko, min seksperfortinte, atendis, ke mi sendos al li amleterojn.

Laŭ artikolo aperinta en la ĵurnalo „La Montagne“ de la 22-a de oktobro 2004, 40% de la turkinaj trovas normala, ke edzo batos sian edzinon. Motivo, pro kiu edzo rajtas bati sian edzinon, estas, interalie, se ŝi rifuzas seksan rilaton.

Tio instigis min esplori la demandon de la rilatoj inter viroj kaj virinoj en islama socio. Jene tekstas la Korano:

„La viroj respondos por la virinoj, ĉar Allah distingis iujn disde la aliaj, kaj ĉar la viroj disdonas por la virinoj el siaj propraĵoj. Do virtaj virinoj estas la obeemaj, kaj tiuj, kiuj ne kaŝas la sekretojn de siaj edzoj per la helpo de Allah; tiujn, pri kiuj vi supozas, ke ili malobeos, vi admonu, lasu ilin solaj en la lito, kaj batu ilin. Se ili tiam obeos vin, ne persistu en la persekutado; vere Allah estas eminenta, grandega.“ (Ĉapitro 4, An-Nisa (la virinoj), 35a versiklo).

Konforme al la principo „pri virinoj respondas la viroj“, ĉiu islama virino apartenas al iu viro.

Ekzemple, laŭ la alĝeria familia leĝaro:

- aŭ alĝeriano estas edzino, kaj ŝi laŭleĝe devas obei sian edzon
- aŭ alĝeriano ne estas edzino (fraŭlino, eksedzino, vidvino) kaj tiuokaze nepre estas iu viro, sen kies konsento ŝi ne povas edziniĝi.

Do, ĉiu alĝeriano apartenas al iu viro, kiun ŝi devas obei. En kelkaj aliaj islamaj ŝtatoj, leĝoj estas pli favoraj al virinoj (ekzemple en Maroko), sed ne efikas leĝo, se ne evoluas moroj. Kion eblas fari en lando, kie 40% de la virinoj trovas normala, ke iliaj edzoj ilin batas?

Se viro volas seksumi kun islama virino, li devas havi, ne ŝian konsenton, sed konsenton de la viro, al kiu ŝi apartenas.

Kun lia konsento, la seksumado estas permesata, ĉu ŝi volas aŭ ne. Tia regulo klarigas:

Ø la trudedzinigon. Laŭ diversaj gazetoj, estas en Francio 70 000 trudedzinigoj jare, kies viktimoj estas ĉefe turkinaj, ankaŭ malianinoj.

Ø la kolektivajn seksperfortojn. Kiam en iu franca suburbo juna arabido regule seksumas kun la sama arabida junulino, li konsideras, ke la junulino apartenas al li. Konsekvence, li rajtas pruntedoni ŝin al siaj amikoj, same kiel siajn cigaredojn aŭ sian motorciklon. Se la franca justico intervenas, la amikoj ne komprenas kion oni riproĉas al ili, ĉar ili seksumis kun junulino kun permeso de ŝia proprietulo. En la islama pensmaniero, seksa krimo estas atenco kontraŭ la proprietrajto de iu viro. Tiam „mia“ turko ne povis senti sin kulpa.

Sen vira konsento, seksumado estas malpermesata, kaj krimuloj estus ambaŭ seksumantoj. Ĉu la virino konsentas aŭ ne, neniel gravas. Ekzemple:

- Ø dum la milito por la sendependiĝo de Alĝerio, alĝeriaj edzoj sisteme repudiis siajn edzinojn, kiam ili estis seksperfortitaj de francaj soldatoj
- Ø 14-jaran turkinon, gravedan post seksperforto, murdis ŝia kuzo „por savi honoron de la familio“.

Do islamanoj havas tute koheran sistemon por reguligi la rilatojn inter viroj kaj virinoj. La problemo estas nur, ke tiu sistemo malsamas de tiu de okcidentanoj. La okcidenta principo, ke viro ne seksumu kun virino sen ŝia konsento, fontas de katolika teologio. Ĉirkaŭ la mila jaro, kiam la katolika eklezio difinis siajn 7 sakramentojn, ĝi proklamis, ke la kanonika valideco de la geedziĝo fontas el la reciproka konsento de ambaŭ gefianĉoj. Do ĝi kondamnas trudedzinigojn.

Kompreneble tiu principo ne estis tuj aplikata. Ekzemple Ludoviko la XIV-a kaj Maria Tereza ne havis grandan deziron geedziĝi, sed ili devis pro politikaj motivoj. Tamen de 1000 jaroj la katolika eklezio proklamas, ke por edziginigi virinon necesas, ke ŝi diru jes. Nenio simila ekzistas en islamo: la Profeto edzinigis 6-jaran knabinon.

Kaj post edziniĝo, ĉu katolikino rajtas rifuzi seksan rilaton? Katalogante libron pri svisa juro eldonitan en la 1950-aj jaroj, mi rigardis da difinon de la vorto „seksperforto“: „La krimo de tiu, kiu trudas al virino seksan rilaton ekster geedzeco“. La principo, ke edzo povas seksperforti sian virinon, aperis en la okcidenta juro nur tre freŝdate. Nun nur en 51 landoj tiu krimo estas punebla. En la 1998, Gbeglo Koffi skribis, ke ne povas esti seksperforto inter geedzoj, ĉar edzino ne rajtas rifuzi al sia edzo seksan rilaton. Mi ne scias, ĉu ankaŭ trudedzinigo kaj ekscizo estas inter la afrikaj kutimoj, kies respekton li petas de ĉiuj esperantistoj.

Ĉu nome de la universaleco de la homaj rajtoj okcidentanoj rajtas trudi al islamanoj sian katolikdevenan principon, ke viro ne rajtas seksumi kun virino sen ŝia konsento? Ĉiuokaze:

- Ø islamanoj, kiuj vivas en okcidentaj socioj, devas obei la tieajn leĝojn;
- Ø Eŭropo ne devas akcepti homojn el landoj, kie okcidentaj moroj ne estas konataj.

Mi pensas, kompreneble, pri la aliĝo de Turkio al la Eŭropa Unio. Bedaŭrinde, la sistemo de multaj maldekstruloj estas: „Eŭropo devas esti laika. Tial ni devas rezigni pri la katolika regulo, ke virino ne povas edziniĝi sen diri jes, kaj akcepti inter ni landon de trudedzinigantoj.“

Kompreneble, mi scias, ke tiu ĉi mia artikolo estas „politike malĝusta“. Mi kutimas, ke maldekstrulinoj ne konsentas al virino la rajton diri „min perfortis du turkoj“, se ŝi ne estas membrino de la Nacia Fronto. Mia aserto, ke seksperforto estas por turko normala formo de amoro, montras, laŭ ili, mian ksenofobion. Tute ne gravas, ĉu tiu aserto estas prava aŭ ne, gravas nur, ke ĝi ne estas maldekstra.

En la Esperanto-medio regas la dogmo, ke ĉiuj kulturoj estas egalvaloraj. Kompreneble, neniu kredas, ke ĉiuj politikaj sistemoj estas egalvaloraj, ĉar tia kredo estus tro evidente absurda: ĉu naziismo egalvaloras demokratecon? Sed, nome de esperantismo, iuj volas trudi al mi la kredon, ke religio, kiu de mil jaroj deklaras, ke ne eblas edzinigi virinon, se ŝi ne diras „jes“, same valoras kiel religio fondita de viro, kiu edzinigis 6-jarulinon.

Mi neniam aliĝos al asocio, kiu trudas al siaj membroj la kredon pri egaleco de ĉiuj kulturoj.

El Laŭte! 174, novembro 2004 Jacqueline Lépeix, Francio.

La vikipedio

La vikipedio estas rete libere kunredaktata multlingva enciklopedio, kies Esperanto-fako atingas 10 000 artikolojn. La projekto komenciĝis en 2001 en la angla lingvo, kaj sume en ĉiuj lingvoj enhavas pli ol 160 000 artikolojn en la angla, kaj sume en ĉiuj lingvoj pli ol 350 000. Jam ekis fakoj en pli ol kvardek lingvoj kaj dudeko el ili entenas pli ol mil artikolojn. La E-fako ekis komence de 2002.

Interesinda estas redaktomaniero. Vikipedio (angle Wikipedia) estas retejo, kiun ĉiu vizitanto povas tre facile kaj libere redakti: sur ĉiu artikola paĝo estas butono „Redaktu la paĝon“. Alklakante ĝin, la retumanto ricevas redaktofenestron, kiu entenas la tekston de la artikolo, kiun tiu povas libere modifi (korekti, kompletigi, plibonigi) kaj fine registri sian laboron, alklakante la butonon „Konservi“. Vi eble timas, ke per tiu rimedo estiĝas ĥaoso kaj ke stultuloj plenigas paĝojn per sensencaĵoj; la vikipedia sperto montras, ke tute ne estas tiel. Male, la sinsekvaj redaktantoj de la artikoloj konstante plibonigas ilin. Malbonintencaj fuŝaĵoj estas maloftaj kaj priatentitaj de la ceteraj kunlaborantoj, kiuj rapide povas ripari ĉian fuŝaĵon. Kun ĉiu artikolo estas diskutpaĝo: kiam du aŭ pluraj redaktantoj malkonsentas pri iu punkto, estiĝas diskuto, en kiu ĉiu argumentas, ĝis oni atingas kontentigan rezulton.

Poste ankaŭ provizo (libera, ni ne forgesu!) de bildoj, kaj ofte citaĵoj estiĝos kadre de Vikipediaj projektoj.

La grava kerno de la afero kuŝas en tio: La vikipedio sekvas la „Promesilon por libera dokumentado“ (angle GFDL), kiu devenas de la „Permesilo por libera programado“ (angle GPL), kiu regas la liberan malferman komputikon, el kiu Linuso estas la plej fame konata. Tiu permesilo signifas, ke neniu iam ajn rajtos alproprigi al si la entenon de la vikipedio, kaj ekmalpermesi, ke oni kopiu ĝin. **Temas pri „kopilasilo“** (angle „copyleft“), **kiu kontraŭe de la kopirajto** estas permeso al kiu ajn siavice kopii la dokumenton, kondiĉe, ke tiu transdonu la saman kopipermesilon. La kunlaborantoj konsentas, ke iliaj redaktoj estu regataj de tiu regulo, kaj ili estas atentigitaj neniam

kontraŭleĝe kopii kopirajtigatajn dokumentojn por eviti, ke la projekto povu esti persekutata pro malrespekto al ies ajn kopirajto.

Ja la Wikipedia, kaj ankoraŭ pli la Vikipedio Esperanta, estas plej grava projekto, ĝi estas parto de civilizo- kaj demokrateco-savo nepra entrepreno: Kontraŭ la nuna pli kaj pli invada kaj kruda emo al privatigo de la kulturo, edukado, scio, gravegas, ĝi kreas stokon de kulturaj kaj sciaĵaj informdokumentoj, programoj, bildoj, kaj ĉiaj dokumentoj, kiuj estus, kiel ĉiuj devus esti, la PUBLIKA, LIBERA, heredaĵo de homaro. Kaj fronte al tiu noca privatigo gravegas, ke tiel disvastiĝas tuta GNU kulturo. Tio estas tute planeda batalo inter du konceptoj de la kulturo: kulturo demokrata, humanisma, kiel publika bieno (mallongdire: civiliza!), kaj kulturo fiuze privatigita, komercigita, feŭdismigita tiel kiel en mezepoko.

Temas pri politika batalo, kaj valoro-batalo, batalo pri Civilizo (ja Civilizo kun majusklo) kontraŭ malcivilizo, humanismo kontraŭ malhumanismo, demokratio kontraŭ maldemokratio, socio kontraŭ feŭdismo.

Tial estas alia „korolario“ (flank-konsekvenco) kiel dirus Spinozo, ke estas devo de ĉiu esperantisto kunlabori, kiel eble pleje, en tiu projekto.

Ĉiu esperantisto kun reta aliro, eĉ sen komputila sperto, devus zorgi pliriĉigi la Esperanto-vikipedion, por ke ĝi fariĝu plej altnivela, plej enhavoriĉa montrofenestro de kultura valoro de Esperanto kaj simple esperantlingva kultura ilo alirebla al ĉiuj. Eĉ se vi ne sentas vin kapablaj verki novajn artikolojn, multaj poluraj laboroj bezoniĝas, kaj oni povas ankaŭ simple traduki artikolojn jam ekzistantajn en alilingvaj Vikipedioj!

Kiel diris la 100-a enskribinta Vikipediisto: „*Kvankam laŭnombre Esperanto-parolantoj estas multe malpli ol alilingvanoj, tamen, ne nur preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas alfabetaj kaj almenaŭ du-lingvaj, sed ili estas ankaŭ kleraj kaj konas diversajn kulturojn. Do ĉiu el ili povas tre facile traduki en Esperanton aŭ eĉ verki en ĝi pri siaj ŝatataj temoj.*“

„Mi kredas, ke la Vikipedio havas potencialon por allogi multajn homojn al Esperanto: se ni, la E-istaro, riĉigus ĝin tiel multe, ke ekzistu en ĝi valoraj respondoj al oniaj plej-serĉataj demandoj, oni certe elspezus sufiĉe por lerni E-on kaj utiligi la Vikipedion. Esperante tiun tagon, ni pliigu kontribuadojn kvante kaj kvalite!“

Ahmad Reza Mamduhi el Irano

Laste sed ne balaste! Jen la ret-adreso de ties ĉefpaĝo:

<http://eo.wikipedia.org>

R. Platteau (FR-62)

LAŬTE! 170, dumonata liberesprimilo por progresemluloj, marto 2004

Vortoj de S. J. Lec:

Homo kun homo de multaj jarcentoj sammonologas.

Ĉu kanibalo manĝanta per tranĉilo kaj forketo, signifas progreson?

Oni povas retroturni la gurdon, sed ne melodion.

Ferio kun la morto

Karl Lindqvist

I. Enkonduko.

Ĉu vi konas Danlandon? Ĉu vi jam estis ĉi tie? Ĉu vi vidis la malgrandan landon kun ĝiaj verdaj fag-arbaroj, ĝiaj freŝaj marbordoj, ĝiaj bonhumoraj homoj, kiuj ĉiam ridas, aŭ tre laŭte parolas; kiuj povas arde diskuti pri iu ajn temo dum horoj kaj poste trinki kafon unu kun alia, multegan kafon; kiuj povas kune kanti naciajn kantojn kaj diri terurajn spritaĵojn -?

Danlando konsistas el multaj grandaj, mezgrandajn kaj etaj insuloj plus Jutlando, kiu estas duoninsulo, krom Gronlando, kiun neniu dano konas. La dana grundo estas ĉie fekunda – ĉie kreskas sukerbetoj, porkoj, bovoj kaj infanoj, amasoj da infanoj, kiuj ĉiam ludas sur la stratoj kaj ŝoseoj neatentante trafikon. Ĉiuj ridas – ankaŭ la betoj. La herbo estas verda, la fagoj estas verdaj, la ĉielo estas verda – la tuta lando havas la esperantan koloron.

Bedaŭrinde la somero ordinare estas mallonga, sed dum kelkaj semajnoj la suno brilas ĉarmege; ĉiuj homoj fariĝas brunaj kiel mulatoj; la tuta popolo iras al la marbordo por bani sin, kuŝi sur la strando kaj maĝi glaciaĵon.

Sed plej bela estas somera nokto, kiu estas nek hela, nek malhela, sed krepuska. Vizitu la landon komence de la somero, kiam la floroj de la sambuko odoras kaj la tuta aero estas plena de paradiza ĉarmo.

La lando estas paca, la homoj pacamaj. Iam fremda diplomato promenis sur la stratoj de Kopenhago, la ĉefurbo. Li tiam ekvidis rajdiston, rajdanta sola tra la urbo. Li estis altstatura sinjoro kaj rajdis marapide; kaj ĉiuj homoj salutis lin respektplene.

La diplomato miris kaj demandis al dano: „Kiu estas la rajdisto, kiun ĉiuj homoj konas kaj salutas?“

„Tio estas nia reĝo,“ la dano respondis.

„Sed li estas tute sola! Kie estas la soldatoj, la polico? Kiu gasdas lin?“

„Kiu? Kompreneble ni ĉiuj!“ diris la dano.

La konata rajdisto estas nun mortinta, sed la cirkostancoj estas la samaj koncerne la nova reĝo. La reĝino ekzemple ofte veturigas sian propran aŭton sen eskorto.

Oni ne imagus, ke en ĉi tiu pacama lando povas okazi murdo, sed la fakto montras, ke ankaŭ ĉi tie estas kelkfoje „rabistoj en verda arbaro“, kiel la infanoj kantas. Mi mem spertis tion – mi, absolute pacama ordinara viro, mezaĝa dano, seninteresa, iomete flegma, sen specialaj talentoj, ne tre kuraĝa kaj ne tre inteligenta.

Fakte mi vivis dum tri semajnoj kune kun la morto – kvankam mi ne sciis tion. Mi havis tiam malagrablajn tagojn, kiujn mi neniam povos forgesi.

Ĉi tie mi volas rakonti pri la afero, sed mi devas konfesi, ke mi ne scias rakonti elegante aŭ ekscite, ĉar mi ne estas verkisto; kiel dirite, mi estas nur simpla homo, kiu tute hazarde venis en okazaĵojn, kiujn mi tiam tute ne komprenis.

Kaj tamen mi – jes, mi! – kaptis la murdinton. Malgraŭ la inteligenta polico, la tre inteligenta inspektoro, mia malnova amiko, malgrŭ ĉiuj, mi sola kaptis la krimulon!

Mia nomo aperis en ĉiuj gazetoj en nia lando – jes, ankaŭ en kelkaj gazetoj eksterlandaj. Eble vi vidis ĝin, sed verŝajne vi jam antaŭ longe forgesis kaj la nomon kaj la okazaĵon. Okazas nuntempe ja tiom multe en nia mondo, tro multe.

Sed nun mi volas rakonti la historion, kaj mi esperas, ke vi ne trovos mian rakonton tro seninteresa.

Originala kriminalromano

2-a eldono
kontrolita de la SAT literatura komitato
AABYHØJ
DANSK ESPERANTO-FORLIG 1962

El la libro „Gabrielo – historio de maldika vireto“

Henriette van Eyk

Estis iam naiva, maldika sunradio, kiu en varma printempa tago ekhavis la permeson unuafoje iri al la tero. En la ĉiela spaco li jam dum pluraj tagoj atendis sian vicon, sed nun la momento alvenis almenaŭ preskaŭ. Li sidis sur arbotrunka benko kaj ankoraŭ foje rigardis malsupren, trans la deklivan herbejon al la grenkampoj, kie li kreskis.

La tuta ĉielĝardeno floris kun peonioj, laburnoj kaj visterioj ĉiuloke. Sur la nuboj, kiuj preterivis, estis konstruitaj kristalaj tebudoj. Ĉie estis muziko, varmo kaj lumo. Gaza libelo ŝvebis super blua lageto. La aero tremis. Svarmo da migraj birdoj, revenantaj norden, ripozis sur la branĉoj de granda arbo kun arĝentaj folioj.

La ĉielĝardeno estis ekstreme ĉarma kaj belega kaj la plej belegaj estis la grenkampoj transe de la dekliva herbejo.

La grenspikoj en la ĉiela spaco estas flav- kaj orkoloraj kaj kiam ili estas sufiĉe altkreskaj, la suno venas kun flortondilo kaj detondas ilin kaj tial ili fariĝas sunradioj: etaj, brilaj, pinglecaj estaĵoj kun pintaj ŝultroj. Ĉiam estas amasoj de tiaj sunradioj. Ili svarmas inter la florbedoj, saltas kaj ludas kaj postlasas en la aero luman strion de orpulvoro. Kaj ili ĉiuj deziras baldaŭ esti plenkreskaj por tage iri al la tero kiel la grandaj sunradioj. Sed ĉiu devas atendi sian vicon.

La juna sunradio, kiu rajtis iri tiun matenon, brilis kaj ardis pro espero: „Mi ja bonaspektas, ĉu?“ li vokis al maljuna, emerita astro, kiu kiel kruda ŝtona bildo sidis malantaŭ li sur rokmuro.

La astro murmuris ion neaŭdeblan.

La sunradio saltis de la benko kaj forkuris sur pado el brila sablo, borderita de ruĝaj kaj flavaj floroj.

Sur longaj seĝoj kuŝe ripozis la maljunaj sunradioj kun nigraj okulvitroj kontraŭ la forta lumo.

„Bonan vojaĝon!“ ili vokis.

„Dankon“, diris la juna sunradio kaj tiam li plonĝe pasis blankan nubobenkon kaj ĝentile riverencis antaŭ la suno, kiu kun grandega, rozkolora ombrelo sidis sur kanapo el fulmotondraj nuboj.

La suno havis tiom multege da zorgoj, ke al ŝi apenaŭ restas tempo por fari sian tualeton. La tutan tagon ŝi iras en oranĝkolora, silka kimono, kun surbroditaj ardeoj kaj ĉerizofloroj. Ŝi estas dika, senceremonia virino kun brileta vizaĝo kaj ŝi studis multege, tiel ke ŝi nun scias ĉion kio malofte troveblas. Ŝi havas sekretarion, kun kiu ŝi laboras tutan tagon kaj eĉ oni flustras, ke la suno tute ne malŝatas tiun sekretarion. „Nu, kio do?“ diras la suno. „Kial mi ne malŝatus iun? Tio ne kaŭzas neglekton de mia laboro kaj miaj infanoj ricevas bonegan edukadon, tio estas, mi tute ne zorgas pri ili kaj tio estas la plej perfekta edukado, kiun oni povas doni al iu.“

La suno fermis la rozkoloran ombrelon kaj ekpudris la nazon. Dume ŝi explore rigardis al la sunradio staranta antaŭ ŝi, meze de la salono el blankaj nuboj; vigla, glima figureto; kuprodrateca korpeto, radiantanta vizaĝo kaj senbuklaj, hirtaj, oraj haroj.

„Ĉu mi povas iri?“ demandis la knabeto post kelkaj minutoj.

La suno kapjesis.

„Vi mem aranĝu viajn aferojn“, ŝi diris. „Vi konas la celon: disvastigi lumon kaj varmon. Ĉion ceteran mi lasas al via propra iniciato. Nur jenon: Kondutu dece, ĉar alie vi perdos ĉi tiun oficon. Igrade mi estas via patrino, sed tio signifas nenion, almenaŭ ne multon. Mi donas al vi ŝancon kaj tie finiĝas mia respondeco. Ĉu klare?“

„Ho, kompreneble“, diris la sunradio kaj tiam li ekiris.

Sed li estis tiel memkontenta, ke dume li iomete vostosvingis, pro kio li jam tuj kroĉiĝis al la unua renkontita ĉielarko, kio estis ĝena. Pasero kaj hirundo fluge kune subridis pri tio kaj diris: „Estas tro freneze. Ni atendu, ĝis li estos for.“

Tiam vidiĝis turpinto kaj sunradio pensis: „Tien mi iru“, ĉar oni ĉiam konsilis al la sunradioj antaŭ esplori la terenon disde turpintoj kaj ne daŭre kuri senpripense, ĉar oni ja scias, kie oni estas, sed ne kie oni alvenos. „Antaŭe intencu, poste komencu“, la suno estis dirinta kaj tiam ŝi rakontis kortuŝan historion de la sunradio, kiu ignoris la turpinton, provante kiel ovo doni lecionon al la kokino.

El nederlanda tradukis Rejna de Jong
Esperanto Kultura Servo, Den Haag, 1990.

Noto: Tre interese por mi, ke la suno oni difinas „ŝi“. En ĉeĥa lingvo la suno estas „ĝi“. Ĉu estas nacioj kiuj difinas la sunon „li“? Kaj kiun genron havas „via“ suno?

Mi petas, informu min. Mi antaŭdankas.
drahotovaesperanto@seznam.cz.

La vera virina historio

iu sendis al ni per e-poŝto

Legendo rakontas, ke mondkomence, kiam dio decidis krei virinon, li trovis, ke jam estas elĉerpita ĉiu solida materialo pro kreo de viro kaj nenio estas por dispono. Post profunda meditado li solvis la dilemon: Li prenis lunrondeton, dolĉegan ondkurbecon, teneran konvolvuladheremon, tremantan folimovadon, palmsveltecon, delikatan florkoloron, amdeziran cervinrigardon, sunradian ĝojon kaj nubajn plorgutojn, ventan ŝanĝiĝecon kaj hundan fidelecon, turtan timemon kaj pavan parademon, cignan plumdolĉecon kaj diamantan malmolecon, kolombinan amemon kaj tigran kruelecon, brulan fajron kaj neĝan malvarmecon. Li miksis tiajn kontraŭajn konsistaĵojn, formis virinon kaj donis ŝin al la viro.

Post unu semajno la viro venis kaj diris al dio: „Sinjoro, la kreaĵo, kiun vi donis al mi, faras min malfeliĉa. Ŝi postulas ĉiun mian atenton, ŝi neniam lasas min sola, ŝi intense babilas, ŝi senprave ploras, ŝi amuziĝas suferigante min kaj mi venas por redoni ŝin al vi, ĉar mi ne povas vivi kun ŝi.“

„Bone“, respondis dio kaj reprenis la virinon.

Post unu semajno la viro revenis kaj diris: „Sinjoro, mi sentas min tre sola, de kiam mi redonis al vi la kreaĵon, kiun vi faris por mi. Ŝi kantis kaj ludis flanke de mi, ŝi ameme rigardis min kaj ŝia rigardo estis kareso, ŝi ridis kaj ŝia

rido estis muziko, ŝi estis bela por vido kaj dolĉa por tuŝo. Bonvolu redoni ŝin al mi, ĉar mi ne povas vivi sen ŝi.“

Bonvolu sendi tion al ĉiuj eksterordinaraj virinoj, kiujn vi konas kaj al ĉiuj viroj, por ke ili neniam dubus pri la virinoj, kiuj estas apude de ili.

Kampanjo: Libro-Lasado

_Venis per RET-Info, <http://www.eventoj.hu>

Lige kun la informo pri la kampanjo „Esperanto en bibliotekoj“, mi volas rakonti pri interesa nova sperto.

Temas pri internacia kampanjo „Libro-Lasado“ (angle ĝi nomiĝas „bookcrossing“, france „Passe-Livre“, itale „PassaLibro“), kadre de kiu homoj lasas en publikaj lokoj librojn, kiujn oni tralegis kaj volas proponi al la aliaj ankaŭ tralegi. La aktivuloj de la movado parolas pri „liberigo de libroj“ kaj „libera tutmonda biblioteko“.

Ĉi junie al la kampanjo aliĝis ankaŭ aktivuloj de Moskva junulara E-klubo „MASI“ kaj Ivanova Medicinista E-Asocio. Kiel atendinte de entuziasmaj e-istoj ili lasis en la moskva metroo kelkajn E-librojn. Sur ĉiu libro estas indiko, ke la libro ne estas hazarde forgesita kaj estas klarigata la celo de la kampanjo.

Amike

Andrej Grigorjevskij

Rusia E-Unio

andrej.grigorjevskij@gmail.com

Tiu sistemo funkcias jam delonge ankaŭ en Kanado. Andrej ne menciis, ĉu pro nescio ĉu pro forgeso, ĉiu libro ricevas numeron BCID indikitan sur la klariga etikedo ene de la kovrilo, laŭ kiu ĉiu povas laŭvole postspuri la vagadon de la libro, kondiĉe kompreneble ke la ricevinto raportus la detalojn. Necesas nur viziti la retejon <http://www.bookcrossing.com> kaj enmeti la numeron de la koncerna libro en la indikitan lokon por ekscii pri ties „vojaĝo“.

Laŭ la ĉefpaĝo de tiu anglalingva retejo (dekstre en la mezo) ekzistas jam similaj retejoj por regionoj eŭropa, hispana, germana, nederlanda, franca kaj itala.

Amike salutas via

Brian D.Kaneen

bodokan@telus.net

Se prezenti la projekton, kiom mi scias, ĝi startis en 2001 en Usono laŭ iniciato de Ron Hornbaker. Oni asertas, ke nun partoprenas la „librolasadon“ 250 mil personoj en 130 landoj de la mondo. La movado ne estas iel organizita (kvankam ekzistas pluraj iniciataj grupoj), tio estas antaŭ ĉio la ideo – kaj modo – simile al „fulm-amasiĝoj“ (flashmob).

Amike
Andrej

El la libro „Mehmed Sinap – la historio de unu ribelo“

Ljudmil Stojanov

bulgara verkisto, aktiva batalanto kontraŭ faŝismo, prezidanto de la Unuiĝo de la bulgaraj verkistoj kaj deputito en la Konstituanta Parlamento. Li naskiĝis en la jaro 1888.

Liaj plej belaj libroj: „Holero“, „Mehmed Sinap“, „Tera vivo“, „Miaj renkontoj“, „Nuntempa Eŭropo“, „Aleksandro Stambolijski“, „Benkovski“, „Levski“ ktp, dramoj: „Tomiris“, „La pereco de Rakovica“, „Penelopo“ kaj „La lupoj gardas ŝafojn“.

Ĉio estas perdita, krom la honoro

Oni ekkuris al li: „Vojevodo! Vojevodo! Via konako brulas!“

Mehmed Sinap ekstremis kvazaŭ subite vekigis de dormo. Li ekmemoris, ke antaŭhieraŭ lasis tie sian edzinon kaj siajn infanojn, konvinkita, ke ĝis vesperiĝo la malamiko estas forpuŝota kaj ke li hodiaŭ denove estos ĉe ili... Sed ne okazis. Lia koro faldiĝis, kiel ĉirkaŭ bruligita folio, antaŭ liaj okuloj malheliĝis... Tie ili estas, meze en la brulo, kaj li ne povas helpi ilin... Ĉu vere li ne povas?

La brulo kreskis. La tuta konako estis ĉirkaŭkovrita en fumo. Estis bruligitaj ankaŭ aliaj domoj. La vilaĝo brulis.

Sinap ekiris laŭ kaŝitaj vojetoj, kiujn konis nur li, malsupren preter la rivero, preter la fulejoj kaj segejoj, kun unu penso: savi siajn proksimulojn.

Silentis la monto. La rokoj estis malvarmaj kaj timigaj, alte super ili rondflugis agloj.

„Agloj! Agloj!“ pensis Sinap. „Jam finiĝis nia regado. Kaj ankaŭ por vi venos malbonaj tempoj, liberaj fratetoj!“

Sed lia ĉefa penso estis ununura: atingi pli rapide, antaŭforigi la dangieron. Li vidis nek rokojn, nek la maldensajn arbustojn ĉirkaŭe, li ne ekvidis ankaŭ la riveron, kiu brulis profunde sub li. En la sonora silento reeĥis nur frapoj de la ĉevalaj hufoj kaj la frapbruoj de la ŝtonoj, kiuj falis malsupren.

„Nu Karaman, nu, ankoraŭ malmulte,“ frapetis li sian belstaturan drakĉevalon kaj kviete tiritis ĝin per la kolbrido, kun okuloj fiksitaj antaŭen. Li rapidis eliri sur la kreston por vidi kion okazas. Lia koro batis ĝis kreviĝo.

Li ne povis indulgi al si, ke ne prenis ilin supren, en la bivakon. En la malfeliĉo ĉiuj estas egalaj, tie ili estus en sendanĝereco. Kaj nun kiu scias, ĉu ili ne estas kaptitoj de tiu maljuna vertrago, kiu mokturmetos ilin. Li tuta tremis, liaj pensoj miksiĝis.

Subite antaŭ li aperis la vilaĝo kaj tie – je la supra rando – la konako. Ĝi tuta estis ĉirkaŭkovrita en fumo, nur el la fenestroj eliris longaj blankaj langoj, la brulo proksimiĝis al la tegmentoj, jam kuris sur la verandoj. La sango de Sinap rigidiĝis; li nevole balanciĝis, lia ĉevalo ankaŭ ekronkis multsignife, konsternita ankaŭ ĝi pro la eksterordinara spektaklo. Ŝajnis al li, ke en la fumo de la malsupra verando, aperis ia virina silueto kun du infanoj en manoj, silueto de Gjula, kiu petis kompaton de siaj turmentantoj

Mehmed Sinap galopigis la ĉevalon per ĉiuj fortoj, ĝis kiam la tuta konako, ĉirkaŭ kaptita de la freneza furiozeco de la brulo, per krakego kaj bruo ruiniĝis, kiel ruiniĝis lia tuta vivo.

Ĉi tie, ĉe la rivero mem, li vidis alian rajdiston, kiu ankaŭ galopkuris al la konako, kaj en tiu ĉi momento ŝajnis al li, ke antaŭ li aperas lia sorto mem kaj lin provokas.

La homo haltis kaj revenante dek paŝojn malantaŭen, ekkriis per laŭta voĉo: „Aŭskultu, homo, mi lasos vin, ke vi intervidu kun siaj proksimuloj, ĉar tiel ordonas la leĝo de Alaho kaj ĉar mi scias, ke vi estas en miaj manoj.“

Mehmed Sinap malplenigis siajn pistolojn kaj la homo balanciĝis sur la ĉevalo, sed detenis sin kaj reiris ankoraŭ pli malproksimen malantaŭ la rokoj.

„Mi scias, Ibrahim-agao, ke vi plenumas la leĝon de Alaho, pro tio vi lasis mian edzinon kaj miajn infanojn friti en la brulo!“

„Silentu, hundo tia! Ne mi, sed vi lasis ilin, ĉar vi estas sensaĝa, kiel homo freneza aŭ ebria, kiu ne scias kion faras!“

„Vi vidas, Ibrahim-agao, ke akcipitroj kaj falkoj forflugas el siaj nestoj kaj revenas kun rabaĵo por siaj idoj. Ĉiuj homoj estas infanoj de Alaho kaj Alaho ordonis vivi frate - kiu havas pli, ke li donu al tiu, kiu ne havas. Bone, sed ĉu efektive estas tiel? Tiuj, kiuj havas, ĉu ili ne aspiras pliriĉiĝi ankoraŭ pli, forrabi lastan moneron de malriĉulo? Al kiu vi servas, se ne al rabintoj, al tiuj, kiuj donas nenian moneron por la leĝo de Alaho?“

Tiu ĉi longa parolado estis dirita per klara kaj sonora voĉo kaj Ibrahim-agao ŝtopis siajn orelojn, por ke li ne aŭskultu.

„Kion vi volas ankoraŭ? Ĉu vi ne vidas, ke via afero jam estas finita?“

Postsekvis respondo: „Mia afero povas esti finita, sed via ankaŭ ne estas pli bona. Tia tempo estas veninta, Ibrahim-agao, ke kiu ne havas, prenos de tiu, kiu havas, se ne per bono, per forto – tion diras al mi mia malprosperinta kapo kaj ĝi ne mensogas...“

„Vidu tiu ĉi kapo kien vi alkondukis...“

„Povas esti ĉio perdita, Ibrahim-agao, nur la honoro estas savita, la honoro de Mehmed Sinap...”

Ibrahim-agao spronis la ĉevalon kaj ekiris ankoraŭ pli malantaŭen. Mehmed Sinap jam estis ekkurinta al la konako kaj perdiĝis en la fumo de la incendio.

tradukis Ivan Sarafov

Transprenite el „LEGOLIBRO - historiaj kaj literaturaj materialoj por superaj kursoj kaj memklerigo“, Sofio 1946.

PARADIZO

Omid Atai, Irano

Paradizo estas persa vorto, kiu eniris la eŭropajn lingvojn pere de la grekoj. La Aĥemenidaj Reĝoj faris belegajn ĝardenojn. Kiam la grekoj (tiamaj najbaroj de persoj) vidis tiujn sorĉajn ĝardenojn, ili uzis la vorton, prunitan de la persa. La vorto konsistas el du vortpartoj: *para* – alto, ĉielo, sublino, kaj *diz* – ejo, loko. La *paradizo* estas tiel simbolo de la ĉiela ĝardeno. La vorto ekzistas en la juda, kristana kaj islama religioj. Kompreneble ĝi iomete jam transformiĝis. Tio montras la influon de persa kulturo je eŭropaj kaj semidaj kulturoj.

Nun mi rakontu mian ideon pri la loko de Paradizo. En biblio ni legas: „Dio faris ĝardenon en Edeno, lando orienta. En tiu lando fluis kvar riveroj, kiuj akvumis la ĝardenon. La nomoj de du estas Ĝejhun kaj Forat, fluantaj en nordoriento de la persaj ebenaĵoj kaj en ilian okcidenton.“ Do, mi pensas, ke Eden estas ebenaĵo de Irano. Sed kie estis la ĝardeno de Edeno? Eble sumeraj tabuloj helpas al ni. Multaj rakontoj de la Unua Libro de biblio eltiriĝis de sumeraj rakontoj. Sumeranoj sur siaj argiltabuletoj skribis pri sankta kaj amita lando, kiu estis ilia unua devenloko. Tiu lando havis la nomon *Dilmun*, kaj multe similas al *Deljaman*. Deljaman estas alia nomo de Gilan (norda regiono de Irano). Multaj signoj parolas pri la interrilato de Gilan kaj Sumer. Gilan havas belegan pejzaĝon kaj vere similas paradizon. En zaratuŝraj skribaĵoj ni legas ke nur bonfarantoj vivos en Paradizo. Ili ne havos plu maljunecon, morton, timon, malgajecon aŭ malsanon. Tiu loko havas bonajn odorojn, belajn pejzaĝojn kaj bonan veteron. Zaratuŝro diris: „Se oni dezirus iri Paradizon, oni devas havi: bonpenson – bondiron – bonfaron.“

Kaukaza militkaptito

Lev Nikolajeviĉ Tolstoj

Ĵilin ekiras kun pieda ŝtupo, lamas, ne eble estas paŝadi, - ŝtupo tiras piedon flanken. Ĵilin eliris post Nogaja tataro. Li vidas – tatara vilaĝo, dek domoj kaj ilia preĝejo kun turo. Apud unu domo staras tri ĉevaloj kun seloj. Knaboj tenas ĉevalojn je bridoj. Tataro eliras el tiu ĉi domo, eksignas per mano, ke Ĵilin iru al li. Li mem ridas, ĉiam parolas en sia lingvo, kaj foriras en la domon. Ĵilin venas domon. Ĉambro estas bona, muroj estas glate ŝmiritaj per argilo. Apud antaŭa muro diverskoloraj lanugaj kusenoj estas metitaj, multekostaj tapiŝoj estas pendigitaj sur flankaj muroj; sur tapiŝoj – pafiloj, pistoloj, sabroj – ĉiuj arĝentaj. Apud unu muro estas malgranda forno. Planko estas tera kvazaŭ draŝejo, kaj tuta antaŭa angulo estas sternita per feloj; sur feloj estas tapiŝoj, kaj sur la tapiŝoj estas lanugaj kusenoj. Kaj sur tapiŝoj sidas tataroj en ŝuetoj: nigrohara, ruĝohara kaj tri gastoj. Lanugaj kusenoj estas submetitaj ĉe ĉiuj post dorso, kaj miliaj flanoj estas antaŭ ili sur ronda tabulo, bovina butero estas fandita en tasego, kaj buzo (tatara biero) estas en kruĉeto. Oni manĝas per manoj, kaj ĉiuj manoj estas en butero. La nigrohara tataro sin levas, ordonas sidigi Ĵilinson flanke, ne sur tapiŝon, sed sur nekovritan plankon, mem sidiĝas denove sur tapiŝon, regalas la gastojn per flanoj kaj per buzo. Laboristo sidigas Ĵilinson, mem demetas suprajn ŝuojn, metas ilin apud pordo, kie aliaj ŝuoj ankaŭ staras, kaj sidiĝas sur felton pli proksime al la mastroj: li rigardas, kiel ili manĝas, viŝas de siaj lipoj salivon. Tataroj manĝas flanojn, tatarino venas en tia sama ĉemizo, kiel ĉe knabino, kaj en pantalonoj; la kapo estas kovrita per tuko.

Ŝi forportas buteron, flanojn, donas lavujon kaj kruĉon. Tataroj komencas lavi manojn, poste ili kunmetas la manojn, sidiĝas genuflekse, ekblovas ĉiujn flankojn kaj ekparolas preĝojn. Ili parolas en sia lingvo. Poste unu el tataroj-gastoj sin turnas al Ĵilin kaj komencas paroli ruse.

„Kazi-Muhamed militkaptis vin,“ li diras kaj montras sur la ruĝharan tataron, „kaj li fordonis vin al Abdul-Murat,“ kaj li montras sur la nigroharulon, „Abdul Murat estas nun via mastro.“

Ĵilin silentas. Abdul Murat ekparolas kaj ĉiam montras sur Ĵilin, kaj ridas, kaj alparolas: „Soldato ruso, bona ruso.“

La tradukanto diras: „Li ordonas al vi skribi hejmen leteron, por ke oni alsendu elaĉeton por vi. Kiam oni alsendos monon li liberigos vin.“

Ĵilin pensas iom kaj diras: „Kiom li volas preni por mi?“

La tataroj parolas iom, kaj la tradukanto diras: „Tri mil rublojn.“

„Ne,“ diras Ĵilin, mi ne povas pagi tiom.“

Abdul salte leviĝas, komencas svingi manojn, diras ion al Ĵilin – li ĉiam opinias, ke li komprenos. La tradukanto tradukante, diras: „Kion vi donas?“

Ĵilin pensas iom kaj diras: „Kvincent rublojn.“

La tataroj tiam ekparolas rapide kaj kune. Abdul komencas insulti la ruĝharulon, ekparolas tiel, ke salivo ŝprucas el la buŝo. Kaj la ruĝharulo nur duonfermas okulojn kaj kraketas per la lango.

Ili silentiĝas; la tradukanto diras: „Kvincentrubla elaĉeto estas nesufiĉa por la mastro. Li mem pagis por vi ducent rublojn. Kazi Muhamed estis lia ŝuldanto. Li prenis vin por ŝuldo. Tri mil rublojn; por pli malgranda sumo estas neeble liberigi vin. Se vi skribos, oni lokigos vin en kavon, oni punos vin per vipo.“

„He,“ pensas Ĵilin, „ju pli malkuraĝa mi estos kun ili, des pli malbone estos“.

Ĵilin salte leviĝas kaj diras: „Diru vi al li, hundo, ke se li volas timigi min, mi donos nenion kaj ne skribos. Mi ne timas vin, hundojn, kaj ne timos.“

La tradukanto tradukas, ĉiuj denove ekparolas kune. Longe ili parolis, la nigroharulo salte leviĝas, aliras al Ĵilin: „Ruso“, li diras, „ĝigito, ĝigito ruso!“

Ĝigito en ilia lingvo signifas „bravulo“. Kaj li mem ridas; li diras ion al la tradukanto, kaj la tradukanto diras: „Donu mil rublojn.“

Ĵilin persistas: „Mi ne donos pli ol kvincent rublojn. Se vi mortigos min, vi ricevos nenion.“

La tataroj parolas iom, sendas ien la laboriston kaj mem ekrigardas jen Ĵilinson jen la pordon. La laboristo revenas kaj post li iras iu homo, dika, nudpieda, kun disŝirita vestaĵo, sur piedo havas ankaŭ ŝtipon.

Ĵilin ekmiregas – li ekkonas Kostilinson. Oni kaptis ankaŭ lin. Oni sidigas lin kune; ili komencas rakonti unu al alia, kaj la tataroj silentas, rigardas. Ĵilin rakontas kio okazis al li; Kostilin rakontas, ke la ĉevalo ĉesis kuri kaj pafilo ne ekpafis, kaj tiu ĉi sama Abdul atingis lin kaj militkaptis.

Abdul salte leviĝas, montras al Kostilino, parolas ion. La tradukanto tradukas, ke ili ambaŭ nun apartenas al la sama mastro, kaj kiu el ili donos monon pli antaŭe, tiun li liberigos pli antaŭe.

„Jen,“ li diras al Ĵilin, „vi ĉiam koleras, kaj via kamarado estas kvieta; li skribis hejmen leteron, oni alsendos kvin mil rublojn. Jen oni nutros lin bone kaj ne ofendos.“

Ĵilin diras: „La kamarado agas, kiel li volas; eble li estas riĉa, kaj mi ne estas riĉa. Kiel mi diris, tiel estos. Se vi volas, mortigu, - pro tio ne estos profito al vi, kaj mi skribos nur pri kvincent rubloj.“

Oni silentis iom. Subite Abdul sin levas, prenas plumon, pecon da papero kaj inkon, donas al Ĵilin, frapetas lin je ŝultro, montras: „skribu“. Li konsentas je kvincent rubloj.

„Atendu ankoraŭ“, Ĵilin diras al tradukanto, „diru al li, ke li nutru nin bone, donu veston, botojn, kiel decas, ke li lokigu nin kune, estos pli gaje por ni, kaj ke li demetu la piedan ŝtipon.“

Li mem rigardas la mastron kaj ridas. La mastro ankaŭ ridas. Li aŭskultas kaj diras: „Mi donos plej bonan veston: ĉerkesan veston kaj botojn. Mi nutros ilin kiel princojn. Kaj se ili deziras loĝi kune – loĝu kune en la stalo. Sed neeble

estas demeti la piedajn ŝtupojn – ili forkurus. Nur por nokto oni demetos ŝtupojn.“

Li aliras, frapetas Ĵilino je ŝultro: „Vi bona, mi bona!“

Ĵilin skribas leteron, sed li skribis malĝustan adreson, por ke la letero ne ĝisiru hejmen. Kaj mem li pensas: „mi forkuros“.

Oni forkondukas Ĵilino kaj Kostilino en la stalon, alportas al ili tien maizan pajlon, akvon en kruĉo, panon, du malnovajn ĉerkesvestojn kaj eluzitajn soldatajn botojn. Eble, ili demetis ilin de mortigitaj soldatoj. Por nokto oni demetis de ili ŝtupojn kaj seruris la stalon.

Dua ĉapitro, paĝo 11

el la rusa lingvo tradukis N.Kabanov

Eldono № 1063 de la firmao „POSREDNIK“ (PERANTO)

Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj № 9

Moskvo 1912

Valorigu ĉiun tagon

Homo iam vojiris sur plaĝon dum plenkuna nokto...

Li paŝis kaj pensis...

- se mi havus novan aŭton, mi estus feliĉa...
- se mi havus grandan domon, mi estus feliĉa...
- se mi havus bonegan laboron, mi estus feliĉa...

Li tiumomente ekvidis saketon plenan je ŝtonetoj kaj li komencis amuziĝi ĵetante ŝtonetojn, unu post unu, en la maron. Kaj ĉiufoje li diris: - mi estus feliĉa, se mi havus...

Li faris tion, ĝis kiam restis unu ŝtoneto, kiun li decidis gardi. Kiam li alvenis hejmen, li rimarkis, ke tiu ŝtoneto estas valorega diamanto.

Kiom da diamantoj li amuziĝante ĵetis en la maron senpense?

Ni ankaŭ ofte amuziĝas ĵetante niajn prezajn trezorojn esperante tion, kion ni kredas perfekta aŭ revante kaj dezirante tion, kion ni ne havas. Ĉiun ŝtoneton oni devas observi, ĉar ĝi eble estas preza diamanto. Ĉiun el niaj tagoj oni povas konsideri kiel preza kaj neanstataŭigebla diamanto.

Dependas de ĉiu ĉu profiti tagon aŭ ĵeti ĝin al la forgesa maro por neniam repreni ĝin.

Kaj vi povas same fari per viaj ŝtonetoj, kiuj eble estas amo, laboro, amikoj kaj eĉ viaj revoj.

Ricevita de nekonataj amikoj el mondo per reto.

El la „Hejmenveno“ de Heinrich Heine (1797-1856)

elgermanigis G. Waringhien

Ili vokis la Diablon, kaj li venis,
kaj mi rigardis lin kun ia miro: nek lama nek malbela li mienis.
Li estas ja afabla, ĉarma viro,
viro en plena flor' de sia aĝo, kompleza kaj ĝentila hom' de saĝo.
Li estas la perfekta diplomato, brilanta pri la Eklezi' kaj Ŝtato,
iom paleta, jes, sed mirinde:
Hegelon legas li, kaj lernas hinde.
Fouqué li ĉiam ŝatas delikate, sed pri l' kritik' ne plu sin embarasas:
Tion jam longe tute li forlasas al sia kara avinet' Hekate.
Al plua stud' de l' jur' li min instigis,
ĝi iam lin okupis mem: certigis kun kapoklin',
ke mia amikeco neniam ŝtos por li tro kara peco;
kaj dubis eĉ, ĉu ne ni nin renkontis pli frue, ĉe l' hispana ambasado.
Kaj, dum lian vizaĝon mi pli sondis,
mi trovis lin malnova tre konato.

Kanto –P.65

Amours de Ronsard

Printempo ne havas tiom da floroj
Aŭtuno tiom da maturaj vinberoj
Somero tiom da haŭtbrunaj varmoj
Vintro tiom da glaciaj frostoj
Nek la maro tiom da fiŝoj
Nek Baŭco tiom da rikoltoj
Nek Britanio tiom da strandoj
Nek Aŭvernio tiom da fontoj nek la nokto tiom da helaj torĉoj
Nek la arbaro tiom da trunkoj...
Kiom mi portas en kor', l' amatinoj
Kaj por vi ĉagrenoj kaj malĝojoj!

Tradukis Annie Collomb, Francujo.

Kristnaska karto

fama ĉeĥa poeto, artisto, kantisto Jiří Suchý

Kristnaskan karton mi kreas

kaj hastas ĝin tuj forsendi,
nur desegnos litetan pajlon
kaj por vi orajn bukletojn,
ankoraŭ origos stelon belan,
kiu alflugis supren Betlehem´
aldonos birdojn sur la branĉojn
de ruĝe florantaj arbetoj

Kristnaskan karton mi kreas
kun jeruzalema pejzaĝo,
al ĉen´ de steloj sur la ĉielo
desegnos mi unu por vi.
Ĝi eterne por vi lumos
post aliaj mallumos
kaj gvidos vin kiel tri reĝojn
survoje rekte en amsorĉojn.

Tradukis J.Drahotová

Tro da homoj elspezas multe, per mono kiun ili ne perlaboris,
pro aĵoj kiujn ili ne bezonas,
nur por gapigi homojn, kiujn ili ne ŝatas.

Will Smith

SALIKO

Karel Jaromír Erben – klasika ĉeĥa poeto

Li al matenmanĝo venas,
la edzinon ĉirkaŭ prenas:

„Edzinet´, vi estas bona,
tre sincera kaj sindona –
nur koncerne ĉi aferon
vi ne volas diri veron.

Jam la dua jaro pasas,
dum min tio embarasas.
Aŭdu: strange estas por mi,
Kiel vi kutimas dormi.

Vi – dumtage vigla, forta –
nokte kuŝas kvazaŭ morta,
sen ekspiro, sen ekmovo,
sen signet´ de vivopovo...

Via korpo, krom ĉi tio,
Pli malvarmas ol glacio.
Por vin vekti, estas vana
eĉ la laŭta plor´ infana!

Edzineteto – ĉu ne vere?
Vi malsanas tre danĝere!?

Kontraŭ tio scias oni
saĝan ja konsilon doni.

Herbojn vi sur kampo trovos,
Kiuĵ vin sanigi povos.
Se en herboj mankas forto,
Nepre helpos sorĉa vorto.

Sorĉa vorto nubojn sendas,
ŝipojn dum venteg´ defendas,
ĝi eĉ fajron estingigas,
rokon rompas, drakon ligas!

Stelojn movas vort´ magia –
fidu do al povo ĝia!“

„Mia edzo kaj sinjoro,
vana estus la esploro!

Kontraŭ Sorto – sen utilo

Li ĉe matenmanĝo sidas,
pri edzino sci-avidas:

„Vi sincera estis ĉiam,
tion longe spertis mi jam.
Nun mi tamen urĝe sentas,
ke vi ion prisilentas.

Jam du jaroj pasis dume;
mi observas vin zorgume.
Ĉu vi volas min informi,
kiel vi kutimas dormi?

Tage viva kaj aktiva,
nokte kuŝas vi malviva
sen ia ajn viv-simptomo,
kiel senanima homo;

via korpo froste palas
kiel se la karn´ disfalas.
Eĉ se ido plore vokas,
vorton vi ne reciprokas.

Ĉu mi ĝuste hipotezas,
ke sur vi malsano pezas?
Estas ĝi malsan-domaĝo?
Certe helpos homa saĝo!

Herboj de la tersurfaco
tre konvenas por kuraco.
Ne trovante taŭgan herbon,
ni en sorĉo serĉos helpon.
sorĉo estras al nubaro,
ŝirmas ŝipojn sur la maro;
sorĉo fajron bride tenas,
rokon rompas, drakon ĉenas;
sorĉo stelojn teren gvidas -
sanos vin, se vi ĝin fidas.“

„Mia edzo kaj amato,
ĉesu pensi pri la stato!

Kontraŭ fata hom-destino

restas ĉiu kuracilo.
Kion parco ja aranĝas,
tion homa vort' ne ŝanĝas.
Se mi kuŝas sen konscio,
tamen min protektas Dio.
Ĉiam min – mi kredas firme –
dia mano gardas ŝirme:
post la mortsimila sveno
mi viviĝas en mateno.
Nun mi sana estas, vidu –
tial nur al Dio fidu!“

SinJORino, vi eraris:
La sinJOR' alion faris...
Sorĉistin' ĉe fajro sidas,
Verŝe akvon ŝi dividas.
Unu, du... dekdva plado –
jam finita la verŝado.

„Multon konas vi, patrino,
pri la homa vivdestino,
pri malsanoj, pri malĝojoj,
pri la mort' kaj ties vojoj.
Diru, vi, la multescia,
veron pri edzino mia!
Ŝi dumtage vigla, forta –
nokte kuŝas kiel morta, -
Sen ekspiro, sen ekmovo,
sen signet' de vivopovo.
Ŝia korpo, krom ĉi tio,
pli malvarmas ol glacio.“

„Tion mi komprenas bone,
ĉar ŝi vivas nur duone:
la anim' - vi miras pri ĝi?
Nokte devas enarbiĝi.
Ĉe l' rivero arbarflanka,
jen salik' kun ŝelo blanka –
kaj al ĝi kun ŝi, la juna,
estas la anim' komuna!“

„Ne! Edzinon mi ne ŝatas,
se kun arbo ŝi rilatas;

Netroveblas medicino.
Kion Parco volis doni,
vane kontraŭstaras oni.
Mi ja kuŝas sen ekmovo,
sed min ŝirmas Dia povo.
Se mi nokte mortaspektas,
tamen Dio min protektas.
Post nokta mort' en lito
venas al mi la spirito.
La mateno ĝin redonas –
lasu, kiel Di' disponas!“

Vane vi, edzino, neis,
la sinjoro ne obeis.
Ŝorĉistin' ĉe fajro kaŭras,
akvon plade verŝi daŭras.
Dek du estas la plad-multo –
Viro venis por konsulto.

„Vi patrino, estas scia,
pri estonta vivo nia,
ĉu malsano originos,
kie Morto vivon finos –
helpu mian edzineton,
kaj malkaŝu la sekreton.
Tage viva kaj aktiva
nokte kuŝas ŝi malviva
sen ia ajn viv-simptomo,
kiel senanima homo.
Ŝia korpo froste palas,
kiel se la karn' disfalas.“ –

„Mi do diros la motivon:
ŝi havas nur duon-vivon.
Tage ŝin anim' ĉeestas,
Nokte en la arbo nestas.
Ĉe river' sub forst-parcelo:
salikarb' kun blanka ŝelo.
Sur saliko vergoj flavas...
ĝi kun ŝi animon havas.“

„Ĉu por mi edzin'konvenas,
se saliko ŝin katenas?

nur kun mi ŝi vivon ĝuos,
la salikon mi detruos!“

Iris li al la saliko
ĝin dehakis ĉe l' radiko;
kaj la arbo river-meze
en la akvon falis peze,
sed muĝeto ĝia fina
sonis kiel ĝem' patrina –
kiel se patrin' mortanta
idon estus forlasanta...

„Hom-amas' ĉe domo mia?
Sonorado? – Kaŭzo kia?“

„Mortis kvazaŭ defalĉite,
via edzinet' subite!
Falis ŝi – ve, mir-afero! –
Kiel arba trunk' al tero.
Nur ekĝemis ŝi mortante,
De l' infano disiĝante.“

„Ve al mi, la senkonsola
mortiginto kontraŭvola!
La edzinon mi mortigis,
la infanon mi orfigis!
Ho, saliko blankaŝela,
Puno trafis min kruela!
Kion fari nun? Por ĉiam
Vivduonon perdis mi jam.“ –

„El la akvo min eltiru,
flavajn vergojn vi deŝiru;
mian lignon lertaj uloj
sege tranĉu je tabuloj.
Kaj pretigu vi lulilon.
En ĝin metu nian filon:
kiam ajn en ĝi li kuŝos,
panjo lin karese tuŝos...
Vergojn ŝirmu de danĝero:
Plantu ilin ĉe l' rivero.
Vi instruos nian filon
Fari el la ŝel' fajfilon,

Nur kun ŝi mi vivi devos,
La salikon ter' ricevos...“

La hakilon li surbrakis,
iris kaj la arbon hakis.
Ĝi en akvon falis treme,
son-obtuze, peze, ĝeme –
kaj ekĝemis la suspiro
kiel lasta panja spiro
se ŝi mortas, sed konstate
idon serĉas rigardante. –

„Ĉu tumult' ĉe mia domo?
Mortsonoras – mortis homo?“

„Al vi la edzin' subite
mortis kvazaŭ subfalĉite.
Ŝi laboron sian faris,
kaj jen: kiel arbo falis
kaj elspiris, sed konstante
filon serĉis rigardante.“

„Ho ve, pekis mi malpie,
mi ŝin murdis senkonscie.
Kaj domaĝis mi al knabo
pro fatala patrin-rabo!
Ho, salik', kun ŝelo blanka,
ĉu mi vivu plu, ĝojmanka?
Kiel mi nun povu vivi?
Kion mi nun faru pri vi?“

„Tiru arbon for el-onde,
flavajn vergojn tranĉu tonde,
el la trunko segu breton,
el ĝi faru lulileton.
La infanon tien metu,
ke li – orfa – ne ploretu.
En lulilo li bonfartos,
ĉar lin lia panjo vartos.
Kaj la vergojn prizorgante
ĉe la akvo piku plante.
Poste knabon instrukciu:
li fajfilon fari sciu.

Kaj ludante – povos do li
kun la patrinet´ paroli...“

Se li ŝelfajfilon blovos,
li kun mi paroli povos.“

Tradukis Miloŝ Lukáš

Tradukis Tomáš Pumpr

Krepusko en la buduaro

Eli Urbanová

Kion mi volas?

Mi vidas, iras, nenio min doloras, almenaŭ ne hodiaŭ...

Mi devus ĝoji...

Mi ne povas. Kelkaj el ni sin nome movas sur veturilo...

Jen herooj!

Krepusko en la buduaro.

Foje mi havis nigrajn harojn, foje aspektis sang´ kaj lakto...

Mi hontas plendi.

Plej mi hontas, kiam hazarde mi renkontas iun kun blanka bastoneto...

Kion mi volas?

Mi vidas, iras, nenio min doloras, almenaŭ ne hodiaŭ...

Senco

Czeslav Milosz

Kiam mi mortos, ekvidos subŝtofon de l´ mondo.

Duan flankon, post birdo, monto, sunsubiro.

Postulanta finsolvon la vera signifo.

Kio nun ne kongruas, kongruos tucerte.

Kio nekomprenebla, estos komprenata.

Sed se ne ekzistas subŝtofo de l´ mondo?

Se turdo sur branĉeto ne montriĝos signo

Nur turdo sur branĉeto, se tago kaj nokto

Postsekvadas alterne ne gardante sencon

Kaj nenio ekzistas surtere krom l´ tero?

Se estus tiel, do postrestos tamen

Vorto foje vekita de nedaŭra buŝo,

Kiu kuras kaj kuras, mesaĝist´ senlaca,

Al interstelaj kampoj, galaksi-turnado,

Protestas, vokas, krias.

Apudvistula bulteno de Krakova Societo ESPERANTO 7 (67) 2004

Pagigi la anglalingvanojn

El la gazeto ESPERANTO

Aprilo-majo-junio

Le Mans

En parolado eldirita la 27-an de marto 2005 en Bulonjo ĉe maro dum celebrado de la centjara datreveno de la unua tutmonda kongreso de Esperanto, kiu okazis en 1905 tiurbe, s-ro **Claude Piron**, iama tradukisto en UN kaj Monda Organizo pri Sano, iama profesoro ĉe Ĝeneva Universitato, aŭtoro de la libro „*La défi des langues – Dugachis au bon sens*“ - „*La defio de la lingvoj – El fuŝa mastrumado al sana prudento*“ (Parizo: L' Harmattan 1994), prezetis proponon, kiu sensacie efikis. Emfazante la konsiderajn avantaĝojn, kiujn anglalingvanoj tiras el la mondskala situacio de la angla kaj la enorman financon pezon, kiun instrui tiun lingvon trudas al la impostpagantoj de pli ol 200 landoj, li proponis, ke la anglalingvaj ŝtatoj finantu, eĉ se nur parte, la instruadon de la angla en la resto de la mondo. La horoj, kiujn milionoj da neanglalingvaj junuloj dediĉas al la lernado de la angla, disponeblas al iliaj angle parolantaj samaĝuloj por perfektigi sin en scienco kaj tekniko: tie kuŝas peko kontraŭ la reguloj de konkurenco kaj kontraŭ principo akceli egalecon de ŝancoj por ĉiuj. Krome, el la monrimedoj investitaj en tiun lingvan trejnadon finfine rezultas, por la aliaj landoj, nur malsupera pozicio en ĉia traktado kun anglalingvaj personoj.

En novliberalisma socio, en kiu ni vivas, por ĝui avantaĝon oni devas pagi. Britio enkasigas ĉiujare 700 milionojn da pundoj el la „*lingvolernaj restadoj*“ tiulande aranĝitaj, kaj la prezidanto de British Council ne hezitis deklari: „*Nia lingvo enspezigas al ni pli multe ol la nafto de la Norda Maro*“. Estus juste, ke anglalingvanoj impostpagantoj, al kiuj estas ŝparitaj, nur pro ĝustaloka naskiĝo, la mensaj kaj monaj investoj trudataj al la cetero de la mondo, kontribuu al la financado de la fortostreĉoj farataj de ĉiuj aliaj popoloj por povi renkonti ilin sur la lingva tereno. Ĉu tio ne estus bonvena adapto de la principo: „*Tiu pagas, kiu poluas?*“ Tiu ĉi provokema propono ne malhelpas ĝian aŭtoron rekomendi alternativon pli justan, pli ŝparigan kaj pli rapide efektiveblan, kiun li povis testi kaj kompari kun aliaj paliativaj solvoj dum sia kariero de internacia plurlingva funkciulo: la Internacia Lingvo Esperanto.

La parolado estas legebla ĉe [http:// satamikarohm.free.fr/article](http://satamikarohm.free.fr/article)

Alkoholaĵoj al junularo damaĝas, maljunularon kuracas

Tiun surprizan konkludon de esploro oni faris en universitato en San Francisko. Oni esploris rilatojn inter uzado de alkoholaĵoj kaj stato de koro. Jen rezulto: Alkoholaĵoj damaĝas grave al homoj ĝis 45 jaroj de aĝo.

Al juna homo ĉiu kvanto de alkoholo kaŭzas, krom alie, malmoliĝon de arterioj kaj altiĝas danĝero de kormalsanoj.

Kie estas la limo, de kiu la alkoholo ne damaĝas? Sciencistoj ne estas certaj, eble ie post 50 jaraĝo. Sed eĉ tiam oni povas anstataŭi la alkoholaĵojn per aliaj manieroj – ekzemple per sana vivstilo.

Trouzantoj de alkoholaĵoj akiras „ruĝan nazon“. Ĉe ni oni diras: „mi vidas tion sur via nazo“, aŭ patrino diras al infano: „mi tuŝos vian nazon, se vi mensogas, ĝi moliĝos“.

En ministerio de defendo en Usono oni evoluis novan aparaton: supermalkaŝiligo de mensogo. Andrew Ryan klarigas: „Ĝis nun ni laboris kun haŭto, sed nun oni povas uzi kameraon, kiu bonege diversigas en infraruĝa reĝimo. Ĝi rigardas fluon de sango en etegaj vejnetoj en la nazo kaj vizaĝo. Tiu traflugo ŝanĝas rilate al mensogo aŭ al nemensogo de la homo. Temas pri ekscita reago per volo malkontrolita.

La aparato oni uzos precipe en flughavenoj kaj ĉe limaj kontroloj. La homo montros pasporton, respondos simplan demandon kaj kamerao tuj scios, ĉu la homo mensogas aŭ ne.

Poste dum pli detala esploro de la homo helpas plua eltrovo de Pentagon. Tie oni trovas: se la homo rigardas konatan objekton – eble loko de krimo, ŝtelitan objekton – lia okulo movas malpli rapide, ol dum rigardo al io nova. Denove tion klarigas Andrew Ryan: „Tiu fenomeno estas bone mezurebla kaj la homo ne povas ĝin influi. La palpebro movas pli frue, ol la homo perceptas, kion li ja vidas“.

Kvĕty 14/2005, str. 44-45.

El la libro „Raportoj el Japanio“

Hori Yasuo

Raporto el Francio (2)

Paul Signoret

Ĉu ili ankoraŭ legas?

Jen estas demando, kiu en Francio periode revenas en la parolo de gepatroj, de pedagogoj... aŭ de akademianoj, okaze de enketoj: ĉu la junuloj nuntempe ankoraŭ legas? Eĉ iafoje tio esprimiĝas sub formo de nediskuteblaĵo: junuloj ne plu legas.

Sed tiaj aplombaj asertoj baziĝas tro ofte sur nenia serioza esploro: nuraj antaŭjuĝoj.

Kontraŭdire al tiu ŝablono, protokolo pri kvarjara enketado farita de skipo de universitataj serĉistoj aperis antaŭ nelonge sub jena titolo: *Kaj tamen ili legas*. Unua – surpriza – malkovro: ĉe kolegianoj (12-15 jaraj) legado estas ŝatata, dum ĉe liceanoj (16-18-jaraj), ĉar ĝi subite iĝas pure lerneja devigo, ĝia praktiko falas. Dua konstato de la enketintoj: pli ĝuste ol pri krizo de legopraktiko, temas pri aliiĝo de tradicia legomodelo.

Antaŭe, legado estis pordo al intelekta formado: per ĝi oni instruis sin, distris sin, akiris kulturon kaj ĝuon. Ĝi estis kvazaŭ „ora ŝlosilo de la Templo de la Scio“. Nu, por la nuntempa junularo legi fariĝis ago banala, kaj en universitato kie kunekzistas aŭdaj, vidaj kaj skribaj rimedoj, ĝi jam ne ĝuas apartan prestiĝon.

Iam oni funde legadis malmultajn librojn, kaj funde konis ilin. Tial la filozofo Tomaso Akvino timis „homon kun unu sola libro“. Poste, oni supraĵe tralegis multajn. Hodiaŭ, informadiko, interreto devigas al abunda kaj rapida lego: esploro de ekranoj „fenestroj“... Verŝajne okazas ia mutacio en legomaniero de nuntempaj junaj homoj. Ili plu legas, certe, sed alie.

Ne ĉiuj tamen. Nur 60% el ili havas kun la libroj pozitivan rilaton, ĉu konstantan, ĉu intermitan. El la restaj 40%, 15% malmulte legas verkojn kaj 25% legas neniam. Sed ni memoru, ke en 40-aj jaroj pli ol tri kvaronoj de la francoj legis eĉ ne unu libron. Intertempa apero de televido, videokasedoj, CD-Romoj ktp., ja povus klarigi tiun nelegemon ĉe unu kvarono de la gejunuloj. Tamen la enketo ne evidentigis ligan inter la tempodaŭroj dediĉitaj respektive al legado kaj televido: pruviĝas do nevera alia ŝablono, laŭ kiu televido forlogus gejunulojn for de legado.

Aliflanke ĝi montris, ke videoludoj furoras ĉe kolegianoj, sed multe malpli plaĉas al liceanoj. Kaj male al komuna opinio, la bildstrioj ne ĝuas grandan favoron ĉe la adoleskantoj, dum la magazinoj estas legataj de ĉiuj, eĉ de tiuj, kiuj neniam legas librojn. Krome, ligo inter diligenta praktiko de legado kaj lerneja sukceso estas ne tiel evidenta kaj konstanta ol oni povus unuapense supozi – kaj ol ĝi efektive estas en la pasinto. Lasta konstato: la knabinoj, al kia ajn socia tavolo ili apartenas, estas entute pli legemaj ol la knaboj, legas pli multe, pli longe, kaj faras malpli da diferenco inter lernejoj kaj personaj legoj.

Ĉu tio plaĉas aŭ ne, estas fakto, ke ŝanĝiĝis la rilato de la homoj al lego. Iam ago iel sankta, kies privilegia perilo estis libro, ĝi nun iĝas afero tute ordinara, necesa sed ne kultata. Ĉar tiu mutacio okazas sub niaj okuloj, mi emas misvidi ĝin. sed ni trankviliĝu: junuloj ne rezignis la legadon. Simple ili malsanktigis ĝin.

Giri-ĉokolado

El „Raportoj el Japanio 6“

Hori Jasuo

Ekde antaŭ 30 jaroj en la tagoj de Sankta Valentino, la 14-an de februaro, japanaj virinoj kutimas donaci aŭ distribui ĉokoladojn al siaj amatoj, konatoj kaj kolegoj. Utiligi la tagon kiel ĉokoladotagon estis tre sukcesa strategio de ĉokoladkompanioj. Antaŭ 10 jaroj, en tiu tago oni konsumis trionon de la tuta kvanto da ĉokolado vendata dum la jaro.

Pro tiu ĉi tago virinoj aĉetis/as unu luksan por sia amato, aŭ por la fraŭlo, kiun ili celas, kaj plurajn malmultekostajn por siaj konatoj, kolegoj kaj superuloj. Tiuj malmultekostaj estas nomataj *giri-ĉoko* (ĉokoladoj por glatigi rilaton inter homoj). Sed 10 jarojn post la furoro, tiu kutimo de valentena ĉokolado jam velkis.

Donaci aŭ distribui *giri-ĉoko*-jn estas tre bona kutimo. Homoj volas vivi harmonie precipe kun kolegoj kaj superuloj en sia laborejo. Donacante malmultekostajn ĉokoladojn, oni povas danketi ilin kaj pro tio rilatoj, kiujn oni havas kun ili, povas pliboniĝi. La furoro velkis laŭ la velko de japana ekonomio. Kiam maldungoj kaj bankrotoj estas banalaj, La homoj iĝas pli singardaj, perdas toleremon kaj pli malfacile povas esti tiel amikaj al siaj kolegoj.

En la 14-a de februaro mi havis lecionon en mezlerneja klaso. Je mia surprizo, ĉiuj knabinoj preparis aŭ mem faris ĉokoladojn aŭ kukojn, kaj interŝanĝis tiujn nur inter si. Mi ricevis donacojn de kelkaj el ili kaj kompreneble mi sentis min tre feliĉa. Post donaco redonaci estas nia kutimo, tial en marto mi donis al ĉiuj geknaboj belajn ŝtonojn aŭ gemojn, kiujn mi aĉetis en Nepalo, dezirante, ke tiuj restu en iliaj monerujoj kiel memoraĵo de mi.

Ju pli streĉita estas la socio, en kiu oni vivas, des pli oni bezonas glatigilon. Por tio ĉokolado estas tre taŭga. Mi esperas, ke ĉokoladkompanioj starigos novan strategion por pluigi la *giri-ĉoko*-kutimon en nia socio.

Evoluo de la ĉeĥa socio en la jaro 2015

Petr Koubský, ĉefredaktoro de gazeto INSIDE
artikolo el „Pátek Lidových novin“ aprilo 2005.

Kia estos tipa bildo de vivo en Ĉeĥio en la jaro 2015? Kiu rikoltos sur kampoj modifitajn plantojn, ĉu robotoj aŭ ukrainanoj? Pli verŝajne la duaj, ĉar ili estos malplikostaj. De la sama kialo oni ĝuos modifikojn de maizo, tritiko kaj

kolzo, spite tiutempa opinio de la Eŭropa Unio estos hezitema. La mono solvos tion – modifaj plantoj donos pli altajn profitojn kaj estontece alportos malplialtajn elspezojn – ili mem forpelos insektaron kaj ne bezonos kemiajn flegojn. La terkulturo gravos pli por aspekto de pejzaĝo ol por ekonomio.

En la jaro 2015 ni estos averaĝe ekonomie sub la nivelo de EU, sed alte super la vivnivelo de plejparto de la mondresto krom kelkaj ekonomie riĉaj landoj. En la skalo de la tutmondo ni estos riĉaj kaj niaj ĝojoj kaj zorgoj rilatos al tio. Naskado de infanoj ankoraŭ malpliigos kontraŭ nun kaj maljuniĝo pliiĝos. La ŝtato vane klopodos reguli enmigradon de homoj pri kiu ĉeĥoj timas, sed ĉeĥoj ne povos sen ĝi ekzisti – kiu vendus, ordigus, servus, sekve pagus impostojn kaj donadus almenaŭ ian monon en socialan sistemon? Ni ĉiuj ŝparos pro pensio, ĉar la ŝtato ĝin plu ne garantios.

Plejparte ni laboros en servoj. Grava parto de homoj elpensados novajn metodojn kaj iliajn uzadojn. Komputoroj kaj telekomunikado ankoraŭ regos kiel nun. Nuna furoro – pri sendrataj altrapidaj retoj – perdos iel aktualecon, ĉar la datoj plejparte oni kondukos subtere per optikaj kabloj – parenteze - ofte senpage. Klonikado de la homo estos ebla, sed ekonomie malavantaĝa, jure kaj morale malcerta.

Venos nek grandaj mirakloj, nek tragedioj. La Teron ne trafos asteroido, nivelo de la oceanoj altiĝos nur ne tro, drogaĉoj ne fariĝos laŭleĝaj, ne eksplodos tutmonda milito, sed nombraj lokaj militoj brulos. Artefarita inteligenco ne superos homan kaj en kosmoso ni ne trovos pruvon de ekstertera vivo. En la jaro 2015 homoj ankoraŭ ne vizitos Marson, en Proksima Oriento ne ekestos paco, ĉeĥoj ne gajnos mondan pokalon en futbalo, praga urbestro ne nomiĝos Nguyen, Dežo, aŭ Oksana.

Tio ĉio okazos nur poste.

Kara leganto, legu post dek jaroj kaj kontrolu
J.Drahotová.

Kion signifas politiko

El Pollando venis artikolo tradukita de Karl Liebermann

Malgranda knabo demandis sian patron: „Paĉjo, kion propre signifas politiko?“

Patro diris: „Nu, tio estas simple. Fakte tio estas same kiel en familio. Mi alportas monon hejmen, do, mi estas kapitalismo. Via patrino administras la monon, ŝi estas, do, registaro. Via avo atentis, ke ĉi tie ĉio estus sur bona vojo, do li estas sindikato. Nia servistino prezentas laboristan klason. Ni ĉiuj zorgas nur pri via bonfarto, do vi estas la popolo. Kaj via malgranda frato, kiu ankoraŭ estas ĉirkaŭvolvita per vindtuko, estas la estonteco.“

La knabo estas iom konfuzita kaj petas dormi. Meze de la nokto li vekigis, ĉar lia malgranda frato malpurigis la vindtukon kaj krias en sia liteto. Knabeto paŝetas en la dormoĉambro de la gepatroj, sed la patrino dormas profunde kaj firme. Li decidas iri al la servistino por konsulti. Sed tie li trovas sian patron plezuriĝantan per la servistino. Lia avo observas ambaŭ tra la fenestro. Ĉiuj estas tiel okupataj, ke neniu rimarkas la malgrandan knabon. Do li iras denove en la liton nenion trafinte.

La sekvan tagon lia patro demandas lin, ĉu li nun komprenas, kion signifas politiko kaj ĉu li povas propravorte rerakonti.

La knabo diras: „Jes, estas fakte tiel: dum registaro dormas, la kapitalismo misuzas laboristan klason kaj la sindikato rigardas senage. Ĉiuj ignoras la popolon kaj la estonteco estas plena de merdo.“

Karulo de malriĉuloj, stelo de komunikiloj – abbé Pierre

Artikolo el MF DNES – la plej legata ĵurnalo en Ĉeĥio,
la 20-an de januaro 2005, Společnost DNES (Socio HODIAŬ)
Galerio de la eŭropa eminentularo – 6-a parto

Abbé Pierre fondis movadon, kiu sur kelkaj kontinentoj helpas al malriĉuloj, por ke ili helpu al si mem.

Tre malofte okazas, ke katolika pastro ombrigus en ŝtuparo de populareco futbalistojn. Tamen tio okazis kaj ne nur unu fojon en Francujo. Viro, en nigra ĉapo kaj nigra longa mantelo kaj kun longa blanka barbo – konata abbé Pierre, propranome Henri Groues – estas populara kaj eĉ pli konata ol Jean Paul Belmondo. Ne nur en Francujo oni konas lin.

Sed kialo de populareco aspektas nekredible: li sian tutan vivon dediĉis al zorgo pri senhejmuloj kaj malriĉuloj. Tio certe ne sufiĉus. Sed li havas sian apartan stilon.

Li naskiĝis en la jaro 1912 en Lyon. Lia familio estis kristana kaj riĉa. Lia patro faris kariton kaj la filo de junaĝo, ne tro sana, intencis fariĝi monaĥo laŭ inspiro de sankta Franĉesko el Azizo. Dum sep jaroj li vivis monaĥe. En la jaro 1938 li la ordenon forlasis. Dum la milito li partoprenis rezistan movadon. Minacis lin persekuto kaj li eskapis al Alĝerio tra Hispanujo al generalo de Gaulle. Post la milito li eniris parlamenton, por povi ĉi tie subteni aferojn de malriĉuloj ĝis la jaro 1951, kiam li rezignis.

Intertempe – 1949 – li agis: li fondadis „Emauzajn domojn“ – memhelpaj organizoj de homoj sur la rando de socio. La nomo de la organizoj devenas el epizodo en evangelio: apostoloj de Jezuo, afliktitaj pro morto de Jezuo iras al

urbo Emauzy kaj sur la vojo renkontas Jezuon, sed ili lin ne rekonas. Nur poste, kiam ili sidas ĉe tablo kaj li pecigas panon, ili rekonas lin.

Kia estas senco de Emauzaj domoj? Doni lokon al homoj kun trista, senespera sorto. Abbé diras: la plej terura tempo en vivo estas sento de superflueco kaj senvaloreco. Li uzis eĉ drastajn manierojn, se li urĝe bezonis monon por „siaj“ homoj: li vestis sin monaĥe kaj sur la sutano pendigis ĉiujn siajn ordenojn kaj medalojn kaj almozpetis ĉe pompaj amuzejoj de riĉuloj. Lia movado disvastiĝis. Ĝi ne proklamas sin religia. Domoj estas en 38 landoj de la mondo. Tre konata li estiĝis de la jaro 1954 kiam venis terura malvarma vintro kaj abbé kapablis konvinki per radioelsendo homojn en Francujo por karito kaj kolekto de mono. De tiu tempo abbé Pierre ofte parolas en televido kaj oni povas pri li legi en ĵurnaloj. Abbé Pierre havas prestiĝon. Lia movado komencis senleĝe ekloĝadi vakajn domojn. Abbé per sia obstino trovis solvon kaj permeson por „siaj homoj“.

Eĉ nun li daŭrigas sian laboron, estante 93-jaraĝa. Pri sia venko sur la ŝtuparo de populareco en la jaro 2003 li ne ĝojas, ĉar ankoraŭ oni devas multe klopodi por ĉirkaŭ miliono de malbone prizorgataj familioj kaj 800 000 senhejmuloj.

Verda paĝo el Juna amiko

Faktoj kaj argumentoj pri Esperanto

Kial nur malmultaj parolas Esperanton?

Scivolulo: Saluton, kara superĉefo! Mi ĝojas, ke mi povis vin atingi. Ĉu vi ne koleras, ke mi ĉiam ĝenas vin per miaj problemoj?

Ĉefkomputila moŝto: Tute ne, eĉ male, kun granda ĝojo mi estas je via dispono.

Scivolul': Dankon! Sciu, kara amiko, ke trafis min granda ĝojo. Kiel gajninto en la finalo de la landa matematika konkurso, mi vojaĝos al Matematikaj Olimpikoj en Greklandon. Kion vi opinias, ĉu mi povos tie utiligi Esperanton?

Ĉefkomputilist': Probable ne. Bedaŭrinde. Nur tre malmultaj parolas internacian lingvon.

S: Ĉu vi povas komprenigi al mi la kialon? Se ĝi estas plej facile ellernebla kaj sendiskriminacia lingvo, kial ne studas ĝin multaj personoj?

Ĉ.: Ĉar mono kaj modo regas la mondon.

S.: Ĉu racio valoras nenion?

Ĉ: Tion mi ne diris. Sed vidu, la plejmulto de la homaro sekvas la nunajn interesojn kaj nur tre malmultaj rigardas antaŭen, al fora estonteco.

S.: Tio surprizas min. Se io estas racia kaj utila, kial oni ne dediĉas al ĝi pli da atento?

Ĉ: Ĉar la utilo, pri kiu vi ĵus parolis, komence ne montriĝas okulfrapa. Kaj nur la plej klarvidaj estas pretaj dediĉi al tia afero multan tempon kaj energion. De prahistoria tempo ĉi tiuj homoj estas motoro de progreso.

S.: Kaj kion fari por eltiri praktikan utilon jam nun, kiam la mondo estas surda al nia afero?

Ĉ: Kion la Esperanto-asocioj jam faris, nome organizi sin. Mi, do, proponas al vi, ke antaŭ ol forvojaĝi, serĉu kontakton kun tieaj samideanoj kaj tiam vi spertos utilon de Esperanto. Tian utilon, pri kia eĉ revu ne povas homo fermita en malliberejo de sia lingvo. Ne malesperiĝu, do, vi certe trovos tie esperantiston, kiu volonte renkontos kaj amike helpos, se vi bezonos tion.

S: Dankon pro via konsilo utila kiel ĉiam.

Verdeskaj pensoj de Georgo Handzlik – la bardo sen barbo

Antaŭ ol vi fosos vian sulkon, kontrolu, ĉu ĝi fakte estas via.

„Rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante!“ iu ekkriis, starante rande de abismo.

Honora protektanto: ulo, kiu anstataŭ viziti kongreson, sendas leteron.

Mi renkontis tian samideanon, kiu ne havis iun ajn ideon.

Post la tago de la fina venko eĉ volapukistoj nomos sin pioniroj.

Se la fina venko okazus per la angla, ĉu ni eltenus tian sukceson?

Tra densa mallumo briletas jen io, - eble okuloj de leono.

Esperanto ne estas morta lingvo, ĝi evoluas: mia lando iam apartenis al la nepagipova kategorio ĉe UEA, nun oni nomas ĝin kategorio B.

Ne sufiĉas kabejĝi por iĝi Kabe.

Nia diligenta kolegaro, post longa laboro, jam volas iom ripozi.

Mi kantas pri fina venko kontraŭ mono. Ĉu tio estas finvenkismo aŭ raŭmismo?

Vortoj de Arne Garborg (1851-1924)

Oni diras, ke per mono oni povas havigi ĉion. Ne, tio ne veras:

- Ø oni povas aĉeti manĝaĵon, sed ne apetiton
- Ø medicinon, sed ne sanon
- Ø molajn litojn, sed ne agrablajn dormojn kaj sonĝojn
- Ø luksajn vestojn, sed ne belecon
- Ø amuzon, sed ne ĝojon

Kompreneble, superas opinio, ke mono devas esti ne celo dum homa vivo, sed nur rimedo por atingi metitan celon. Oni ne forgesu, ke ne mono estas homa riĉaĵo, sed male, ke amikeco estas homa riĉaĵo.

Malgraŭ diversaj traktadoj, mono plu validas kaj regas tutmonde.

Ankoraŭ du nekombitaj pensoj de S. J. Lec

Junecaj krimuloj ne posedas garantiitan estontecon. Ili povas ankoraŭ fariĝi honestaj homoj

Ne ĉiu Habelo povas posedi propran Kainon. Li devas kontentiĝi per la kolektiva.

Oni devas havi multe da pacienco por lerni ĝin.

Ĉio estas nur iluzio. Evidente eĉ la antaŭa frazo.



Vortoj de Claude Piron

Mi kredas je la Bono.

Mi kredas je la Esperanto.

Mi kredas je la Bono. Kaj, male al multaj homoj, mi kredas, ke Bono tute ne simetrias kun Malbono, sed ege superas ĝin. Malbone konstruita domo disfalas. Bone konstruita rezistas al la atakoj, eĉ plej teruraj, de naturaj fortoj. Tial mi havas nenium dubon pri la estonteco de Esperanto. Se oni komparas ĝin kun la aliaj rimedoj interpopole komunikiĝi, estas klare, ke ĝi estas la plej bona. Mi perceptas, ke Esperanto estas unu el la konkretiĝoj de la Bono.

Ekzistas tri sistemoj de internacia komunikiĝo: burokrata, ĝangala kaj demokratia.

Al la burokrata kaj la ĝangala mankas unu el la ĉefaj ingrediencoj de homa boneco, nome sento. Ili estas sensentaj sistemoj. Mankas al ili ĉefe kunsento, kompatio, sento pri justeco kaj komunika komforto, konsidero al la bezonoj de tiuj, kiuj estas etaj kaj malfortaj, sento pri homo kaj digneco kaj pri la rajto de ĉiu renkonti iun, kiu aŭskultos kaj komprenos, iun, kun kiu eblos sen probleme komunikiĝi.

La tria sistemo estas demokratia. Ĝi nomiĝas Esperanto. Kiel ĉio demokratia, ĝi havas multajn mankojn, multajn malperfektaĵojn. Sed ĝi, tamen, estas la plej justa, la plej efika, socie kaj psike plej kontentiga sistemo. Unuvorte, ĝi estas bona. Ĝi naskiĝis el la boneco de unu homo. Ĝi naskiĝis el sento de kompatio, de solidareco, el postulo al justeco kaj homa digneco. Jes, ĝi estas bona. Kaj tiel ĝi supervivos la aliajn.

Mi kredas je Esperanto. Mi kredas, ke tiu lingvo estas multe pli valora ol la plimulto el la esperantistoj konscias. Mi kredas, ke ĝi solvos multe pli da problemoj en la estonteco de la homaro, ol estas ĝenerale imagate, eĉ inter ni. Mi kredas, ke ĝi povas forigi multajn suferojn, pri kiuj homoj ne konscias, kaj kiuj estas ligitaj al la manko de interkomprenilo.

Kial kaj kiel lerni Esperanton

1995

Vortoj de Françoise Guihaume

Kadre de la memorfesto okaze de la centjariĝo de la leĝo pri disigo de la eklezio disde la ŝtato en 1905, mi ĉeestis la prelegon de sinjoro PENA-RUIZ, kiu pritraktis la temon „**Kio estas laikeco?**“

Tute simple kaj klare, tiu profesoro pri filozofio memorigis al ni, kial la ŝtato, pere de tiu leĝo, estis en 1905 devigita garantii pensliberecon kaj

egalrajtecon, cele al universalismo, ebliganta al ĉiuj civitanoj kunvivi en reciproka respekto al siaj spiritaj konceptoj.

Alparolante la aŭskultantaron, sinjoro PENA-RUIZ diris (proksimume) tion:

„*Kiam mi rigardas vin, mi ne vidas kredantojn, agnostikulojn aŭ ateistojn, sed mi vidas tute simple homojn...*“ kaj samtempe mi eĥe aŭdis Zamenhofon finantan la frazon: „*...sed homoj kun homoj.*“

Tiuj vortoj estis profunde gravuritaj en mia memoro, ĉar precize antaŭ unu semajno, la 2-an de aprilo, en Bulonjo ĉe maro, ili estas talente deklamataj de Arno Lagrange ĝuste en la teatro mem, kie Zamenhof eldiris ilin en 1905: „*Hodiaŭ kunvenis (...) ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.*“

Evidente, kiam Zamenhof elvokis la disigon de la homoj laŭ iliaj lingvoj kaj nacioj, li esprimiĝis sur alia kampo. Sed la paralelo impresis min: ĝi estas la sama mesaĝo pri universalismo, kiel la ideo pri laikeco: „*Neniu penssistemo aŭ religio superu la aliajn*“ kaj pri la ideo de la internacia lingvo: „*Neniu lingvo superu la aliajn.*“ Estas du fundamentaj principoj, kiuj garantias la pacan kaj fratan kunvivon.

Por mi, tiuj du ideoj, post tute malsama konkretiĝo antaŭ 100 jaroj, nun kaj ankoraŭ longtempe bezonos nian viglan atenton, nian efikan apogon kaj eĉ niajn batalojn por defendi, disvolvi kaj realigi ilin!

Gazeto ESPERANTO
aprilo-majo-junio 2005
Le Mans

Vortoj de kolonelo Herrera – fama hispana aviadisto

Tri okazaĵoj konsiderindaj en historio de la homaro okazis
dum la tri jaroj
1884 – 1887

unua aera itinero

malkovro de la elektro-magnetaj ondoj
kaj
ESPERANTO

Tiel RENARD, HERTZ kaj ZAMENHOF kuŝigis la unuajn ŝtonojn de la tri kolonoj sur kiuj devus starigi la komunikadojn inter la homoj.

Vortoj de Stefan MacGill

Esperanto signifas por mi...

... lingvon, kiun mi parolas kaj uzas ĉiu-tage. Mi pensas kaj ofte sonĝas en ĝi. Ĝi estas lingvo, kiun mi provas kaj volas analizi laŭ ĝiaj profundaj kvalitoj, ne tra la reguloj de aliaj naciaj lingvoj. Se mi komprenos la unikajn bonaĵojn kaj obstaklajn partojn de Esperanto, ni povos konstrui pli agrablajn kaj efikajn manierojn instrui ĝin.

Ĝi signifas havi du filinojn, kiuj aktive uzas la lingvon, partoprenas en familiaj kaj junularaj renkontiĝoj, verkas en la lingvo kaj preparas proprajn lernilojn, per kiuj ili instruas la lingvon al siaj samklasaj amikoj. La tria filino bone komprenas Esperanton, sed ankoraŭ ne emas paroli ĝin.

Ĝi signifas daŭrigi tradicion, el familio kun kvar generacioj de Esperanta aktivado. Mia patro parolis al mi en Esperanto tra miaj unuaj jaroj, kiel same mi faris kun Katarina kaj Hajni. Mia patro konvinkis sian panjon lerni kaj instrui la lingvon.

Ĝi signifas organizi Internaciajn Infanajn Kongresetojn (IIK) – kunvenigi infanojn el diversaj landoj kaj pretigi por ili interesan programon en bela loko.

Ĝi signifas prizorgi kaj pagi apartan apartamenton, kie mi stokas Esperantajn librojn kaj numerojn de Juna Amiko. De tie mi dissendas al vi nian revuon. Tie mi verkas lerno-librojn, teatraĵojn kaj artikolojn por Juna Amiko kaj aliaj revuoj. Mi interŝanĝas ret-mesaĝojn kun multaj esperantistoj pri kursoj, kongresoj, gazetoj, man-libroj, ideoj. Sed ĉiam estas pli da mesaĝoj ol tempo!

Ĝi signifas dum dek jaroj labori en Nederlando kiel profesia esperantisto (1976-86).

Ĝi signifos, se mia emeritiĝo iam povos eble, la realigadon de pli ol dekoj da farindaĵoj: (re)verki lernilojn, organizi bonajn IIK-ojn, krei praktike uzeblajn instru-gramatikojn por Esperanto, aperigi rete multajn verkitajn, sed ne aperintajn rakontojn kaj ekzercojn kaj multajn aliajn.

Ĝi signifos, ke la estigo de familio ne kondukas al la ĉesigo de laboro por la lingvo. Delonge mi vidas ke la meza generacio mankas en Esperanto. Ĝi mankas, ĉar ne eblas dividi, jaron post jaro, la tagojn en kvar partojn: familio, profesio, ripozo kaj Esperanto.

Esperanto povos esti kompleta lingvo nur, se ĝi havos kompletan parolkomunumon – geografie kaj aĝ-grupe. Kiam mi sukcesos ne plu perdi nian mezan generacion – tio jam kalkuliĝus inda venko.

Juna Amiko

31-a jaro. N-ro 111, decembro 2004.

Vortoj de Vagn Frausing

Ludo de ĉapoj

Al la monda esperantistaro!

„Kiam ni kongresas en Ĉinio ni kunlaboru kun la registaro por antaŭenigi Esperanton. Pri la (manko de) moralo de la reĝimo ni ne okupiĝu.“

Tiel aŭ iom simile multaj respondis al mia kritiko de la Pekina Deklaro kaj nia flata sinteno al la totalisma reĝimo.

Similan pensmanieron oni ofte renkontas en la mondo de normaluloj. Ekz. sportistoj rifuzas kritikon, ke ili subtenas fiajn reĝimojn partoprenante sportarangojn asertante, ke ili simple agas kiel sportistoj. Oni ne miksu sporton kun politiko.

Same diras komercistoj: Mi simple agas kiel komercisto. Oni ne miksu komercon kun politiko.

Simile konsumistoj diras: Mi simple agas kiel konsumisto, mi serĉas la plej altan kvaliton por minimuma prezo. Mi ne miksas aĉetadon de varo kun politiko.

Ili ĉiuj renversigas la problemaron. Ne temas pri tio, ke iuj volas malprave miksi sporton, komercon, aĉetadon de konsumproduktoj ktp. kun politiko. Tute male, temas pri tio, ke iuj volas dividi tion, kio estas nedividebla, nome nian komunan homan respondecon.

Ŝajnas, ke iuj volas liberigi sin de nia ĝenerala homa respondeco per ludo de ĉapoj: nun mi surmetas la ĉapon de komercisto kaj respondas nur kiel...

Sed nia homa respondeco estas nedividebla. Se per niaj agoj ni subtenas infanlaboron, torturon, subpremon de homaj rajtoj ktp. ludo de ĉapoj ne povas savi nin de nia kulpo.

Tio validas ankaŭ por ni esperantistoj. Ni ne rajtas surmeti la esperantan ĉapon asertante, ke tiel ni agas nur kiel esperantisto kaj neniel respondecas ĝenerale kiel homoj.

Efektive la respondeco por humanismaj idealoj estas por ni esperantistoj pli prema ol por aliaj. Ĉar sen tiuj idealoj nia komunumo ne havas ekzistorajton. Esperantujo ja baziĝas sur valoroj.

Mi konscias, ke multaj el vi malkonsentas kun tiu mia lasta tezo. Sed en la venonta mesaĝo mi konvinkos vin.

Eble iuj forĵetis la originan tekston de mia kampanjo. Vi trovos ĝin en:

http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=uk_libere

9129434m001@stofanet.dk

Vortoj por fino

Ekde morgaŭ mi estos malgaja,
nur ekde morgaŭ,
sed hodiaŭ mi estos kontenta.
Kial mi estu malgaja? Kial?
Ĉar ne favora vento blovas?
Kial mi hodiaŭ ploru pri morgaŭ?
Eble morgaŭ estos bele,
eble estos hele.
Eble morgaŭ denove brilos la suno.
Kaj estos nenia kialo por malĝojo.
Ekde morgaŭ mi estos malgaja,
nur ekde morgaŭ.
Sed hodiaŭ,
hodiaŭ mi estos kontenta.
Kaj al ĉiu malgaja tago mi diros:
Ekde morgaŭ mi estos malgaja.
Hodiaŭ NE.

La poemo de la knabo trovita en juda geto en la jaro 1941
tradukis Jarmila Rehtorisová
Esperantisto Slovaka 2/2005